

MEMORLIBRO GRAZ 1987

LA INTERNACIA JUBILEA
ESPERANTO - KONFERENCO



CENT JAROJ DE ESPERANTO-KULTURO

La frontpaĝo

Prof. D-ro Ivo Lapenna, la iniciatinto kaj organizinto de la Internacia Jubilea Esperanto Konferenco, 1987, Graz, Aŭstrio, kaj de la Monumento "La Espero". Foto Kehlet

Prof. Lapenna estis Prezidanto de UEA ĝis 1974, sed tiam forlasis la organizaĵon (legu lian verkon "Hamburgo en Retrospektivo"). Poste li fondis la organizaĵon "Internacia Centro de la Neŭtrala Esperanto Movado" (I.C.N.E.M.), kies Prezidanto li estis.

La Monumento, "La Espero", de la dana skulptisto, Jesper Neergaard, sur la Esperanto Placo en Graz. Ĝi estis starigita kaj inaŭgurita dum la Internacia Jubilea Esperanto Konferenco, 1987.

Reprodukto, ekstrakto aŭ traduko en kiun ajn lingvon nur kun la permeso de la redaktoro.

© Fondaĵo Ivo Lapenna

Majo 1989

ELDONEJO PERSPEKTIVO

ISBN 87-982430-3-9

Nørregårdavej 91, 2610 Rødovre, Danio

ENHAVO

	paĝo
Antaŭparolo	5
Internacia Honora Komitato	7
Konferenca Prezidantaro	10
Aŭstria Patrona Komitato	11
Programo de la Konferenco	12
Loka Konferenca Komitato	13
La Rezolucio de la Konferenco	18
Festparolado de Prof. D-ro Ivo LAPENNA: "ESPERANTO KIEL LINGVA ESPRIMO KAJ INSTRUMENTO DE HUMANECA INTERNACIISMO"	19
Salutoj de UEA kaj SAT al la Jubilea Konferenco	25
Parolado de Prof. D-ro Ivo Lapenna okaze de la inaŭguro de la monumento "La Espero" sur la Esperanto-Placo: "POR MONDA KOMUNIKADO EN PACO KAJ LIBERO" ..	27
Donacintoj por "LA ESPERO", Memordokumento	29
Ekspozicio: "100 JAROJ DE ESPERANTO-LITERATURO" (Enkondukaj Vortoj kaj Antaŭparolo el la katalogo).....	30

Lekcioj en la kadro de la Konferenca temo "100 JAROJ DE ESPERANTO-KULTURO"

	paĝo
D-ro André ALBAULT:	
Cent jaroj de evoluo de la Internacia Lingvo Esperanto ..	32
Prof. D-ro Juan RÉGULO PEREZ:	
Cent jaroj de Esperantaj frazeologismoj	48
Claude GACOND:	
Cent jaroj de Esperanto-Instruado	61
Fotoreportaĵo de la Konferenco	77
D-rino Marjorie BOULTON:	
Cent jaroj de Esperanta Prozo	95
Baldur RAGNARSSON:	
Cent jaroj de poezio en Esperanto	102
Prof. D-ro Paul NEERGAARD:	
Cent jaroj de Esperanto en la servo de natursciencoj kaj teknologioj	112
D-ro Eugène DE ZILAH:	
Cent jaroj de filozofio kaj socisciencoj en Esperanto	120
Mag. Herbert MAYER:	
Eldonejoj, kulturaj centroj, bibliotekoj	127
Jean THIERRY:	
Cent jaroj de Esperanto en servo de kulturaj inter- ŝanĝoj, praktikaj celoj kaj internacia solidareco	133
Walter ZELAZNY:	
Cent jaroj de la socia penso en ligo kun Esperanto	148
Prof. D-ro Ivo LAPENNA:	
Cent jaroj de parola Esperanto-kulturo	160
Pri Ivo LAPENNA	163

ANTAŬPAROLO

La jaro 1987 donis okazon, jubilee memori la centjariĝon de la Internacia Lingvo, retrospektive trakti ties evoluon kaj atingojn, diskuti ĝiajn perspektivojn kaj ŝancojn, kaj plani la pluan agadon. Tiucele, kaj ankaŭ por vaste informi la ĝeneralan publikon pri Esperanto, okazis aro da aranĝoj diverstipaj tra la tuta mondo: amasaj kaj malaltnombraj, ĝeneralaj kaj fakaj ktp.

Unu el la plej elstaraj aranĝoj sendube estis la JUBILEA ESPERANTO-KONFERENCO en GRAZ, Aŭstrio, iniciatita de Prof. D-ro IVO LAPENNA. Laŭ liaj vortoj ĝi estis "plene kaj ekskluzive dediĉita al la centjara ekzisto de la Internacia Lingvo, unika socikultura fenomeno en la historio de la homaro, kaj al la rimarkindaj kulturaj valoroj kreitaj en ĝi kaj pere de ĝi." La okazigo de la Jubilea Konferenco en lando, kies neŭtraleco estas internacijure rekonita, estis – denove laŭ liaj propraj vortoj – "plej taŭga por memorigi la 100-jaran ekziston de la neŭtrale-homa Internacia Lingvo".

La Konferenco do estas firme ligita kun la nomo de Ivo Lapenna. Li ne nur faris la festparoladon kaj estis elektita Honora Prezidanto de la Jubilea Konferenco, sed li ankaŭ mem iniciatis kaj organizis la Internacian Honoran Komitaton, kiu

konsistis el nombro da vaste konataj sciencistoj parolantaj la Internacian Lingvon, kaj organizis la altvalorajn fakajn prelegojn en la kadro de la Konferenca temo "100 jaroj de Esperanto-kulturo". Same estis li, kiu havis la ideon pri la Jubilea Monumento "La Espero", solene inaŭgurita dum la Konferenco sur la Esperanto-placo de Graz. Dum la tuta daŭro de la preparaj laboroj li ĉiam donis sian firman kaj senlacan apogon al ĉiuj organizaj paŝoj.

Ĉi tiu libro volas dokumenti ĉiujn gravajn eventojn dum la Jubilea Konferenco per tekstoj kaj ilustraĵoj. Parto jam estas aperinta en la revuo "Horizonto", ekz. la inaŭguraj paroladoj de Prof. D-ro Lapenna kaj resumoj de la prelegoj. Nun ni volas publikigi la tutan materialon kune, precipe ankaŭ la kompletajn tekstojn de la fakaj prelegoj de 11 alte kompetentaj lekciistoj, granda parto el ili membroj de la Akademio de Esperanto. Tiel ni esperas, ke ĉi tiu Memorlibro estos bonvena ne nur al la partoprenintoj de la Jubilea Konferenco - aliĝis ĉ. 250 personoj el trideko da landoj - kiel havinda memoraĵo, sed ankaŭ al ĉiuj, kiuj deziras legi kaj pristudi la 11 fakajn lekciojn, kiuj prilumigis la evoluon de la Esperanto-kulturo en la unuaj 100 jaroj.

Samtempe la libro ankaŭ estas postmorta omaĝo al la neforgesebla personeco de Ivo Lapenna, forpasinta nur malmultajn monatojn post la Konferenco, kiun li mem konsideris la krono en sia agado por Esperanto.

Fondaĵo Ivo Lapenna do volonte submetis sin al la tasko, eldoni ĉi tiujn dokumentojn. Ni esperas, ke la libro - same kiel la Jubilea Esperanto-Konferenco mem - estu kontribuo al la plia disvastigo de la Internacia Lingvo kaj de la idearo de humaneca internaciismo, objekte ligita kun ĝi kaj nun resume esprimita sur la soklo de la Jubilea Monumento en Graz per la vortoj:

"LA ESPERO"
POR MONDA KOMUNIKADO
EN PACO KAJ LIBERO

D-ro Klaus Perko
Prezidanto de Fondaĵo Ivo Lapenna

INTERNACIA HONORA KOMITATO DE LA JUBILEA ESPERANTO-KONFERENCO EN GRAZ

Iniciatinto kaj organizinto: Prof. D-ro Ivo Lapenna, Universitato de Londono

MEMBROJ:

D-ro André Albault (Francio), Prezidanto de la Akademio de Esperanto;

Prof. D-ro Stefanos C. Anagnostakis (Grekio), profesoro pri kriminologio en la Universitatoj de Saloniko kaj Ateno, membro de Akademio Internacia de la Sciencoj en San Marino, Vicprezidanto de Internacia Esperanto-Asocio de Juristoj;

Prof. D-ro Paul Ariste (Soveta Unio), doktoro pri filologio, profesoro en la Tartua Universitato, membro de la Estonia Akademio de Sciencoj, honora membro de la Finnlanda kaj Hungaria Sciencaj Akademioj, doktoro hc. de la Universitatoj de Helsinki, Tampere, Szeged, honora membro de diversaj lingvosciencaj organizaĵoj, membro de Akademio Internacia de la Sciencoj en San Marino, membro de Internacia Scienca Akademio Comenius (Uppsala);

Prof. D-ro Chen Yuan (Ĉinio), Direktoro de la Instituto pri Aplikata Lingvistiko de la Ĉina Akademio de Sociaj Sciencoj en Pekino, membro kaj senatano de Akademio Internacia de la Sciencoj en San Marino, membro de Internacia Scienca Akademio Comenius (Uppsala);

Prof. Lionel Elvin (Britio), em. Direktoro de la Instituto pri Edukado de la Universitato de Londono, antaŭe Direktoro de la Fakoj pri Edukado de Unesko;

Prof. D-ro Helmar C. Frank (FR Germanio), profesoro pri klerigkibernetiko en la Universitato de Paderborn, honora profesoro pri kibernetiko en la Universitato de Berlino, daŭra gastprofesoro de Rosario (Argentino), profesoro pri kibernetiko kaj Prezidanto de Akademio Internacia de Sciencoj en San Marino, membro de Internacia Scienca Akademio Comenius (Uppsala);

Sir Ernest Gouling (Britio), em. juĝisto de la Supera Kortumo de Anglio, Honora Prezidanto de la Brita Branĉo de "International Law Association" (Asocio pri Internacia Juro);

Prof. D-ro Stojan Ĝuĝev (Bulgario), doktoro pri muzikologio (Universitato de Parizo, Sorbonne), profesoro kaj ĉefo de katedro pri muziksciencoj en la Universitato de Sofio, laŭreato de la internacia premio "Johan von Herder" de la Universitato de Vieno, membro de Akademio Internacia de la Sciencoj en San Marino, Vicprezidanto de Internacia Scienca Akademio Comenius (Uppsala);

Prof. D-ro Ottó Haszpra (Hungario), profesoro pri hidromekaniko, Scienca Vicdirektoro de la Instituto pri Akvomastrumado kaj Hidrotekniko en Budapeŝto, Aganta Prezidanto de la Komisiono pri Akvomastrumado de la Hungara Scienca Akademio, membro de Akademio Internacia de la Sciencoj en San Marino, membro de Internacia Scienca Akademio Comenius (Uppsala);

Prof. D-ro C. de Jager (Nederlando), profesoro pri Spacesploro de la Universitato de Utrecht, Ekstera Sekretario de la Reĝa Nederlanda Akademio de Artoj kaj Sciencoj, Prezidanto de la Sekcio Bazaj Sciencoj de la Internacia Akademio pri Astronaŭtiko, membro de Internacia Scienca Akademio Comenius (Uppsala);

Prof. D-ro C. O. Kiselman (Svedio), profesoro pri matematiko en la Universitato de Uppsala, membro de Akademio Internacia de la Sciencoj en San Marino, Ĝenerala Sekretario de Internacia Scienca Akademio Comenius (Uppsala);

Prof. D-ro Paul Edwin Kustaanheimo (Finnlando, Danlando), profesoro pri matematiko en la Inĝeniera Akademio de Danlando, membro de la Akademio de Finnlando, antaŭe profesoro pri aplikata matematiko en la Universitato de Helsinko, antaŭe Direktoro de la Astronomia Observatorio de Helsinko kaj profesoro pri astronomio en la Universitato de Helsinko, membro de la Estraro de Internacia Scienca Akademio Comenius (Uppsala);

Prof. D-ro Ivo Lapenna (Jugoslavio, Britio), doktoro pri juraj sciencoj, doktoro hc. pri internaciaj rilatoj, profesoro pri kompara sovetoj kaj orienteŭropa juro en la Universitato de Londono, antaŭe profesoro pri internacia publika juro kaj internaciaj rilatoj en la Universitato de Zagreb, elektita membro de Jugoslavia Akademio de Sciencoj kaj Artoj, membro de Akademio Internacia de la Sciencoj en San Marino, Vicprezidanto de Internacia Scienca Akademio Comenius (Uppsala), Prezidanto de Internacia Esperanto-Asocio de Juristoj;

Prof. D-ro Geraldo Mattos (Brazilo), membro de Akademio Internacia de la Sciencoj en San Marino;

Prof. D-ro Elio Migliorini (Italio), em. profesoro pri geografio en la Universitato de Romo, membro de "Accademia Nazionale dei Lincei (Nacia Akademio de Linkoj), membro de Akademio Internacia de la Sciencoj en San Marino, membro de Internacia Scienca Akademio Comenius (Uppsala);

Prof. D-ro Setumi Miyamura (Japanio), profesoro ĉe Internacia Instituto de Sismologio kaj Tertrema Inĝenierado sub Ministerio de Konstruado en Tokio, membro de Finna Akademio de Sciencoj (Helsinki), membro de Akademio Internacia de la Sciencoj en San Marino, membro de Internacia Scienca Akademio Comenius (Uppsala);

Prof. D-ro Vladimir Mužić (Jugoslavio), profesoro en la Filozofia Fakultato de la Universitato de Zagreb, antaŭe Dekano de la Filozofia Fakultato kaj Prorektoro de la Universitato de Zagreb, membro kaj senatano de Akademio Internacia de la Sciencoj en San Marino, membro de Internacia Scienca Akademio Comenius (Uppsala);

Prof. D-ro Paul Neergaard (Danlando), estinta Direktoro de la Ŝtata Instituto de Sempatologio por Evolulandoj en Kopenhago, antaŭe profesoro pri plantopatologio kaj sempatologio ĉe Amerika Universitato de Beirut (Libano), membro de Hinda Nacia Scienca Akademio en New Delhi, honora membro de Nacia Akademio de Sciencoj en Allahabad (Hindio), membro de Franca Akademio de Agrikulturo (Parizo), membro kaj senatano de Akademio Internacia de la Sciencoj en San Marino, Prezidanto de Internacia Scienca Akademio Comenius (Uppsala), Vicprezidanto de la Akademio de Esperanto;

Prof. D-ro Inĝ. Oton Pancer (Jugoslavio), inĝeniero de agronomio, doktoro pri agrikultura ekonomiko, em. profesoro pri agrikulturo en la Universitato de Zagreb kaj Sarajevo, antaŭe Direktoro de la Instituto pri Agrikultura Ekonomiko en Zagreb, membro, senatano kaj sekretario de Akademio Internacia de la Sciencoj en San Marino;

Prof. D-ro Vasil Peevski (Bulgario), em. profesoro pri geodezio, antaŭe Rektoro de Nacia Politeknika Altlernejo en Sofio, doktoro hc. de la Altlernejo pri Geodezio, Fotometrio kaj Kartografio en Moskvo, antaŭe Prezidanto, nun Honora Prezidanto de Internacia Federacio de Geodeziistoj, Honora Membro de Astronomia-Geodezia Societo ĉe la Akademio de Sciencoj de Soveta Unio, Honora Membro de la Scientechnikaj Asocioj

KONFERENCA PREZIDANTARO

Dum la Inaŭguro la konferencanoj unuanime elektis janan Konferencan Prezidantaron:

Prof. D-ro Ivo Lapenna (Londono, Britio), Honora Prezidanto,
D-ro Klaus Perko (Graz, Aŭstrio), Prezidanto,
S-ro Jean Thierry (Parizo, Francio), Vicprezidanto,
S-ro Günther Becker (Blieskastel, FR Germanio), Vicprezidanto,
Prof. D-ro Oton Pancer (Zagreb, Jugoslavio), Vicprezidanto,
S-ro Jaakov Liebermann (Ramat-Gan, Israelo), Vicprezidanto,
S-ro Joseph Major (Wellington, Nov-Zelando), Vicprezidanto,
S-ino Marie Thierry (Parizo, Francio), Sekretariino,
S-ino Madeleine de Zilah (Metz, Francio), Sekretariino.

INTERNACIA HONORA KOMITATC *(Daŭrigo)*

de Pollando, GDR, Ĉeĥoslovakio, Hungario, Jugoslavio kaj Bulgario, membro de Akademio Internacia de la Sciencoj en San Marino, membro de Internacia Scienca Akademio Comenius (Uppsala);

Prof. D-ro Fabrizio A. Pennacchietti (Italio), profesoro pri semida filologio en la Universitato de Torino, membro de Akademio Internacia de la Sciencoj en San Marino, membro de Internacia Scienca Akademio Comenius (Uppsala);

Prof. D-ro Božidar Popović (Jugoslavio), doktoro pri matematikaj sciencoj, em. profesoro de la Universitato de Beograd, membro kaj senatano de Akademio Internacia de la Sciencoj en San Marino, membro de Internacia Scienca Akademio Comenius (Uppsala);

Prof. D-ro Juan Regulo Perez (Hispanio), doktoro pri klasika filologio, em. profesoro pri historio de la hispana lingvo, membro-korespondanto de la Reĝa Akademio de la Hispana Lingvo kaj de la Reĝa Akademio de Historio (de Hispanio), membro de Akademio Internacia de la Sciencoj en San Marino, membro de Internacia Scienca Akademio Comenius (Uppsala);

Prof. D-ro Miquel Sancho-Izquierdo (Hispanio), antaŭe Rektoro, nun Honora Rektoro de la Universitato de Zaragoza, membro de la Supera Konsilio de Sciencaj Esploroj.

AŬSTRIA PATRONA KOMITATO

D-ro Josef KRAINER, Landestro de Stirio

S-ro Hans GROSS, Unua Viclandestro de Stirio

Prof. Kurt JUNGWIRTH, Viclandestro de Stirio
(registarano pri kulturaj aferoj)

S-ro Alfred STINGL, Urbestro de Graz

S-ro Erich EDEGGER, Unua Vicurbestro de Graz

Dipl.-Ing. Helmut STROBL, Urba Konsilisto de
Graz (senatano pri kulturaj aferoj)

Prof. D-ro Christian BRÜNNER, Rektoro de la Uni-
versitato de Graz kaj Prezidanto de la Aŭstria
Rektoraro ek de la 1-a de oktobro 1987

Prof. D-ro Rudolf DOMIATY, Rektoro de la Teknika
Universitato de Graz

Prof. D-ro Otto KOLLERITSCH, Rektoro de la Altler-
nejo por Muziko kaj Drama Arto de Graz

Prof. D-ro Wilhelm HOLCZABEK, Rektoro de la Uni-
versitato de Vieno

Prof. D-ro Joachim DALFEN, Rektoro de la Universi-
tato de Salzburg

Prof. D-ro Wolfram KRÖMER, Rektoro de la Universi-
tato Innsbruck

Prof. D-ro Hans DOLINAR, Rektoro de la Universita-
to de Linz

Prof. D-ro Otto HITTMAIR, Prezidanto de la Aŭstria
Akademio de la Sciencoj en Vieno ek de la 1-a
de oktobro 1987

S-ro Alfred STRÖER, Prezidanto de la Aŭstria
Ligo por Homaj Rajtoj

JUBILEA ESPERANTO-KONFERENCO EN GRAZ

Aŭstrio, 18-a - 25-a de julio 1987

100 JAROJ DE ESPERANTO-KULTURO

INAŬGURADO DE LA JUBILEA ESPERANTO-MONUMENTO

Konstanta adreso: D-ro Klaus Perko, Lendkai 111, A-8020 Graz, Aŭstrio. Pĉk. 1257.845

Signo pri la subteno de la Kultura Oficejo de la urbo Graz

GRAZ



PROGRAMO

Konferencejo

Universitato de Graz, Nova Konstruaĵo, Vestiblo kaj
prelegejo B.

Universitata Placo 2, partero

Programeroj

Ĵaŭdon, la 16-an de julio:

- 19-a h. Nepublika Kunsido de la PK de ICNEM kaj Red./
Adm. de **Horizonto** kaj LKK laŭ aparta tagordo
(Hotelo Academia, Untere Schönbrunnngasse 7-11)

Vendredon, la 17-an de julio:

- 19-a h. Daŭrigo de la antaŭtaga kunsido
(Hotelo Academia)

Sabaton, la 18-an de julio:

- 10-a h. Gazetara konferenco (nur por invititoj)
(Hotelo Academia)
- 10-a - 18-a h. Giĉeto malfermita (Konferencejo)
- 15-a - 18-a h. Speciala poŝtoficejo (Konferencejo)

LOKA KONFERENCA KOMITATO

D-ro Klaus PERKO ĝenerala planado, programo, financoj, loĝigo

D-ro Heinz-Paul KOVACIC informado, teknikaj aferoj

Mag. Martin GRITSCH junularaj aferoj, ekskursoj

Karl REINISCH kasistaj aferoj

18-a h. Inaŭguro (Festsalonego de la Universitato, ĉefa konstruaĵo, unua etaĝo) kun jena tagordo:

1. Muzika enkonduko: Festa Marŝo (Stiriaj violonistoj)
2. Malfermo fare de la prezidanto de la LKK, D-ro Klaus Perko
3. Bonvenigaj vortoj de reprezentantoj de la Universitato, de la urbo Graz kaj de la lando Stirio
4. Elekto de la Konferenca Prezidentaro
5. Salutvortoj de la delegitoj de la reprezentitaj landoj
6. Muzika interludo (Stiriaj violonistoj)
7. Festparolado de Prof. D-ro Ivo Lapenna:
ESPERANTO KIEL LINGVA ESPRIMO KAJ INSTRUMENTO
DE HUMANECA INTERNACIISMO
8. Esperanto-himno "La Espero"

20-a h. Interkona vespermangxo
("Mensa" ĉe Studenta Hejmo, SchubertstraÙe 2)

Dimanĉon, la 19-an de julio:

8-a h. Katolika Diservo en Ekumena Spirito (neoficiala)
• (Preĝejo Stiegenkirche, Sporgasse 21 A)

10-a h. Solena Inaŭguro de la Jubilea Esperanto-Monumento
"La Espero" en la ĉeesto de la skulptisto Jesper
Neergaard (Esperanto-Placo) kun jena tagordo:

1. Malfermo fare de D-ro Klaus Perko
2. Mallongaj alparoloj fare de la reprezentantoj de la kvin kontinentoj
3. Malkovro de la monumento fare de la urbestro de Graz kaj de la iniciatinto kun samtempa ludado de la Esperanto-himno "La Espero" (sen kantado)
4. Parolado de la urbestro de Graz, S-ro Alfred Stingl
5. Inaŭgura parolado de Prof. D-ro Ivo Lapenna
6. Transdono de la Jubilea Memordokumento al reprezentanto de Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno
7. Aŭstria nacia himno (ludas la Polica orkestro de Graz)

- 9-a - 18-a h. Giĉeto malfermita (Konferencujo)
- 12-a - 14-a h. Speciala poŝtoŝicejo (Konferencujo)
- 14-a h. Rondveturado tra Graz, vizito al kastelo Eggenberg
- 18-a h. Inaŭguro de la ekspozicio "100 Jaroj de Esperanto-literaturo"
(Angul-salono de Joaneo, Neutorgasse 45)
- 20-a h. Akcepto ĉe la urbestro de Graz

London, la 20-an de julio:

- 9-a - 18-a h. Giĉeto malfermita (Konferencujo)
- 9-a - 12-a h. Speciala poŝtoŝicejo (Konferencujo)
- 9-a h. Lingvokurso (Studenta Hejmo, SchubertstraÙe 2)
Lekcioj: (Konferencujo)
- 9-a h. D-ro A. Albault, Prezidanto de la Akademio de Esperanto:
"100 Jaroj de Evoluo de la Internacia Lingvo (Esperanto)"
- 10-a h. Prof. J. Régulo Pérez (Ak):
"100 Jaroj de Propra Esperanto-Frazeologio"
- 11-a h. C. Gacond (en kunlaboro kun D-ro M. Fresard):
"100 Jaroj de Esperanto-Instruado" (kun lum-bildoj)

- 12-a h. D-rino M. Boulton (Ak):
"100 Jaroj de Originala kaj Traduka Esperanto-Prozo"
- 15-a h. Nepublika komuna kunsido de Akademio de Esperanto, Akademio Internacia de la Sciencoj San Marino, Internacia Scienca Akademio Comenius Uppsala, laŭ aparta tagordo (Konferencujo)
- 16-a h. Solena Publika Kunveno de la tri Akademioj kun jena tagordo:
celoj, strukturoj, laboroj, atingoj (Konferencujo)
- 17-a h. Solena Publika Kunveno de Internacia Esperanto-Asocio de Juristoj (IEAJ) okaze de la 30-jara jubileo de la asocio kun prelego de Prof. D-ro Ivo Lapenna "30 Jaroj de IEAJ en Servo de Juraj Sciencoj kaj Praktiko" (Konferencujo)
- 20-a h. Kantoj kaj Poezio (Salonego Heimatsaal, Paulustorgasse) kun partopreno de la kantoro "Okteto SUHA" el Karintio (Aŭstrio),
Marjorie Boulton kaj Baldur Ragnarsson

Mardon, la 21-an de julio:

- 9-a - 18-a h. Giĉeto malfermita (Konferencujo)
- 9-a - 12-a h. Speciala poŝtoficejo (Konferencujo)
- 9-a h. Lingvokurso (Studenta Hejmo, SchubertstraÙe 2)
Lekcioj (Konferencujo):
- 9-a h. B. Ragnarsson (Ak):
"100 Jaroj de Originala kaj Traduka Esperanto-Poezio"
- 10-a h. Prof. D-ro P. Neergaard, Vicprezidanto de la Akademio de Esperanto:
"100 Jaroj de Esperanto en la Servo de Naturaj Sciencoj"
- 11-a h. D-ro E. de Zilah: "100 Jaroj de Esperanto en la Servo de Sociaj Sciencoj kaj Filozofio"
- 12-a h. Mag. H. Mayer: "Sciencaj Esperanto-Institucioj, Kulturaj Centroj kaj Bibliotekoj"
- 15-a h. Nepublika kunsido de la Akademio de Esperanto laŭ aparta tagordo (Konferencujo)

- 16-a h. Publika kunveno de la Akademio de Esperanto:
prilingvaj demandoj kaj respondoj de Akademianoj
(Konferenceto)
- 19-a h. Akcepto ĉe la landestro de Stirio (kastelo
Eggenberg)

Merkredon, la 22-an de julio:

Tuttagaj ekskursoj:

- A Vieno (kun la vizito al la Internacia
Esperanto-Muzeo)
- B Riegersburg (ekspozicio "Sorĉistinoj kaj
sorĉistoj")
- C Subĉiela Muzeo Stübing, stalaktita groto
"Lurgrotte", monto Schöckl

Ĵaŭdon, la 23-an de julio:

- 9-a - 18-a h. Giĉeto malfermita (Konferenceto)
- 9-a h. Lingvokurso (Studenta Hejmo, SchubertstraÙe 2)
Lekcioj (Konferenceto)
- 9-a h. J. Thierry, Sekretario de la Akademio de
Esperanto:
"100 Jaroj de Esperanto en Servo de Kulturaj
Interŝanĝoj, Praktikaj Celoj kaj Internacia
Solidareco"
- 10-a h. W. Ŝelazny:
"100 Jaroj de Socia Penso en Ligo kun Esperanto"
- 11-a h. Prof. D-ro I. Lapenna (Ak):
"100 Jaroj de Parola Esperanto-Kulturo"
- 15-a h. Publika Kunveno de Akademio Internacia de la
Sciencoj San Marino (Konferenceto)
- 16-a h. Nepublika Kunsido de Internacia Scienca Akademio
Comenius, laŭ aparta tagordo
(Rosen-Hotelo, Liebiggasse 4)
- 16-a h. Kunveno de Monda Federacio de Kulturaj Asocioj
(MFKA) laŭ aparta tagordo (Konferenceto)
- 17-a h. Nepublika kunsido de Internacia Asocio de
Handikapitaj Esperantistoj, IAHE (Studenta
Hejmo, SchubertstraÙe 2)
- 20-a h. Bankedo kaj Balo (Kastelmonta Restoracio)

Vendredon, la 24-an de julio:

- 9-a - 18-a h. Ĝiĉeto malfermita (Konferenceto)
- 9-a h. Lingvokurso (Studenta Hejmo, Schubertstraße 2)
- 9-a - 12-a h. Ĉefkunveno de Internacia Centro de la Neŭtrala Esperanto-Movado, ICNEM (Konferenceto) kun jena tagordo:
1. Malfermo
 2. Raporto de la sekretariino pri la agado en 1986/87
 3. Raporto de la kasisto
 4. Propono de la prezidanto pri la estonta agado de ICNEM kaj nova karaktero de Horizonte
 5. Senŝarĝigo de la PK
 6. Elekto de nova PK (Prof. Lapenna nepre ne akceptos kandidatigon)
 7. Loko, tempo kaj ĉeftemo de la sekvanta Internacia Konferenco de N. E. M.
 8. Eventuale aliaj aferoj laŭ proponoj de la membroj, komunikotaj al la prezidanto plej malfrue la tagon antaŭ la ĉefkunveno
- 15-a - 17-a h. Ĉefkunveno de Internacia Esperanto-Asocio de Juristoj (IEAJ), laŭ aparta tagordo (Konferenceto)
- 20-a h. Teatra Vespero (Salonego Heimatsaal, Paulustorgasse)
Monodramo "Virino kiu Flustris en Uragano" de Spomenka Štimec, ludata de Vida Jerman, Zagreb

Sabaton, la 25-an de julio:

- 10-a h. Ferma Kunveno (Konferenceto) kun jena tagordo:
1. Malfermo
 2. Konferenca Rezolucio
 3. Transdono de faksimiloj de la Memordokumentoj al la kontribuintoj por la starigo de la monumento "La Espero" en Graz
 4. Dankesprimoj
 5. Esperanto-himno "La Espero"



JUBILEA ESPERANTO-KONFERENCO EN GRAZ

Aŭstrio, 18-a - 25-a de julio 1987

100 JAROJ DE ESPERANTO-KULTURO

INAŬGURO DE LA JUBILEA ESPERANTO-MONUMENTO

Konstanta adreso: D-ro Klaus Perko, Lendkai 111, A-8020 Graz, Aŭstrio. Pĉk. 1257.845

Signo pri la subteno de la Kulturo Oficiala de la urbo Graz



REZOLUCIO

La Jubilea Esperanto-Konferenco, kunveninte en Graz (Aŭstrio) de la 18-a ĝis la 25-a de julio 1987 okaze de la Centjariĝo de Esperanto,

- *konstatas*, ke la Konferenco brile sukcesis prezenti la kvintesencon de la 100-jara Esperanto-kulturo, kaj alte aprecas la kontribuojn de la lekciistoj, kiuj kompetente prezentis ĝiajn multifacetajn aspektojn, apogite per la ekspozicio de Esperanto-literaturo aranĝita de la Stiria Nacia Biblioteko;
- *atentigas* la mondon de edukado, scienco kaj kulturo pri grandaj intelektaj valoroj kreitaj per la Lingvo Internacia iniciatita de D-ro L.L. Zamenhof, kaj emfazas, ke la Esperanto-Kulturo estas la sola internacia kaj enhave kaj forme, unika evento en la kultura historio de la homaro;
- *notas*, ke SAT kaj, laste, UEA per sia salutletero, ĝuste pritaksis la gravecon kaj valoron de la Jubilea Esperanto-Konferenco en la spirito de la proponoj de I.C.N.E.M. ekde la jaro 1981, tute speciale konforme al la Rezolucio de la 12-a Internacia Konferenco de N.E.M. en Ateno (1986) pri reciproka apogo;
- *dankas* al la urbo GRAZ pro la starigo de la monumento "La Espero", simbolanta la Zamenhofan humanecan idealon pri monda komunikado per neŭtrala lingvo en paco kaj libero;
- *aparte dankas* al:

Prof. D-ro Ivo Lapenna, iniciatinto de la Konferenco kaj Monumento;

la skulptisto Jesper Neergaard, kiu donacis sian laboron kaj artan inspiron al Esperanto;

la personoj, kiuj malavare finance kontribuis al la starigo de la monumento;

D-ro Klaus Perko kaj al la Loka Konferenca Komitato, kaj al la aliaj aŭstrijaj esperantistoj, kiuj helpis en la organizado de la Konferenco.


Unuanime akceptita en Graz la 25-an de julio 1987 laŭ propono de Jean Thierry en la nomo de la Komisiono pri la Konferenca Rezolucio.

Honora Prezidanto:
Prof. D-ro Ivo Lapenna

Vicprezidantoj: Günther Becker
Jaakov Liebermann
Joseph Major
Prof. D-ro Oton Pancer
Jean Thierry

Prezidanto:
D-ro Klaus Perko

Sekretariinoj/
protokolantinoj:
Marie Thierry
Lena de Zilah



Festparolado de
la Honora Prezidanto
de la Jubilea Konferenco
Prof. D-ro Ivo Lapenna:

"ESPERANTO
KIEL LINGVA ESPRIMO KAJ INSTRUMENTO
DE HUMANECA INTERNACIISMO" *)

Estimataj Sinjorinoj kaj Sinjoroj, karaj Geamikoj,

Mi estus ege malsincera, se mi ne dirus tuj en la komenco, ke mi estas profunde kortuŝita pro via decido elekti min Honora Prezidanto de tiu ĉi Konferenco. Dum 59 jaroj, kio estas konsiderinde pli ol duono de la vivo de Esperanto, mi aktivis por Esperanto laŭ miaj eblecoj, eĉ dum la militaj jaroj, kiam ajn prezentiĝis okazo. Tial via decido elekti min Honora Prezidanto estas por mi la plej granda kompenso kaj rekompenco por mia multjara laboro en la Esperanto-Movado. Same kortuŝita mi estas pro la decido de la Esperanto-Societo en Napoli elekti min dumviva Honora Prezidanto.

Kiel iniciatinto de tiu ĉi Konferenco kaj de la monumento mi havas la plezuron en via nomo kaj en mia persona nomo, nun ankaŭ kiel Honora Prezidanto de la Konferenco, tutkore danki al la landestro kaj la urbestro de Graz, reprezentitaj ĉi tie de la senatano por kulturaj aferoj, inĝeniero Helmut Strobl, pro la grandega helpo financa kaj morala donita al la Konferenco. Pere de la urbestro mi esprimas dankon al la urbo Graz, kiu tiel bele gastigas nin. Dankon ankaŭ al la kolegoj rektoroj de la aŭstria universitatoj kaj al aliaj membroj de la Aŭstria Patrona Komitato, kiel ankaŭ al ĉiuj kolegoj en la Internacia Honora Komitato, kiuj per siaj alte respektataj nomoj en la respektivaj branĉoj de la scienca mondo donis plian stampon de kulturo al nia Jubilea

Konferenco. Fine, sed certe ne laste laŭ la graveco, tutkoran dankon al la Loka Konferenca Komitato kaj tute speciale al nia kara, energia, senlaca, preciza kiel la Westminster horloĝo, Klaus Perko (forta aplaŭdo) pro la perfekta plenumo de la surlokaĵ taskoj.

Mi dankas ankaŭ al la lekciistoj, kiuj prezentos la ĉeftemon de la Konferenco, al la partoprenantoj de diversaj eroj de la programo, kaj al ĉiuj aliaj, kiuj en kiu ajn senco kontribuis al la okazigo kaj - nun mi vidas - al la plena sukceso de la Jubilea Esperanto-Konferenco en Graz. Dankon ankoraŭfoje al ili ĉiuj! (Forta aplaŭdo).

En sia parolado al la Unua Esperanto-Kongreso en Bulonjo-ĉe-Marzo Zamenhof interalie diris:

"Ni konsciu bone la tutan gravecon de la hodiaŭa tago, ĉar hodiaŭ inter la gastamaj muroj de Bulonjo-sur-Marzo kunvenis ne francoj kun angloj, ne rusoj kun poloj, sed homoj kun homoj".

Tiuj kelkaj vortoj enhavas la kvintesencon de tiu absolute ĝusta koncepto, kiun D-ro Zamenhof nomis la "interna ideo" de Esperanto, bedaŭrinde - mi akcentas kaj forte akcentas bedaŭrinde - ege neadekvate, ĉar la ideoj - historie kaj socie grandparte kondiĉitaj - ne troviĝas en lingvoj, sed en la homaj cerboj, kaj nur eksteren esprimiĝas per la lingvoj. Tute speciale tiu esprimo estas maltaŭga, kiam ĝi aperas en nacilingvaj tradukoj. Mi ripetas: la ideoj estas en la cerboj de la homoj kaj ne en la lingvoj. Tial, pro la neadekvateco de la esprimo "interna ideo" ni nomas la saman koncepton humaneca internaciismo.

Kio, do, estas humaneca internaciismo? Ĝi konsistas el du elementoj: humaneco kaj internaciismo.

Humaneco estas rilatado al homo kiel al homo, rilatado al homo kiel al sia egalulo, respekto de la homa digno, respekto, hodiaŭ, de la homaj rajtoj kaj fundamentaj liberecoj entenataj en la Universala Deklaracio de la Homaj Rajtoj. Tio estas toleremo, tio estas komprenemo. Ĝi estas tio, kion Zamenhof nomis "interna ideo", kaj kion ni nomas humaneca internaciismo.

La dua elemento, internaciismo, signifas, ke tiu plej nobla humaneco ne rilatas sole al fermitaj sociaj entoj, eĉ se tre grandaj, ekzemple la nacioj, sed mondvaste, al la tuta homaro. La humaneca internaciismo estas nek religia, nek burĝa, nek

socialisma, nek proleta, nek kia ajn alia, sed tuthoma, tial la plej pura internaciismo senigita de kia ajn klasa, religia aŭ alispeca karaktero.

Tiom por montri la absolutan identecon de la koncepto entenata en la science neadekvata esprimo "interna ideo" kaj la humaneca internaciismo.

II

Nun ni vidu, ĉu la humaneca internaciismo estas objekte ligita al Esperanto.

Se ni ĵetas eĉ nur supraĵan rigardon al kiu ajn lingvo en la tuta longa historio de la homaro, ekde la tempo kiam la homo komencis eliĝi el la animala mondo, ni vidas, ke ĉiam sociaj grupoj kun propraj identecoj, tute egale kiel ili nomiĝis, kreis al si siajn lingvojn, kiuj servis por interna komunikado, kaj la koncernaj lingvoj samtempe efikis kulture, solidarige en rilato al siaj sociaj portantoj. Tio koncernas la tribojn, kiuj havis siajn tribajn lingvojn; la hordojn, kiuj havis la hordajn lingvojn; la kastojn, kiuj havis siajn kastajn lingvojn, kia estis la sanskrito en antikva Hindio; la klasajn lingvojn, kia estis la latina en la mezepoka feŭdisma Eŭropo. Kaj la samo rilatas al la naciaj lingvoj, kiuj ekestis en difinitaj historiaj kondiĉoj, kaŭzitaj de la materia evoluo de la homaro, kaŭzitaj de la novaj metodoj de produktado, de la teknologia progreso, precipe en la urboj de Eŭropo. Tiel formiĝis la nacioj, kiuj samtempe kreis siajn naciajn literaturajn lingvojn.

La ligo inter lingvo kaj socio estas nedisigebla, kaj neniu lingvisto aŭ sociologo povas kontesti ĝin. Sekve, la ekesto, evoluo kaj malapero de lingvoj dependas ekskluzive de la ekesto, evoluo kaj malapero de la respektivaj sociaj unuoj aŭ entoj tra la tuta longa homara historio. Kaj tiu ekesto-evoluo-malapero estas kondiĉita de la evoluo de la materiaj fortoj kaj de la novaj ideoj, kiujn ili estigas.

La samaj materiaj fortoj, kiuj kaŭzis la ekeston de la nacioj kaj de la naciaj literaturaj lingvoj, kaŭzis ankaŭ la ekeston de la Internacia Lingvo. Kiel vi scias, malaperis la latina kaj sentiĝis ĉiam pli granda bezono pri lingvo por internacia komunikado. La spektakla evoluo de la teknikaj rimedoj de komunikado ebligis kreskantajn internaciajn kontaktojn, kio siavice naskis internaciismajn ideojn kaj sentojn kontraste al la naciismaj. Tiele, jam meze de la 19-a jarcento videblis du tendencoj: unu forta, naciisma, degenerinta poste en ekstreman, agresan imperialismon; la alia, ankoraŭ malforta, internaciisma, neniel

ekskludanta sanan naciismon aŭ patriotismon por uzi zamenhofan esprimon en unu el liaj konataj paroladoj. Marx kaj Engels notis la ekziston de burĝa internaciismo, al kiu ili kontraŭstarigis la proletan internaciismon. Preter tiuj klasaj internaciismoj paralele komencis formiĝadi tutsimple internaciismo tuthoma, do, pura internaciismo tre vasta, ĉar senigita de kia ajn aparta karaktero.

Aliflanke, pro la rapide intensiĝantaj ĉiaspecaj internaciaj rilatoj kreiĝis abunda internacikaraktera leksika materialo. Tiu lingva internaciiga procezo nuntempe atingis tiajn dimensiojn, ke la plimulto de la naciaj lingvoj plu evoluas ĉefe internacie el leksika vidpunkto.

Kiam, do, Zamenhof, instigita de la konataj cirkonstancoj en Bjalistoko, iniciatis sian projekton de internacia lingvo, jam ekzistis internaciismaj humanecaj tendencoj, al kiuj mankis lingva esprimo unuflanke, kaj jam ekzistis ankaŭ abunda internaciiginta lingvomaterialo, al kiu mankis konkreta lingva formo, aliflanke. Zamenhof genie kunligis la du kaj per sia lingvoprojekto de 1887 donis al humaneca internaciismo lingvan esprimon. Ĝuste tiu nedisigebla kunligiteco kaŭzis, ke tre baldaŭ la lingvoprojekto transformiĝis en vivantan, maksimume internacian lingvon - la solan vere internacian kaj vere lingvon - de vivanta internacia lingva komunaro. La kunligiteco de la humaneca internaciismo kaj Esperanto ne estas afero de persona prefero. Ne temas pri tio, ĉu per levado de la manoj ni algluos al Esperanto la "internan ideon" de Zamenhof aŭ la humanecan internaciismon, kio koncepte estas la samo, sed pri tio, ke objekte, science korekte kaj pruvite, la Internacia Lingvo estas nedisigeble ligita al humaneca internaciismo, same kiel la naciaj lingvoj estas nedisigeble ligitaj al naciismo. Se ne estus tiel, la lingva problemo en la mondo tute ne ekzistus.

Siavice, la Internacia Lingvo, nia Esperanto, efikas kuntene, solidarige en rilato al la internacia komunaro uzanta ĝin, kaj necese fortikigas la humanecan internaciismon same tiel, kiel - mi ripetas - la naciaj lingvoj aŭ kiu ajn alia lingvo efikas kuntene, solidarige en rilato al siaj portantoj. Tio estas la rolo de Esperanto kiel instrumento de humaneca internaciismo.

Kiel vi scias, en la historio de la Esperanto-Movado okazis kaj plu okazas provo senigi Esperanton de kia ajn idea aspekto. Tio okazis en hitlera Germanio, kiam la gvidantoj, ne ĉiuj, de la tiea Esperanto-Asocio esperis savi Esperanton flatante al Hitler per senideigo de Esperanto kaj meto de nia lingvo en la servon de naziismo. Tio okazis ankaŭ en stalinisma Soveta Unio, kiam la

gvidantoj de la sovetia esperantistaro klopodis meti Esperanton en la servon de stalinismo. La sola rezulto estis, ke pluraj el ili estis ekzekutitaj, dum miloj da aliaj esperantistoj estis senditaj en koncentrejojn, kie multaj mortis en kruelaj cirkonstancoj. La provoj senigi Esperanton de kia ajn idea aspekto okazadis ankaŭ aliloke kaj plu okazas nuntempe.

Mi estas absolute certa, ke, malgraŭ tiuj politike motivitaj provoj, la grandega plimulto de la esperantistaro en Pollando, GDR, Bulgario, Soveta Unio, Ĉinio, same kiel ĉi tie en Okcidenta Eŭropo kaj sur la aliaj kontinentoj, estas emocie inspirita de la "interna ideo" aŭ de humaneca internaciismo, kvankam eble multaj ne plene kaptas la science ĝustan rilaton inter lingvo kaj socio, inter Esperanto kaj humaneca internaciismo. Mi fidas, ke preskaŭ ĉiuj el la kvin aŭ ses miloj, kiuj kunvenos en Varsovio la sekvantan semajnon, havos la samajn pensojn kaj sentojn, kiajn ni havas ĉi tie.

Ĉar mi menciis Varsovion, mi diru, ke el la multaj salutoj, kiujn ni ricevis, pleje ĝojigis min la salutoj de Universala Esperanto-Asocio kaj de Sennacieca Asocio Tutmonda. Dum plenaj ses jaroj mi pledis per ĉiuj miaj fortoj por komunaj agadoj en la Jubilea Jaro en la intereso de Esperanto. Kiam ĉiuj niaj tiurilataj klopodoj restis senrezultaj, la Internacia Konferenco de la Neŭtrala Esperanto-Movado, okazinta la pasintan jaron en Ateno, proponis almenaŭ interkonsenton pri reciproka subteno. La letero, kiun S-ro Fettes, la nuna redaktoro de la revuo "Esperanto" - mi aparte salutas lin ĉi tie - tralegis al ni, estas konforma al tiu propono kaj verŝajne ni ĉiuj estas kontentaj, ke en tiu ĉi tute lasta momento realiĝis almenaŭ tia modesta signo de apogo. Espereble vi konsentos, ke de tiu ĉi Konferenco ni sendu reciprokajn salutojn al la Universala Kongreso de UEA en Varsovio kaj al la Jubilea Kongreso de SAT en Bulonjo-ĉe-Mar. (Forta aplaŭdo).

Mi deziras fini per vortoj similaj al tiuj de Zamenhof, kiujn mi citis en la komenco:

Ni konsciu, geamikoj, pri la tuta graveco de tiu ĉi Jaro, ĉar en tiu ĉi Jubilea Jaro kompletiĝas jarcento, dum kiu la lingvoprojekto de D-ro Zamenhof transformiĝis en vivantan, nuancitan, plensukan Internacian Lingvon de mondvasta internacia kolektivo. Tio okazis kontraŭe al teorumadoj de lingvistoj, antaŭjuĝoj kaj superstiĉoj de multaj aliaj; malgraŭ malpermesoj, persekutoj, eĉ murdadoj de Esperanto-parolantoj; malgraŭ la du mondmilitoj, malebligadoj de internacia komunikado per dekretoj, cenzuradoj, konfiskadoj

FONDAĴO IVO LAPENNA

Celo: Subvenciadi el la interezoj de la kapitalo publikaĵojn konformajn al humaneca internaciismo kaj aktiva neŭtraleco - la linio de Ivo Lapenna kaj L.L. Zamenhof.

La Estraro elektita en Graz 1987:

Prezidanto: D-ro Klaus Perko, Lendkai 111, A-8020 Graz, Aŭstrio;

Vicprezidanto: S-ino Birthe Lapenna, 77, Grasmere Avenue, Wembley, HA9 8TF Middlesex, Britio;

Vicprezidanto: S-ro Jean Thierry, 5 rue Léon Cogniet, F-75017 Paris, Francio;

Sekretario-kasisto: S-ro Peter Zacho, Nørregårdsvej 91, DK-2610 Rødovre, Kopenhago, Danio.

Ĉiujn kontribuaĵojn bv. sendi al unu el la estraranoj aŭ prefere al la sekretario-kasisto, pĉk. Kobenhavn 1 19 06 01.

Festparolado (*Daŭrigo*)

kaj multaj aliaj obstakloj, inkluzive detruadon de valoregaj atingoj fare de la esperantistoj mem interne de la Esperanto-Movado. En tiaj cirkonstancoj la transformiĝo ricevas eĉ pli grandan signifon: ĝi estas unika evento en la kultura historio de la homaro, evento, kiu vaste transpasas la limojn de la relative malgranda rondo de esperantistoj, kaj interesas, aŭ almenaŭ devus interesi, la tutan kulturan mondon.

Ĝuste tion celas emfazi nia Jubilea Konferenco. Ĝi riĉigu niajn sciojn kaj donu al ni multe da ĝojo! Ĝi eĉu pozitive ne nur en Aŭstrio kaj en la najbaraj landoj, sed vaste en la mondo! Ĝi kontribuu al plua, multe pli grandskala disvastiĝo de la Internacia Lingvo en la dua jarcento de ĝia vivo, kio samtempe signifos pluan fortikigon de la humaneca internaciismo en la intereso de ĉiuj individuoj, de ĉiuj popoloj, de ĉiuj nacioj, de la tuta homaro! (Fortega kaj tre longa aplaŭdo).

*) Teksto bazita sur la Festparolado eldirita de Prof. D-ro Ivo Lapenna la 18-an de julio 1987 al la Jubilea Esperanto-Konferenco en Graz.

SALUTOJ DE UEA KAJ SAT

AL LA JUBILEA KONFERENCO

S-ro Mark Fettes, la nuna redaktoro de la revuo "Esperanto", kiu ĉeestis la inaŭguron de la Konferenco la 18-an de julio kaj la malkovron de la monumento "La Espero" la 19-an de julio, voĉlegis jenan mesaĝon de UEA:

"La Jubilea Esperanto-Konferenco, per sia altnivela kultura programo, digne kontribuos al la tutmonda festado de la jubileo de Esperanto. Samtempe, per dediĉo de la skulptaĵo 'La Espero' de Jesper Neergaard, la konferencanoj memorigos nin porĉiame pri la brilaj atingoj de Esperanto dum ties unua jarcento kaj la perspektivoj de paca kaj interkomprenanta mondo, kiun ĝi prezentas en la dua. Por krei tiun pacan mondon, ni devas komenci la laboron en niaj propraj rondoj, per kunlaboro por nia komuna intereso en spirito de komprenemo kaj respekto. Universala Esperanto-Asocio, rigardante al la gravaj taskoj, kiuj staras antaŭ la Esperanto-movado en la dua jarcento de la ekzisto de tiu genia verko, kore salutas la organizantojn kaj partoprenantojn de la Jubilea Konferenco kaj deziras al la konferenco plenan sukceson.

Humphrey Tonkin, Prezidanto"

La mesaĝo de UEA ricevis fortan aprobon. Laŭ la propono de la Honora Prezidanto de la Konferenco en lia Inaŭgura Parolado, la Konferenco per aplaŭdo decidis reciproki la salutojn kaj bondezirojn. La koncerna telegramo, sendita al la UK de UEA en Varsovio, tekstas:

"Jubilea Esperanto-Konferenco dankas kaj reciprokas salutojn kaj bondezirojn emfazante gravecon de paco en libero.

Ivo Lapenna, Honora Prezidanto
Klaus Perko, Prezidanto"

En la Salutletero de SAT de 02.07.1987 estas, interalie, dirite:

"Preter la interasociaj malfacilaĵoj, kiujn devas superregi la esperantistaj organizaĵoj, ni montru al la publika opinio, ke nia sennacieca lingvo estas unu el la plej efikaj iloj de internacia kompreniĝo.

Tiusence ni sincere pensas, ke la Jubilea Esperanto-Konferenco en Graz, iniciatita de ICNEM, estas unu el la plej elstaraj manifestacioj de la Jubileo, kaj ni deziras al ĝi la plej grandan sukceson.

Por la Plenum-Komitato de SAT
Yves Peyraut, Prezidanto".

En sia letero de 25.07.1987 al la 60-a Kongreso de SAT en Bulonjo-ĉe-Maró la Honora Prezidanto de la Jubilea Esperanto-Konferenco skribis interalie:

"La Jubilea Esperanto-Konferenco en Graz, al kiu ni legis la salutleteron de SAT de 02.07.1987, komisiis min tutkore danki kaj plej varme reciproki la salutojn kaj bondezirojn. Mi ĝojas informi vin, ke la letero ricevis varman aplaŭdon. Al la salutoj kaj bondeziroj de la Konferenco por plena sukceso de via 60-a Kongreso mi aldonas la salutojn de ICNEM kaj miajn proprajn.

Ni estas certaj, ke ankaŭ via Jubilea Kongreso estos unu el la plej elstaraj manifestacioj en la Jubilea Jaro kaj ke ĝi pozitive eĥos en la laboristaj medioj kaj inter ĉiuj socie progresemaĵoj homoj.

Sincere via,
Prof. D-ro Ivo Lapenna
Honora Prezidanto de la JEK,
Prezidanto de ICNEM".

Prof. D-ro Ivo Lapenna:

Parolado okaze de la Inaŭguro
de la Monumento LA ESPERO
sur la Esperanto-Placo

POR MONDA KOMUNIKADO EN PACO KAJ LIBERO



En la hieraŭa inaŭgura parolado mi diris kelkajn vortojn pri la humaneca internaciismo, kiu estas nenio alia ol tiu idealo, kiun Zamenhof, iom neadekvate, nomis "interna ideo" de Esperanto.

Tiu ĉi belega skulptaĵo de la fama dana skulptisto Jesper Neergaard, filo de nia atestimata vicprezidanto de la Akademio de Esperanto, Prof. D-ro Paul Neergaard, esprimas absolute la saman ideon. Ĝiaj harmoniaj linioj simbolas la esperon je kunvivado de ĉiuj rasoj, nacioj, religiaj komunaj kaj aliaj sociaj etnoj en justeco kaj egaleco. Al Jesper Neergaard, kiu donacis siajn laboron kaj artan inspiron al Esperanto, mi esprimas tutkoran dankon (aplaŭdo).

Eble interesas vin sciigi kiel ekestis la ideo pri tiu monumento. Antaŭ ĉ. tri jaroj okazis, ke en la hejmo de Birthe Zacho (poste S-ino Birthe Lapenna - red.) ni havis kunveneton kun Jesper Neergaard, dum kiu li montris al ni modelojn kaj fotojn de diversaj siaj skulptaĵoj. Kiam mi vidis tiun, kiu nun estas la monumento, mi spontane diris: "Tio estas 'La Espero'". Jesper Neergaard tuj konsentis kaj akceptis la nomon. Tiam mi sugestis, ke estus bone dediĉi tiun skulptaĵon kiel monumenton al Esperanto kaj Jesper Neergaard akceptis ankaŭ tiun ideon. Tiel ni fine decidis starigi la monumenton en la Jubilea Jaro. Mi utiligas ankaŭ tiun ĉi okazon por danki al ĉiuj, kiuj kontribuis finance por tiu celo, tute speciale al la urbo Graz pro ĝia malavara helpo (aplaŭdo).

La ideon, kiun simbolas la monumento, kompletigas la teksto: "La Espero" por monda komunikado en paco kaj libero. Tiu konciza frazo diras multege. Esperanto ja solvas la problemon de monda lingva komunikado en egaleco kaj justeco. Sed vane ni havas eĉ la plej perfektan instrumenton de tia komunikado, se diversaj politikaj obstakloj malebligas ĝin. Kian sencon havas eĉ la plej perfekta instrumento de lingva komunikado, se konfiskado de Esperanto-periodaĵoj, konfiskado de Esperanto-literaturo, cenzurado, malpermesado al homoj veturi de lando al lando malebligas mondvastajn internaciajn kontaktojn? Ne sufiĉas nur perfekta lingvo - kaj mi asertas, ke Esperanto estas pli perfekta ol kiu ajn nacia lingvo, se, kompreneble, oni regas ĝin - sed necesas ankaŭ foresto de politikaj obstakloj al komunikado.

La dua parto tekstas: paco en libero. Multe oni parolas pri paco. Ĉie en la mondo okazas konferencoj pri paco. Amasaj organizaĵoj parolas kaj skribas pri paco. Ankaŭ en la Esperanto-Movado ĉie oni aŭdas pri paco, sed malmulte oni aŭdas pri libero. Nur en la sendependa Esperanto-Movado ni ĉiam akcentas ankaŭ la liberecon. Eĉ en la hieraŭa letero de UEA, kiun mi alte aprezas - ankoraŭfoje mi akcentas tion - oni parolas pri paco, sed oni ne parolas pri libereco.

Laŭ mia opinio, la du plej grandaj valoroj de la homa vivo estas paco kaj libero (aplaŭdo). Ili ne kontraŭas unu la alian. Male, ili kompletigas sin reciproke. Ne povas esti daŭra, sincera, vera paco ĉie en la mondo, se tiu paco ne estas konstruita sur libero. Kaj mi sincere diras al vi ĉi tie: se ni estas starigitaj antaŭ la alternativon aŭ paco aŭ libero, tiam mi garantias al vi, ke almenaŭ mi mem elektos liberon, ĉar mi preferas militon ol rezigni pri mia libereco (fortega aplaŭdo). Tamen, kiel mi diris, ne ekzistas antagonismo inter paco kaj libero: ili kompletigas unu la alian. La vortoj sur la soklo de la monumento diras precize tion: "'LA ESPERO' POR MONDA KOMUNIKADO EN PACO KAJ LIBERO". Ni neniam forgesu tiun lastan vorton: libero.

Ankaŭ nia Esperanto, lingva instrumento de monda komunikado, ligita al humaneca internaciismo, ne povas doni siajn pozitivajn efikojn, se ne ekzistas kaj paco kaj libero.

Tial, tiu ĉi monumento kaj per siaj harmoniaj linioj kaj per la vortoj sur la soklo esprimas la idealon de la Esperanto-Movado en la intereso - mi ripetas - de ĉiuj unuopuloj, de ĉiuj popoloj, de ĉiuj nacioj, de la tuta homaro (tre forta aplaŭdo).

1887 - 1987

CENTJARA DATREVENO DE LA INTERNACIA LINGVO

MEMORDOKUMENTO

pri la starigo de "LA ESPERO" de JESPER NEERGAARD el Danlando sur ESPERANTO-PLACO en GRAZ la 19-an de julio 1987 dum la JUBILEA ESPERANTO-KONFERENCO, monumento dediĉita al la INTERNACIA LINGVO laŭ iniciato de IVO LAPENNA el Jugoslavio/Britio kun apogo de la INTERNACIA CENTRO de la NEŬTRALA ESPERANTO-MOVADO (ICNEM) kaj kun financa helpo donita de la Urbo Graz kaj de

Albault André, Francio; Alexander E., Kanado; Angeletti Alessandro, Italio; Becker Günther, Germanio; Becker Meisberger Maria, Germanio; Bentzen Finn, Danio; Boulton Marjorie (Oksforda kaj Distrikta Esperanto-Societo), Britio; Brownlee John, Britio; Dabozies Henri, Francio; Dargue Cathy, Britio; Devis Rafaelo (Fervojista Grupo de Barcelono), Hispanio; Duncan Marjorie, Aŭstralio; Eggers Ellen, Germanio; Elvin Lionel, Britio; Ernst Elfriede, Belgio; Esperanto-Societo de Heleninoj, Grekio; Favre A., Francio; Pettes G., Irlando; Fraikin C., Francio; Frank Helmar, Germanio; Geroldinger, Aŭstrio; Goralski Adamo, Pollando-Hispanio; Goralski Kristina, Hispanio; Graz (Subvencio de la Urbo), Aŭstrio; Groth Mogens, Danio; Hackett W.D.B., Kanado; Hansen Aa.E., Rosengard, Danio; Holmes Nora (por si kaj memore al sia edzo Harry), Britio; Kisselman C.O., Svedio; Koivu Sirkku, Finnlando; Kolektitaj rememore al la belega vespero aranĝita de la "Esperanto-Societo de Heleninoj" omaĝe al la 12-a IK de N.E.M. en Ateno, Grekio; Kopenhaga Horizonto-Grupo (Gaborit Pierre, Thune Lis, Zacho Birthe L., Zacho Peter, Zacho Riel), Danio; Laborista Esperanto-Klubo, Danio; Lapenna Ivo, Britio; Larsen Betty, Danio; Larsen Bo, Danio; Larsen Jens Stengaard, Danio; Lehtinen Meri, Finnlando; Lemonnier Germaine, Francio; Liventhal Nicolai, Danio; Londona Esperanto-Klubo, Britio; Luez Daniel, Francio; Martens Mia, Nederlando; Maynar Maria Pi (familia nomo Chuchij), Hispanio; MFKA Metz, Francio; Miles (Colleagues of), Britio; Mingo Enrico (Napola Esperanto-Grupo "Harmonio kaj Progreso"), Italio; Moerbeek R., Nederlando; Mouglin Hervé, Francio; Müller Marianne, Francio; Müller Irmgard, Germanio; Neergaard Paul, Danio; Nisbet S., Britio; Orlange Pierre, Francio; Pancer Olton, Jugoslavio; Parson Elsie (heredaĵo), Britio; Pennacchietti F., Italio; Perko Klaus, Aŭstrio; Persson Gusta, Svedio; Persson Lennart, Svedio; Plantiveau Huguette, Francio; Popović Bojidar, Jugoslavio; Reinders-Bartels M.W.N., Nederlando; Rispal Antoine, Francio; Rotterdamas ŝamenhofa Vespero 1985, Nederlando; Rukavina Danon Káthe, Germanio; Sachs R., Germanio; Sakellaropoulou Adda, Grekio; Schneider Gerard, Francio; Schütt Hans, Germanio; Sennacieca Asocio Tutmonda (S.A.T.), Francio; Sidorov J., Kanado; Sidorov Nada, Kanado; Societo de Aŭstria Esperanto-Instruistoj, Aŭstrio; Somogyi J.L.F., Aŭstralio; Spruch Christa, Germanio; Steele John, Britio; Stöcklinir Johann, Aŭstrio; Ströder Alfred (Aŭstria Sindikata Ligo), Aŭstrio; Taskinen Elii, Finnlando; Terwisga Petrus H. van, Nederlando; Thierry Jean, Francio; Thierry Marie, Francio; Tholen Els Kervers van, Nederlando; Tortel Jean Luc, Francio; Tounton Hervey, Germanio; Tressandans Loys Jacqueline, Francio; Vermaas Marianne, Nederlando; Veron Gaston, Francio; Waringhien Gaston, Francio; Zilah Eugène de, Francio; Zilah Madeleine de, Francio; Zinglensen E. (Sam), Danio; Zidanik Jospina, Jugoslavio.

Alfred Stingl
Urbestro

Prof. Dr. Ivo Lapenna
Iniciatinto

EKSPOZICIO

"100 JAROJ DE ESPERANTO-LITERATURO" de la Stiria Landa Biblioteko

El la katalogo:

ENKONDUKAJ VORTOJ

Ĉu estas hazardo, ke ĝuste en pramalnova lando inter potencegaj lingvoteritorioj en la koro de Pollando - kiu eldonis oficialajn dokumentojn ĝis en la 19-a jarcento ankoraŭ en la latina lingvo -, eksterordinara oftalmologo, D-ro Ludoviko Lazaro Zamenhof, sub la pseŭdonimo D-ro Esperanto per sia libro "Internacia Lingvo" iniciatis novan lingvon, kiu nun travivas sian centan naskiĝtagon?

La amikoj de tiu nova lingvo elektis verdan stelon kun kvin pintoj kiel simbolon por sia provo, lingve unuigi la homaron de la kvin kontinentoj. En la vorto "Esperanto" troviĝas la nocio "espero". Temas pri la espero por pli bona komunikado inter homoj diverslingvaj kaj per tio la espero por malpli da perforto kaj pli da paco inter la popoloj.

Stirio jam de ĉiam estis bona medio por tiu pacmovado kaj ĝiaj ideoj. Mi gratulas al ĝi okaze de la 100-jara jubileo kaj deziras al la ekspozicio en la Angula Salonego de Joaneo multajn interesitajn vizitantojn.

Prof. Kurt Jungwirth
Viclandestro

Registarano pri kulturaj aferoj de la Stiria Landa Registaro

ANTAŬPAROLO

Per ĉi tiu Esperanto-ekspozicio la Stiria Landa Biblioteko, kiu ek de sia fondiĝo - okazinta en 1811 kune kun la Landa Muzeo Joaneo - prezentas esencan elementon en la kultura vivo de la lando, daŭrigas bonan tradicion. Ĉar jam en 1949 Efektiva Kortega Konsilisto D-ro Karl Friedl dediĉis al la Internacia Lingvo multe atentatan ekspozicion en la ejoj de la Biblioteko, kiun oni montris poste ankaŭ en Knittelfeld.

Lekcioj en la kadro de la Konferenca temo "100 JAROJ DE ESPERANTO-KULTURO"

Ni publikigas ĉi tie la tekstojn de la fakaj prelegoj, kiel ili estis faritaj dum la Jubilea Konferenco, resp. la manuskriptojn de tiuj invitetaj aŭtoroj, kiuj estis malhelpitaj veni persone al Graz kaj tial sendis al ni siajn tekstojn.

Ni afable atentigas, ke ĉiuj tekstoj esprimas la opiniojn kaj prijuĝojn de la respektivaj aŭtoroj, - sed ne en ĉiu kazo - tiujn de Fondaĵo Ivo Lapenna. Per la publikigo ni deziras dokumenti la prelegojn kaj tiel faciligi pliajn pristudojn kaj diskutadojn.

La lekciojn vi trovas sur la sekvantaj paĝoj. -Red.

El la katalogo: Antaŭparolo *(Daŭrigo)*

D-ro Friedl laboris ek de 1929 en la Landa Biblioteko kaj estas rigardata kiel grava Esperanto-pioniro de Graz. Li zorgis por la kolekto de riĉa trezoro de koncerna literaturo, kiu ĝis nun estis konstante kompletigita. Tial la plej granda parto de la montrataj libroj devenas el la posedo de la domo mem.

Multaj libroj kaj objektoj estis disponigitaj de la Internacia Esperanto-Muzeo ĉe la Aŭstria Nacia Biblioteko. Pro tio ni sincere dankas al Ĝenerala Direktoro D-rino Magda Strebl, Oficeja Konsilisto Herbert März kaj Mag. Herbert Mayer.

Specialan kontribuon al la sukcesigo donis la Esperanto-Societo "Unueco" Graz. Ni dankas pro tio al universitata lektoro D-ro Klaus Perko kaj al universitata docento D-ro Heinz Paul Kovacic.

Koran dankon mi diras al miaj spertaj kunlaborantoj, s-ino Brigitta Kaltenegger, s-ro Eduard Erbida, s-ro Johann Pall kaj s-ro Peter Nestl kaj s-ro Alfred Bierbaum.

D-ro Hannes Lambauer
Supera Biblioteka Konsilisto

D-ro André Albault:

Prezidanto de la Akademio
de Esperanto



CENT JAROJ DE EVOLUO DE LA INTERNACIA LINGVO ESPERANTO

Ĉio evoluas! Kaj la infaneto, kiu ploris en sia lulilo, jam iĝas granda knabo ludanta per siaj globetoj; kaj jen li jam estas serioza teknikisto, kiun ŝatas la koketaj koleginoj.

Ĉio evoluas! Kaj la arbido, kiun vi preskaŭ frakasis per piedpremo, kreskis al juna kverko; morgaŭ la uragano taŭzos la rametojn kaj branĉetojn de ĝia kulmino, sed neniel kapablos renversi ĝin, antaŭ ol ĝin mortatakas malsano aŭ termitoj.

Ĉio evoluas! Kaj la rivero, en kies buklo vi senzorge hieraŭ banis, tiel forte kaj obstine trambis la ŝajne eternan krutan bordon, ke ĉi tiu dissaltis lasante la akvojn impete flui antaŭen; sablo plenigis la buklon kaj forigis viajn memoraĵojn.

Indo, la "Fluanto" laŭ la Sanskrita etimo, naskiĝas kiel banala rivero kaj lante defluas de l' Tibetaj altoplahoj sed tratorentas Kaŝmiron en stretaj kaj profundaj faŭkoj; poste ĝi iĝas saĝa kaj kiel majesta fluvego akvas la ebenaĵojn de Panĝabo kaj Sindo; laca, ĝi serene enfluas la Oman-maron laŭ vasta delto. Ifoje ĝi koleriĝas kaj estigas katastrofajn inundojn tra tuta Pakistano.

Ĉiuj lingvoj fluas laŭ bilde tre similaj manieroj: ili povas jen rapide jen lante flui, subite inundiĝi pro invado de multaj fremdaĵoj, poste retrovi internan unuecon sur nova, pli riĉa bazo. Anstataŭ leĝoj fizikaj kaj hidraŭlikaj, ili ja obeas sociajn, psikologiajn kaj lingvistikajn leĝojn. Neniu estu dupa pro tiuj bildigaj komparaĵoj!

post la forpelo el Palestino, dissemiĝis preskaŭ sur la tuta Tero. Sed ilin plu kuntenis potencaj ligoj de komuna fido kaj kulturo. Ili estis unu kaj poste dissemiĝis.

Sed la Esperantistoj tra l' kanalo de unu komuna lingvo naskiĝis al la internacia vivo en ĉiuj kaj ĉiaj punktoj de nia terglobo, en ĉiuj kaj ĉiaj sferoj de la homa aktivado: ili plu naskiĝas kaj naskiĝos. Ili, ĉiu por si kaj en sia angulo, fokusigis siajn pensojn pri unueco sur tiun komunan lingvon; ili sentis ĝin sia, ili plu flegis kaj ĝin forĝis unisone kun la plej bonaj inter si: literatoroj, ĵurnalistoj, oratoroj, poetoj, sciencistoj. Unue disaj, ili poste unuiĝis; ili sentas sin mem kvazaŭ kataliziloj en granda alĥemia fermentado, kiu iam onte naskos la Homaran unuecon.

Ili ankoraŭ estas nura manpleno. Ĉirkaŭ tiuj eminentaj gravitas multaj scivolemaj kaj bonvolemaj, kiuj restas kelkajn jarojn, turniĝas kaj returniĝas iomete ĉien kaj senrevene foriras. Okazas ja konstanta renoviĝo de la Esperantistaj "trupoj" varbitaj en idealistaj medioj, ĉefe ĉe junuloj. Sed la jaroj pasas: nun la homoj pli fidelas, ili restas pli daŭre, pli serioze kaj solide; la kultura altirforto de la lingvo jam pli efikas. Kaj la junuloj akiras pli altan pozicion en la respektivaj socioj, de kie ili devenas. Iuj eĉ fariĝas universitatanoj kaj sciencistoj: ilia nombro kreskas. La altirforto des pli kreskas. Paralele la lingvo komencas krei valorajn literaturajn verkojn el diversaj ĝenroj, beletraj, teknike kaj science: la lingvo montriĝas kiel juna literatura lingvo, kiel nova kultura lingvo. Ankoraŭ modeste, ĝi tamen ekzistas: ĝi gajnis, post la unua venko de l' enviviĝo, duan venkon: tiun de l' transvivo kaj de l' kulturiĝo. Sed aliaj obstakloj kaj bataloj ĝin atendas! La Anglo-Saksa mondo, kun siaj preskaŭ 50 ŝtatoj, spuroj de l' Brita Imperio, forta pro l' scienco, la tekniko, la filmindustrio, la religiaj sektoj kaj la filozofiaj movadoj naskiĝintaj aŭ kreskintaj en Usono, ofertas, preskaŭ malgraŭ si, al la mondo unu komunan lingvon, cetere en tute pacema kaj komercema maniero: Anglezo estas jam nun konsiderata de multaj, kiel LA internacia lingvo de l' mondo; ekzistas eĉ iuj fortaj adversuloj de Usono, kiuj deklaras sian oponon en ĉi tiu lingvo. Oni lernas ĝin praktike en ĉiuj lernejoj de l' mondo.

Kaj ĝuste pri la lernantoj de Esperanto ni parolu nun: la proporcio de lernantoj estas escepte granda. Estas evidente, ke ili akiru certan nivelon antaŭ ol ni povu konsideri ilin aŭtentaj parolantoj de nia lingvo. Senatente al tiu fakto, iuj verkos strangajn kaj danĝerajn tezojn pri disdialektiĝo. Antaŭ ne longe prof. SZERDAHELYI devis dementi la ekziston de t.n. "Hungar-speranto", same kiel necesus dementi tiun de

interese bildigi al si la specifan socion, en kiu ĝi evoluis dum tiu periodo.

En 1887 la nova lingvo dependis nur de unu homo, de ĝia "Iniciatoro": li estis la absoluta mastro. Povoscianta la ĉefajn lingvojn de Eŭropo, kaj familiariĝinte kun la verkoj de l' samtempaj lingvistoj, li starigis la bazojn de lingvo, kiun li projektis internacia, kaj per ĝia materialo, kaj per ĝia spirito. Multajn jarojn poste la fama lingvisto Ferdinand de SAUSSURE, frato de l' Esperantisto, "antaŭdiris" en 1916, ke se Esperanto sukcesos, ĝi submetiĝos al "la fatala leĝo" de evoluo.¹⁾ Fakte jam de l' komenco, Zamenhof klarvide anoncis, ke Esperanto evoluos, "kiel la aliaj lingvoj". Plie, kaj tio multe pli gravas ol ĉio alia, li konstruis sian lingvon tiel, ke ĝi estu submetita al du kontraŭaj fortoj. En tre multaj sistemoj, ili estu fizikaj, kemiaj, biologiaj, psikologiaj, sociaj, oni konstatas la ekziston de du kontraŭaj fortoj, kiuj tenas sin en ekvilibro. Tio certigas evoluon kaj vivon. Genie, Zamenhof komprenis, ke tiuj du fortoj estos la motoro de l' evoluo. Racia sistemo de afiksoj estis la unua forto, ĉar per kombino kun neŝanĝeblaj radikoj ĝi garantiis, ke la lingvo povos kreskadi kaj esprimi multon elde malgranda propra materialo. La dua forto malmultvorte esprimiĝis en la fundamenta gramatiko de l' Unua Libro: tie regulo certigis la daŭran akceptemon por la ekstera sed internacia leksika materialo, kies ekziston Zamenhof estis eltrovinta en la Arjaj aŭ Indo-Eŭropanaj lingvoj kaj ĉefe en la lingvoj Latinidaj, Ĝermanidaj kaj Slavaj. La uzo de elementoj el tiu leksiko povus konstante doni novan sangon al la nova lingvo kaj estus alia fonto de evoluo, ja konfliktanta kun la unua, sed finfine bonefika.

Dum trideko da jaroj Zamenhof estis mentoro por la nova lingvo kaj ĝia "movado", kiujn li kvazaŭ portis diskrete kaj nerimarkite, ĉiam respektama al la opinio de aliaj, ĝis ili ektuŝis gravajn bazajn punktojn. La frukto de tia konduto estis, ke jam ĉe l' duono de tiu periodo, ĉirkaŭ 1900, kleraj Esperantistoj povis deklari, ke jen estas nova "vivanta" lingvo, t.e. lingvo, kiu kondukas, kiel ĉiuj aliaj. Kaj ĉe l' fino de l' periodo, la lingvo, sola kaj orfa, plu vivis kaj plu kreskis. Dum estas bone konata la fakto, ke similaj projektoj - eĉ el tiuj, kiuj ŝajne disponis pri plej bonaj armoj por la vivo - neniam kapablis ŝanĝiĝi al vera lingvo, nek povis transvivi sian eminentan iniciatoron.

Cent jarojn poste, kia do estas Esperanto kaj ĝia movado?

Ĝi estas la lingvo de homoj dissemataj tra ĉiuj nacioj de l' mondo en diasporo de nova tipo. La Judoj, kuntenitaj de unu religio,

post la forpelo el Palestino, dissemiĝis preskaŭ sur la tuta Tero. Sed ilin plu kuntenis potencaj ligoj de komuna fido kaj kulturo. Ili estis unu kaj poste dissemiĝis.

Sed la Esperantistoj tra l' kanalo de unu komuna lingvo naskiĝis al la internacia vivo en ĉiuj kaj ĉiaj punktoj de nia tergloba, en ĉiuj kaj ĉiaj sferoj de la homa aktivado: ili plu naskiĝas kaj naskiĝos. Ili, ĉiu por si kaj en sia angulo, fokusigis siajn pensojn pri unueco sur tiun komunan lingvon; ili sentis ĝin sia, ili plu flegis kaj ĝin forĝis unisone kun la plej bonaj inter si: literatoroj, ĵurnalistoj, oratoroj, poetoj, sciencistoj. Unue disaj, ili poste unuiĝis; ili sentas sin mem kvazaŭ kataliziloj en granda alĥemia fermentado, kiu iam onte naskos la Homaran unuecon.

Ili ankoraŭ estas nura manpleno. Ĉirkaŭ tiuj eminentaj gravitas multaj scivolemaj kaj bonvolemaj, kiuj restas kelkajn jarojn, turniĝas kaj returniĝas iomete ĉien kaj senrevene foriras. Okazas ja konstanta renoviĝo de la Esperantistaj "trupoj" varbitaj en idealistaj medioj, ĉefe ĉe junuloj. Sed la jaroj pasas: nun la homoj pli fidelas, ili restas pli daŭre, pli serioze kaj solide; la kultura altirforto de la lingvo jam pli efikas. Kaj la junuloj akiras pli altan pozicion en la respektivaj socioj, de kie ili devenas. Iuj eĉ fariĝas universitatanoj kaj sciencistoj: ilia nombro kreskas. La altirforto des pli kreskas. Paralele la lingvo komencas krei valorajn literaturajn verkojn el diversaj ĝenroj, beletraj, teknike kaj science: la lingvo montriĝas kiel juna literatura lingvo, kiel nova kultura lingvo. Ankoraŭ modeste, ĝi tamen ekzistas: ĝi gajnis, post la unua venko de l' enviviĝo, duan venkon: tiun de l' transvivo kaj de l' kulturiĝo. Sed aliaj obstakloj kaj bataloj ĝin atendas! La Anglo-Saksa mondo, kun siaj preskaŭ 50 ŝtatoj, spuroj de l' Brita Imperio, forta pro l' scienco, la tekniko, la filmindustrio, la religiaj sektoj kaj la filozofiaj movadoj naskiĝintaj aŭ kreskintaj en Usono, ofertas, preskaŭ malgraŭ si, al la mondo unu komunan lingvon, cetere en tute pacema kaj komercema maniero: Anglezo estas jam nun konsiderata de multaj, kiel LA internacia lingvo de l' mondo; ekzistas eĉ iuj fortaj adversuloj de Usono, kiuj deklaras sian oponon en ĉi tiu lingvo. Oni lernas ĝin praktike en ĉiuj lernejoj de l' mondo.

Kaj ĝuste pri la lernantoj de Esperanto ni parolu nun: la proporcio de lernantoj estas escepte granda. Estas evidente, ke ili akiru certan nivelon antaŭ ol ni povu konsideri ilin aŭtentaj parolantoj de nia lingvo. Senatente al tiu fakto, iuj verkos strangajn kaj danĝerajn tezojn pri disdialektiĝo. Antaŭ ne longe prof. SZERDAHELYI devis dementi la ekziston de t.n. "Hungar-speranto", same kiel necesus dementi tiun de

Fransperanto aŭ de Anglosperanto, ktp... Temas nur pri l' ĝenoj spertataj de lernantoj rilate al sia propra lingvo: pro ne sufiĉa lernado ili kulbas specifajn erarojn. Sekve niaj pedagogoj komencis eldoni specifajn didaktikajn "Erar-gramatikojn". Sed la plej granda eraro estas paroli en tiaj kazoj pri dialektoj.²⁾

Tiu aparta proporcio de lernantoj en niaj vicoj estas des pli grava, ke praktike ĉiuj lernis la lingvon. Ni esperu, ke la proporcio de lernantoj iĝos eĉ pli granda. Esperantistoj plej ofte lernas en kursoj organizitaj de la loka asocio; sufiĉe ofte ili lernas solaj. Malofte kaj escepte, ili estas "denaskaj Esperantistoj": ili akiras Esperanton paralele al la nacia lingvo, interne de sia familio; ili "heredas" ĝin. Bedaŭrinde, ili poste spertas, ke neniuj parolas la lingvon ekster la familio kaj ke en la loka asocio plej ofte kunvenas nur balbutantoj, treege sub ilia propra nivelo. Alidire, la heredaĵon ili povas uzi, nur se ili ŝatas sekvi la vojon de siaj gepatroj, siavice instruante kaj propagadante ... La Esperanto-popolo estas nur diasporo, en kiu la individuoj reŝkontiĝas nur sporade okaze de raraj sed grandiozaj kaj ekzaltaj festoj: tiuj festoj okazas ĉiujare, privilegiante ĉiufoje alian regionon de nia mondo.

*

Jen kion oni povas diri pri l' eksteraj influoj kaj cirkonstancoj, kiuj kontribuis al la evoluo de nia lingvo. En tiu mallonga prelego mi intencis doni nur skeman bildon okaze de nia festa kaj jubilea Konferenco. Mi ankaŭ neniel deziras definitive trajti kaj pritrakti la konturojn de l' evoluo de Esperanto en tiu centjara periodo. Mi deziras nur iniciati kaj doni ĝeneralan supervidon. Cetere, por tio, mi profitas el la indikoj kaj rimarkoj de diversaj aŭtoroj, kiuj jam tuŝis la temon.

* *

'Se doni kelkajn indikojn pri l' ĉefaj evolu-trajtoj de nia lingvo, ni plej unue eliminu la dezirojn pri evoluigo de individuoj aŭ de iuj organizoj. Nome, se ĉi-lastaj prezentas proponojn, se verkisto uzas neologismon, tiuj proponoj, tiu neologismo fariĝas parto de la lingvo, nur se post nedifinebla tempopaso, ili, ĝi, estas akceptitaj de almenaŭ parto de l' Esperantistaro, kiel en aliaj lingvoj. Necesas kompari la lingvon en malsamaj tempopunktoj: tiam la diferencoj aperantaj en la pli freŝdata tempo estas elementoj de l' evoluo, tute indiferente, ĉu tiu elemento iam estis konscie proponita de iu, aŭ ĉu ĝi senkonscie enkondukiĝis mem en la lingvon.

Ni konsideros la evoluon en fonetiko, en sintakso kaj en la vorttrezoro aŭ leksiko de nia lingvo.

En fonetiko ni devas ekspekti malgrandan evoluon pro l' relative simpla fonologio de Esperanto. Tamen aliaj lingvoj, kiel la Japana, estas pli simplaj kaj iliaj parolantoj devas peni por elparoli vortojn de Esperanto, en kiuj amasiĝas konsonantoj. Cetere jam Zamenhof atentis tion: apud patro oni pro l' etimologio supozus la formon fratro, sed li volis eviti la du grupojn kun likvido R; li donis dō frato, kaj ne nur por imiti la Rusan brat!

Ŝajne la ideala realigo de l' Esperanta R estas apeksa ekvibro. Malpli bona estas la uvula R, vibranta aŭ frikativa ĉe la langodorso; efektive ĝi tro apudas la velaron Ĥ, des pli ke en sia realigo tiu ĉi akompaniĝas tre ofte per uvulaj vibroj. Tio klarigas, ke praktike ĉiuj RĤ kaj ĤR estis konkurencitaj per formoj kun RK kaj KR: cetere la Akademio agnoskis tiujn novajn formojn. Sed okazis du aliaj fenomenoj: unue oni etendis tiun forigon de Ĥ ankaŭ al izolaj, intervokalaj aŭ inicialaj, Ĥ; due, okazis reago kaj novaj Ĥ aperis en vortoj, kiuj neniam posedis ĝin, kaj eĉ, freŝdate, en vortoj, por kiuj la etimo ne pravigas tion. Se tiaj eraroj vastiĝos, dum aliaj plu skribos per K, necesos konsideri novan ortografion, kiu unuigos sub ununura grafemo tiujn du prononcojn; ekzemple K (ĉapela ko), dumaniere prononcota, iom imite al la digramo CH, prononcata jen = (k) en la Itala, la Franca kaj la Angla, jen = (ĥ) en la Nederlandana, la Pola kaj la Ĉeĥa, jen aŭ = (k) aŭ = (ĥ) en la Germana laŭ la pozicio kaj la etimo. Cetere jam Zamenhof ne uzis Ĥ en la Fundamentaj vortoj kreno, Kristo kaj kroniko. Sed provizore kaj ankoraŭ por tre longa tempo, tiaj troaj Ĥ restos eraroj.

Tia forigo de kombinoj RĤ kaj ĤR estas ekzemplo por apliko de la leĝo de l' malpli granda peno; kiam la plimulto uzadas kaj agnoskas ĝin, do estiĝas evoluo. Ekzemple, la grupon SC sufiĉe multaj trovas malfacila. Se la lingvo fariĝos multe pli ordinare parolata en la ĉiutaga vivo, ni povas atendi, ke tiu grupo forŝlifiĝos aŭ al S, aŭ al C almenaŭ en la tre ofta radiko de scii; de tie ĝi transiros al scienco kaj eble al kelkaj aliaj radikoj, escepte la tro maloftaj. Tiam necesos modifi la ortografion, almenaŭ ĝis oni deziros konservi ĝian karakteron de preskaŭa "fonetikeco".

Laŭ LO JACOMO ekzistus tendenco al neŭtraligo de l' opozicio inter /i/ kaj /j/, almenaŭ en senakcenta pozicio: oni emus diri, laŭ li, manjero por maniero, djalogo por dialogo. Tamen ĉu tio ne estas pure Franca prononcmankado pro influo ĝuste de l'

Franca? Tiam alilingvanoj protestos pri tiu prononco kaj la eraro malaperos pro l' averto kaj pro l' klopodo de l' interesitoj.

Sed LO JACOMO citas la plian ekzemplon de hieraŭ, kiu fakte akumulas la malfacilojn: spiracio =(h), kiu necesigas artikulan energion, hiato =(ie), kiu postulas minimume ian atenton, kaj la principo apokope vibra =(r), kiu ja estas "unu el la plej sonoraj kaj belaj sonoj" en ĉiuj lingvoj, sed kiu "neprigas la maksimumon de artikulasi-energio".³⁾ Do ekzistus tendenco diri jeraŭ per forŝlifiĝo de l' unua silabo! Se tiu tendenco montriĝas ĝenerala kaj ne limigita al unu lando, sufiĉas agnoski tion per modifo de l' ortografio. La lingvo neniam perdis, ĉar ne povas okazi miskompreno: ĝi estiĝus nur pli simpla. Io nun erara, fariĝus la normo! Ni sidu kaj vidu!

Entute tiaj kazoj estas maloftaj kaj mi dubas, ĉu ni povus citi duan. Aŭ eble mi devas citi la eraron de multaj lernantoj, kiuj unusilabe eldiras la tabelvortojn: ĉuj, tuj, kuj. Oni do bonigu la pedagogion. Aŭ eventuale oni uzu tion, kiel bazon por senbalastigo de la lingvo, iom imite al la forgesitaj proponoj de GRABOWSKI en "La Liro de Esperantistoj".

Resume, ni konkludu, ke la prononco de nia lingvo estis tre stabila dum tiu inaŭgura periodo de cent jaroj. Kaj tio ne mirigas nin, ĉar ĉiu nova generacio lernas la samajn preskribojn. Sekve okazas eraroj, precipe se la preskriboj estas eraraj. Tio okazis kun la Granda Komentisto antaŭ 1905: "Li insiste instruis - diras al ni PRIVAT - ke oni devas ĉiam elparoladi â, é, ô longe kaj fermite, kio estis absolute kontraŭnatura". Tian eraran instruon de BEAUFRONT forigis ZAMENHOF mem dum la Bulonja Kongreso.

Kaj nia unua granda oratoro konstatas dudek jarojn poste, ke "meza, ĝenerala elparolo disvastiĝas pli kaj pli sur bazo de italo-pola modelo". Tio estas la "diagonala" prononco de Eŭropo. Ŝajne hodiaŭ ĝi disvastiĝis al la tuta Esperanto-mondo.

Esence similajn rimarkojn kaj konkludon ni povos formuli pri l' sintakso. Efektive ĉiu lernis la lingvon laŭ la samaj preskriboj kaj aplikas ilin. WARINGHIEN resumas la situacion asertante, ke "Reguloj de la Gramatiko kaj Ekzercaro estas ĝenerale observataj; deflankiĝoj aperas kiel eraroj, eĉ se la kulpantoj provas kovri siajn misuzojn per teoriaj pravigoj". Kaj li citas kiel ekzemplojn la malsaman komprenon de -ata kaj -ita, la malsaman uzon de l' du paroj tiel/kiel kaj tiom/kiom; paroj, kiujn tiel bone studis Akademiano DE HOOG.

WARINGHIEN citas kelkajn ekzemplojn, por kiuj okazis ia evoluo. La plej evidenta estas la ekzemplo pri la loko de l'

epiteto abstrakta: kie ZAMENHOF konstante diris "Lingvo internacia", ni unuanime diras "Internacia Lingvo". Mi nur aludos aliajn punktojn, kiel ekzemple tiujn de la, po, sia, kiuj ja bezonus esti aparte studataj.

Mi mem aldonos al la listo la heziton en la prepozicio post danki. Ĉu oni dankas pro aŭ dankas por? Ŝajne, oni pli frue multe pli uzis pro, dum hodiaŭ oni emus preferi por. Sed por kontroli tiun impreson, necesus establi statistikojn kaj studi la tutan problemon.

Ĝenerala rimarko troviĝas ĉe pluraj aŭtoroj, kiel ekzemple PRIVAT kaj aliaj: jam antaŭ 50 jaroj oni tendencis ne plu uzi tro longajn frazojn aŭ tro komplikajn frazkonstruojn. Mi donos du ekzemplojn prefere ol teorioj; hodiaŭ oni ne plu aŭdas esprimojn el la tipo de: "estas 25 minutoj de la 8-a horo", sed oni ja diras: "estas la 7-a, 25". Oni ankaŭ tendencas ne plu uzi esprimojn, en kiuj oni unue donas multajn komplementojn kaj lasas nin senpacience atendi la ĉefinan substantivon, kiu donas la ŝlosilon de l' kompreno; ekzemple: "la blanke farbita de mia avo konstruita regionstila domo"; ordinare oni preferas: "la blanke farbita kaj regionstila domo konstruita de mia avo".


Resume, ni diros, ke la sintakso estis stabila dum ĉi tiuj cent jaroj; ke ĝi verŝajne ankoraŭ longe restos tia. Grandan evoluon oni ne serĉu sur tiu kampo!

Male, ni ĝin serĉu en la leksiko; ĝi certe estas la kampo, en kiu la evoluo plej markis nian lingvon. Hodiaŭ ankoraŭ eblas kompreni la unuajn tekstojn.

Vidu la skemon sur la sekvanta paĝo

Tamen en tiuj tekstoj, precipe se ili datumas de antaŭ 1900, oni de temp' al tempo renkontas formajn aŭ sencajn arkaismojn, kiuj igas nin cerbumi. Sed ĝi estas la sama lingvo.

Ĉiuj aŭtoroj akordiĝas por deklari, ke nia vorttrezoro konsiderinde riĉiĝis kun la paso de l' jaroj. En 1893 la Universala Vortaro kun siaj 2 644 radikoj estis trifoje pli ampleksa ol la Unua Libro de 1887. Hodiaŭ la Oficiala vortaro kun siaj 8 Oficialaj Aldonoj aperintaj inter 1909 kaj 1974 ne duobligis tiun nombron kaj registras nur 4734 radikojn. Sed ĉiuj



RADIKOJ DE ESPERANTO: Kvanta evoluo.

UL = Unua Libro 1887 (820 radikoj); UV = Universala Vortaro 1894 (2644 r.); 1 = 1-a Oficiala Aldono al la U.V., 1909 (812 pliaj r.); 2 = 2-a O.A., 1914 (592 pliaj r.); 3 = 3-a O.A., 1922 (184 pliaj r.); 4 = 4-a O.A., 1929 (119 pliaj r.); 7 = 7-a O.A. (sume 4536 r.); 8 = 8-a O.A., 1975 (198 pliaj r.);

RI = Vortaro Rusa-Internacia de ZAMENHOF, 1889 (ĉ. 3150 r.);

ER = Vortaro Esperanto-Rusa de Zamenhof, 1909 (ĉ. 5000 r.);

Z = taksita sumo de Zamenhofaj radikoj (arbitre notita en 1915);

B = BOIRAC, Plena Vortaro Esperanto-Esperanta kaj Esperanto-Franca, 1909-10 (ĉ. 10000 r.); PV = Plena Vortaro (de S.A.T.), 2-a eld. kun suplemento 1954 (7866 r.); PIV = Plena Ilustrita Vortaro, 1970 (ĉ. 16000 r.).

K = kurbo indikanta proksimume la evoluon de la suma nombro de radikoj.

agnoskas evidentaĵon: la nombro de l' neologismoj, difinitaj por nia lingvo kiel tiuj radikoj, kiuj estas nek Fundamentaj, nek Oficialaj, estas konsiderinde pli granda. Oni scias ankaŭ ke la persono, tra kiu enkondukiĝis plej da neologismoj, jen per propra uzado, jen per akcepto de l' uzo de aliaj, estis ZAMENHOF mem. En 1889, do tri jarojn antaŭ la Universala Vortaro, aperis lia Rusa-Internacia vortaro kun 500 pliaj vortoj; kaj en 1909 eldoniĝas lia Esperanto-Rusa Vortaro kun ĉirkaŭ 5000 radikoj, la duoblo de l' Universala Vortaro, pli ol estas nun da Fundamentaj kaj Oficialaj. Aliaj poste levos la nombron de Zamenhofaj radikoj ĝis 6 000. Sed tio neniel estas nia tuta vorttrezoro: mankas multo por tio; eĉ en tiu epoko. BOIRAC en sian Plenan Vortaron de 1909-1910 povis kolekti ĉirkaŭ 10 000 radikojn. Ĝi ja enhavis mortnaskitaĵojn kaj dubajn formojn; sed tamen! En 1954 la Plena Vortaro de S.A.T. donas 7 866 radikojn, sed enhavas neniun propran nomon nek geografiajn nomojn: mankas multo en ĝi, sed ĝi prezentas tre bone la kernon de la lingvo. Provizore fine, en 1970 la Plena Ilustrita Vortaro, la unua, kiu meritas la epiteton plena, registras ĉirkaŭ 16 000 radikojn, mankas en ĝi multaj teknikaj kaj literaturaj radikoj. La veraj nombroj ĉiam estis nete superaj al tiuj de l' registritaj: ni povas hodiaŭ taksi tiun nombron je ĉirkaŭ 20 000 ĝis 25 000. Kompreneble mi parolas nur pri radikoj; la vortoj ne estas nombreblaj, krom per taksoj el la tipo: kvin- ĝis dek-oble pli multaj. Al finita listo ĉiam eblos aldoni pliajn vortojn. Evidente kaj espereble tiuj nombroj ankoraŭ kreskos.

En 1931 Prof. CART, la dua Prezidanto de l' Akademio, montris, ke lingvo estas submetita al tri leĝoj: la leĝoj de plej malgranda peno, de adaptado al la medio, kaj de batalo por la vivo. Tio certe estus studinda. Pli apud ni, en 1980, Jerzy LEYK montris la ekziston de du leĝoj, kiuj sin oponas; li nomis ilin leĝoj de komunikivo kaj de esprimivo. Ankaŭ tio estas bona, sed mi prefere parolos pri du kapabloj de nia lingvo: ĝi kapablas priskribi, ĝi kapablas nomi.⁴⁾ Efektive, tio rekondukos nin al la du fortoj, kiujn Zamenhof enlasis en sian lingvon.

Dank' al sia racia sistemo de afiksoj Esperanto estas mirinda priskriba lingvo. Ĉiuj lingvoj priskribas, sed Esperanto tion faras pli facile, pli taŭge kaj pli harmonie: eblas doni facilajn priskribojn aŭ klarigojn pri ĉio same en scienco kaj tekniko, kiel en psikologio aŭ literaturo. Dank' al sia 15-a regulo pri internaciaj vortoj, ĝi povas libere enkonduki ĉiajn apelativojn kaj proprajn nomojn, kiujn ĉiuspecaj fakoj de l' homa aktiveco postulas. Tiuj du kapabloj estas nepre necesaj al la vivo de nia

lingvo. Sed de tio defluas la ekzisto de ĉiam novaj vortoj ĉu kunmetaj, ĉu derivitaj; kaj ankaŭ la enkonduko de ĉiam novaj radikoj kaj eventuale de kelkaj novaj afiksoj. Klarigaj vortoj, kiel lingvoscienco, venas de interne; sed de ekstere devas veni apelativoj aŭ nomoj, kiaj lingvistiko: ĉi-lastan inventis kaj disvastigis la kreintoj de tiu scienco. Esperanto devas esti akceptema al tiaj apelativoj: ĝi ne kreas ilin, sed nur asimilas.

Ni prenu la ekzemplon de kontenero, ekzemplon jam proponitan de D-ro BORMANN. Ĉi estas tre instrua. Angla vorto devenanta de to contain, enteni, kiu respondas al la Franca contenir, ĝi eble povus esti precize redonita per kunetenilo, aŭ se uzi la Zamenhofan kum-, kiu signifas maldis-, per kumtenilo. Aliparte, se atenti la prononcon, container devus fariĝi kontejnero, do simila al la Rusa vorto. Evidente la verbo teni influis al fonologia simpligo. Multaj lingvoj certe skribe transprenis la Anglan vorton, kvankam ĉiu verŝajne prononcas iom aliel; sed la Franca administracio konsilas la formon pure Francan conteneur. Sed la Esperantistoj ne posedas la internacian sufikson -er- kun la signifo: "iu aŭ io, kiu faras ion"; sekve ili simple asimilis la internaciigintan vorton; ili neniel kreis ĝin, kiel opinias D-ro BORMANN. Sed tiu ĉi tute pravas, kiam li rimarkas, ke la vorto kestego, se ĝi sufiĉe priskribas la konteneron por la homo sur la ŝtrato, neniel povas sufiĉi por la teknikisto: ĝi ja estas kestego, sed kun multaj specifaĵoj, kaj ĝin ludonas nur specifaj societoj. Kaj povas esti multaj aliaj kestegoj, kiuj ne estas konteneroj. Konklude, devige doni al kestego la specifan sencon de kontenero, estus nur komplikigi la lingvon.

Sekve oni komprenas, ke priskribaj vortoj, eĉ se ili estas daŭre utilaj, devis parte cedi la lokon al apelativoj pli-malpli internaciaj. Tiel la inkofluiga malsanulejo estas nun de longe helpata de hospitalo, kliniko, dispensario, lazareto kaj aliaj. Priskribaj vortoj kondukas al ĝeneraligo, al abstrakteco; internaciaj vortoj nomas kaj kondukas al individuigo, al konkreteco.

Ankaŭ pro tio, derivaĵoj el la primitiva periodo perdis sian troan specifecon kaj retrovis sian esencan signifon; tial pafilo ne plu signifas fusilo, sed kiu ajn ilo por pafi: do ankaŭ revolvero, pistolo, karabeno kaj aliaj. Pafilego cedis antaŭ kanono, sed restas por eventualaj egaj pafiloj. Tiel same multe derivaĵoj iam aperintaj en la Fundamento devis cedi antaŭ pli adaptitaj nomoj: mi jam studis tion aliloke, kaj do ne insistos.⁵⁾

Paralele, la semantiko de kelkaj radikoj modifiĝis en diversaj epokoj: mi citos du ekzemplojn prenitajn el la Fundamento. La

sencon Fundamentan de ĉikani, nome F. cancaner, G. klatschen, oni esprimas per klaĉi; efektive dank' al la fruaj diskutoj de BEAUFONT kun ZAMENHOF, tiu vorto reakiris sian etiman sencon, nome la F. chicaner. Aliparte, en Nederlando kaj poste ĉie, oni akceptis, ke subsenco de ami estu esprimita per ŝati; de tiam dank' al CSEH, la inventinto de l' konata metodo, oni ne plu "amas la ĉokoladon", sed oni ŝatas ĝin. Utila distingo. Sed reefike oni sentis la neceson uzi la novismon apreci, ĉar ŝati ne plu estis tiel uzebla en sia Fundamenta strikta senco. Fine, ĉar ĉiuj, aŭ preskaŭ ĉiuj, akceptis tiujn modifojn, ili do apartenas al la evoluo.

La evoluo restas en ekvilibro kaj harmonio, samgrade kiel la du kapabloj de nia lingvo estas respektataj. Se oni favoras la priskribivon oni trafas en skemismon, se male oni favoras la 15-an Regulon oni fariĝas naturalisma. Kaj ĉar estas ekstremismoj en ĉio, mi bildigos tion per la stilo de du valoraj pioniroj: S-ino NAGATA kaj S-ro PIĈ, por kiuj mi inventos jenajn ekzemplajn frazojn; nome, en Nagatisma stilo: "la fremdulo buŝtradukis por la sinjorino de Japanlingvo al Germanlingvo en la daŭro de plenaj sufoke varmaj posttagmezoj" - ĝin komprenos ĉiu, sed kia pezo! Tradukita laŭ Piĉismo, ĝi fariĝas: "La fremda drogmanis por la damo de-Japane al-Germane dum plenaj postmidoj sultraj". Ambaŭ estas korekta Esperanto, sed tamen ... en mezo estas virto! Rimarku, ke eblus esti eĉ pli ekstremisma: eblus unufanke diri buŝtransdoni, kune kun la simetria fingrinterpreti aŭ fringrotransdoni, dum aliflanke eblus enkonduki la sinonimon "stranĝero". Ni restu ĉe l' klasika stilo de ZAMENHOF, KABE kaj GRABOWSKI kaj estu modestaj en nia modernismo, tamen ne absolute bridante ĝin.

Oni ja devas agnoski, ke niaj poetoj, beletristoj kaj aliaj forĝistoj de nia lingvo, se ili jam poluris kaj riĉigis nian lingvon, devas ankoraŭ multe suferi kaj klopodi. Ili kompreneble sopiras al taŭgaj sinonimoj, kaj eble ankoraŭ pli ili sopiras al io, kio terure mankas en nia lingvo: la unusilabaj vortoj. Kelkaj jam aperis kaj eblas veti, ke ili ĝeneraligos, ĉar ili estos ŝatataj ankaŭ en la ĉiutaga ordinara babilado; alidire de tiuj, kiuj plej uzas la lingvon, kiel ekzemple la denaskaj Esperantistoj. Jam de kelkaj jaroj oni komencis uzadi eliziitan formon por la enklitiko estas; nun venis propono redukti ties radikon al la litero s: ekz-e, tio sas vera. Mi opinias, ke tiu propono havas estontecon. Aliparte en la unuaj jaroj, kune kun ZAMENHOF oni ne hezitis elizii la artikolon eĉ en prozo, laŭ la preskribo de l' Ekzercaro⁶⁾: ankaŭ tio liveras senbalastigon de l' stilo. En la sama elano eblus demandi al si, ĉu iuj aŭ-vortoj, almenaŭ el la

trisilabaj, ne povus profiti apokopon; ekz-e, 'koraŭ, 'penaŭ. Kaj eĉ la longega anstataŭ, por kiu oni vane proponis diversajn sinonimojn eble povus simpliĝi al la nura akcentita silabo: sta.

Nur tiam tradukunto de l' malnovaj Sanskritaj tekstoj pro espero ekus relevi la kapon: farante siajn kelkajn sugestojn de STOJAN 7), kiel ekzemple la universalan rilativon ki / kin, li vidus aperi la tago, kiam suno povus brili super vera redono de ekzemple la Bagavad-Gita. Tiam li alsturmus tiajn kerne koncizajn formulojn, kiel la eterna om-tat-sat; pli modeste, li unue proponus to vi sas por la ankaŭ tre konata tat-tvam-asi 8)...

* * *

Sed tio estas muziko de l' estonteco: pri ĝi ni revu dum tiu jubilea festo de nia centjara Esperanto. Ĉar, se en tiu impresionisma supervido, ni povis rememori ĝian infanecon forpasintan, konstati ĝian estantecon, ni kapablas nur revii pri ĝia venonteco.

Tamen pri io ni estu certaj: iam projekto, bebo en sia lulilo, nun nova kaj juna, kiel vigla kaj plensanga knabo, nia lingvo promesas al ni brilan kaj bonfaran futuron. Ĉar ...

Ja! Ĉio evoluas!

NOTOJ

1. Ferdinand de SAUSSURE. Cours de linguistique générale, Lausanne, Payot, 1916, 331 paĝoj; nova eldono, 1972, 532 paĝoj. - (Vd. p. 192-3; raportita de SIMONNET, kiu plendas pri "novismoj", sed ne kapablas pli ol aliaj sin limigi je Fundamentaj kaj Oficialaj vortoj, ja la solaj, kiuj ne estas novismoj aŭ neologismoj, pro difino)
2. István SZERDAHELYI. Ĉu ekzistas "hungarsperanto"? - p. 38 de: Internacia Pedagogia Revuo, 1986, n-ro 3.
3. Bertil MALMBERG. Manuel de phonétique générale. Introduction à l'analyse scientifique de l'expression du langage. Eld.: A. et J. Picard. Paris. 1974. 272 paĝoj. (Vd. p. 159).
4. Disvolvono de tiu temo vd. en: A.A. Propraj nomoj kaj apelativoj. En: La Jubilea Libro de la Centjara Esperanto (aperonta en 1987 ĉe FONTO)

5. A.A. Naŭ prelegoj pri la Fundamento. (Aperonta ĉe Iltis en 1987).
6. Ekzercaro, § 27, kvar unuaj frazoj.
7. Petro STOJAN. Deveno kaj vivo de la lingvo Esperanto. 1953. (plus abunda persona korespondado)
8. Ŭm-tat-sat: formulo nomanta la Absoluton, aŭ Dion; trovebla ekz-e en la Bagavad-Gita (XVII, 23), ĝi estas formita de l' unuaj vortoj de tri aliaj konataj formuloj; la dua el ili estas tat-tvam-asi (tio vi estas) - - Se konsideri la proponojn kaj sugestojn de ZAMENHOF, GRABOWSKI kaj STOJAN - kune kun la ebloj -, oni povus proponi sinonimaron por la tabelvortoj; la kvin seri-kapoj nome povus esti: kvu, cu (preferinda antaŭ tu pro ties pluralo tu/j), iu, nju (= neniu), ĉiu kaj omnu (de tio: omnoscia, omnopova, omnesanta).

GLOSOJ

altoplaino: ebenajo en tre alta altitudo. - A. plateau, high plain, F. haut plateau, altiplano, G. Hochebene, Plateau, H. altiplano, altiplanie, P. planalto, R. plató. (el: alto kaj plaino: A. plain, F. plaine, G. Ebene, H. Ilano, I. piana, pïanura, P. planicie, planura, plaino).

ekspekt/i, -ado: supozu aŭ kredi, ke io okazos (Vatré: Neologisma vortaro). - A. to expect, F. s'attendre à, présumer, H. expectation el L. exspectare.

-eno: lingvo nomita laŭ la nomo de l' ĉefa lando, en kiu oni parolas ĝin: Hell/eno, Kore/eno, Nederland/eno ... (Kp. la lingvouzon de PRIVAT: "la koreana")

-ezo: lingvo nomita laŭ la nomo de l' ĉefa etno de difinita lando: Anglezo, Danezo, ... (Kp.: -eno; tiuj du sufiksoj estos tre produktivaj, ĉar per ili oni formas la pli multajn el la nomoj de l' 3000 lingvoj parolataj sur Tero)

fluvo, ramo, trambi: vortoj komentitaj en: A.A. Pri neologismado. - p. 37 de Akademijaj Studoj 1986.

Indo: fluvonomo. - E. 'Indós, L. Indus, F. Indus, H.I.P. Indo, R. Und = (ind).

Indo-Eŭropanaj (lingvoj): nomas iuj lingvojn, kiuj ekspansiĝis unue en landoj de Eŭropo kaj ĝis landoj pli malpli proksimaj al Indo. - A. Indo-European, F. Indo-européen, G. indo-europäisch, H. indoeuropeo, I. indo-europeo, P. indo-europeu, R. undoevroepeŭskuŭ (CART kaj PRIVAT, du lingvistoj, uzis: indo-eŭropa; sed PRIVAT plie uzis formojn kiel: nederlandana lingvo).

Samarito: urbonomo. (Vd. A.A, landnomoj en la Biblio.- p. 151 de Biblia Revuo 1975 (pri internacieco de Samarito, Vd. p. 154)

Terra incognita: Latinaĵo (nekonata tero) indikanta terpartojn ne jam esploritajn.

tribul/i, -ado: A.F. tribulation, G. Trübsal, H. tribulación, I. tribolazione, P. tribulação, el : L. tribulatio, el tribulare (= aflikti).

ĈEFAJ EL LA KONSULTITAJ VERKOJ

Atanas D. ATANASOV. La lingva esenco de Esperanto. UEA, Roterdamo, 1983. 175 paĝoj.

William AULD. Pri lingvo kaj aliaj artoj. TK-Stafeto, Antverpeno-La Laguna, 1978. 213 paĝoj.

Werner BORMANN. Bona ŝanco; dekdu prelegoj pri la internacia lingvo kaj la sociaj sciencoj. Stafeto, J. Régulo, La Laguna, 1970. 246 paĝoj.

Werner BORMANN. La evoluo de Esperanto kaj la Akademio. Publikaĵoj de Germana Esperanto-Instituto n-ro 7. Eld. Esperanto-Verband Baden-Württemberg, 1985.

Delfi DALMAU. Fariteco kaj evoluo de Esperanto. p. 242 de: Monda Kulturo, somero 1964. Eld. UEA, sub redaktoreco de A.ALBAULT.

Emile GROSJEAN-MAUPIN. Evoluo de Esperanto. p. 130 de: Enciklopedio de Esperanto, 1-a volumo. Literatura Mondo, Budepest, 1933. Sub ĉefredaktoreco de Ivan Genadijeviĉ ŜIRJAEV. (Represo Hungara E-o-Asocio, Budapest, 1979).

Ivo LAPENNA, ktp. Esperanto en Perspektivo. UEA, Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo. London - Rotterdam, 1974. 844 paĝoj.

- Mauro LA TORRE., ktp. Pliriĉigo de la morfemaro en la internacia planlingvo. - p. 368/379 de: Miscellanea Interlinguistica, Interlingvistika Antologio. Eld. Tankönyvkiadó, Budapest, 1980. 513 paĝoj. Sub redaktoreco de D-ro SZERDAHELYI István.
- Jerzy LEYK. Problemoj de la evoluo de Esperanto. - p. 458/464 de: Miscellanea Interlinguistica (cit. ver.: vd. sub: LA TORRE).
- Francois LO JACOMO. Liberté ou autorité dans l'évolution de l'Esperanto. Thèse pour le doctorat de troisième cycle sous la direction de M. le Professeur André MARTINET. Université Paris 5, René Descartes, Sciences Humaines, Sorbonne. Edition "Edistudio", Pisa, Italie. 1981. 384 paĝoj.
- Violin OLJANOV. Lingvaj disputoj kaj lingvo-evoluo. - p. 91/96 de: Interlingvistiko Esperantologio. Eld. Bulgara Esperantista Asocio, Sofio. 1985. 252 paĝoj. (Redaktoro Violin OLJANOV).
- Edmond PRIVAT. Historio de la lingvo Esperanto. Unua parto 1887-1900. Dua parto 1900-1927. (Re)eldonis: Internacia Esperanto-Instituto, Hago. 1982. 1-a parto: 74 paĝoj (1912 kaj 1923); 2-a parto: 199 paĝoj (1927)
- Edmond PRIVAT. Esprimo de sentoj en Esperanto. Resumo de kurso farita ĉe la Universitato de Ĝenevo, en la lingvosciencia fako de la Beletristika Fakultato dum 1929 kaj 1930. Eld.: Internacia Esperanto-Instituto. Den Haag. 1980. 60 paĝoj.
- Josef RUMLER. Abunde kaj redunde. Eseo pri diversaj stiloj en la Internacia Lingvo; Plus sinonima glosaro de Praga artiliteratura skolo. Literatura suplemento al la revuo PACO ĉeĥa eldono. Eld.: Ĉeĥa Esperanto-Asocio. 1986. 32 paĝoj.
- Francisko SIMONNET. Ĉu la lingvoj devas evolui? - p. 55/70 de: Acta Interlinguistica. 11-a Interlingvistika simpozio, Varsovio, 1983. Eld. Akademickie Centrum Interlingwistyczne, Rada Naczelna ZSP. 1984. 160 paĝoj. (Redaktoro: Ryszard ROKICKI).
- Gaston WARINGHIEN. La evoluo de la Esperanta Vortotrezoro. - 235/249 de la samaŭtoro: 1887 kaj la sekvo... Eseoj IV. Eld. TK-Stafeto, Antverpeno - La Laguna. 1980. 293 paĝoj.
- Gaston WARINGHIEN. Kiel kaj kiom evoluas Esperanto? - p. 251/260 de: 1887 kaj la sekvo (cit. ver.: vd. ĝuste super).
- Gaston WARINGHIEN. La Budapeŝta skolo. - p. 55/69 de la samaŭtoro: Kaj la ceter' - nur literaturo. Eseoj V. Eld.: TK-Stafeto. Antverpeno - La Laguna. 1983. 350 paĝoj.
- Mika WASEDA. Esperanto: a living language. - p. 465/512 de: Miscellanea Interlinguistica. (cit. ver.: vd. sub LA TORRE).

Prof. D-ro Juan Régulo Pérez:

Membro de la Akademio de Esperanto

CENT JAROJ DE

ESPERANTAJ FRAZEOLISMOJ

Frazeologiaĵo aŭ frazeologismo estas unuo (leksika, morfologia, sintaksa), kies signifo ne deduktiĝas el la malsamaj eroj, kiuj ĝin konsistigas. Temas ja pri establitaj vortkombinaĵoj, pri formalizitaj idiotismoj kiel ekzemple angle to catch one's eye, france coup d'etat, hispane a pie juntillas. Zamenhof mem asertis ke "lingvo absolute logika kaj tute sen idiotismoj estus lingvo sen viva"; inter multaj aliaj, li mem elcirkuligis la frazeologismon (amata) ĉevaleto por 'maroto', 'ŝatokupo'.

Kiam malsamaj lingvoj venas en kontakton kaj interkompreno fariĝas malfacila, el baraktado por sin reciproke rilati emerĝas interkomprenilo, kiun lingvistoj nomas piĝino. Piĝinoj, improvizitaj, porokazaj lingvoj, estas celkonforme funkciaj, sed per tio finiĝas ilia rolo, ĉar dank al tio, ke ili ne havas kongruajn regulojn, ili utilas nur por mallongaj renkontiĝoj, ne por plena, normala konversacio. Infanoj ŝajne konscias pri tio, diras havaja lingvisto Prof. Derek Bickerton en sia libro "Roots of Language" ¹⁾, ĉar en la havajaj plantejoj infanoj starigis kreolan lingvon nun tie funkciantan. La strukturo de la kreola lingvo de Havajio estas malsama ol tiu de la unuageneracia havaja piĝino, aŭ de tiuj de la modernaj lingvoj tie ekzistantaj. "In Hawaii", opinias Bickerton, "we have empirical proof that... the first creole generation produced rules for which there was no evidence in the previous generation's speech" (En Havajio ni havas empirian pruvon pri tio, ke ... la unua kreola generacio kreis lingvon por kiu ne ekzistas ia evidentaĵo en la antaŭa generacio).

En mia artikolo "Esperanto kaj Papiamento*: la plej simplaj gramatikoj", mi klopodis historii, kiel la neceso pri reciproka kompreniĝo inter negraj sklavoj afrikaj, transportitaj en Amerikon el pluraj etnoj kun malsamaj lingvoj, kaj la neceso pri interkompreniĝo kun iliaj mastroj, ĉefe portugalaj negristoj, devigis tiujn krudajn analfabetajn primitivulojn starigi al si, post la piĝinoj de la transportitoj, novan, tre simplan lingvon.

Tiu idiomo libere evoluis dum tri jarcentoj inter siaj agrafiaj parolantoj, ĝis kiam tiu interkomprenilo skribe ekfiksiĝis komence de la 19-a jarcento. Hodiaŭ ĝi konsistigas kulturlingvon, nomatan papiamento, en kiu oni eldonas librojn, ĵurnalojn, revuojn kaj per kiu oni ludas teatraĵojn, dissendas radioinformojn, televidajn programojn ktp. La gramatiko de papiamento estas treege simpla, kaj en la citita artikolo mi donis plurajn klarigojn pri la strukturo de ĝia leksiko, pri ĝia lingvado ktp.

Nu, ĉar multaj nuntempaj lingvoj similas unu la alian same kiel similas kolibroj kaj goriloj, malgraŭ tio ke en iliaj respektivaj evoluadoj intervenas la samaj ingrediencoj, nome fonoj, fonemoj por la lingvoj, ĥemiaj elementoj por la bestoj, se oni volas spuri la evoluon de unuj kaj de aliaj, oni sin trovas antaŭ grandaj barajoj: necesas trovi fosiliojn same de la besto kiel de la lingvoj. Por la bestoj Darvino trovis vivantajn fosiliojn sur Galapagoj, kaj tiel li povis starigi sian teorion pri la evoluado de la animalaj specioj, el praformoj, laŭ natura elekto kaj selekto. Sed ĉu por la lingvoj troviĝas analogaj fosilioj? Laŭ Bickerton, la kreolaj lingvoj estas la fosilioj de la lingvopaleontologoj, kaj sekve li asimilas la kreolajn lingvojn al la specioj, kiujn Darvino trovis en Galapagoj. Mi nun aldonas, ke necesas meti ankaŭ Esperanton inter tiujn, kvazaŭfosiliojn, se oni volas formuli koheran lingvistikan teorion ĝeneralan.

Dum pli ol dek kvin jaroj Bickerton studis la kreolajn lingvojn de Gvajanio (aŭ Gujanio), de Havajio kaj de multaj aliaj landoj, kaj konstatis, ke ili ĉiuj havas similajn strukturojn - kio laŭŝajne sugestas, ke la homo posedas ian naturan, kunnaskan lingvan logikon, evidentigantan la ekziston de lingva "bioprogramo", kiu muldas, reproduktas la kapablon, la talenton de la homoj por utiligi vortojn. Temas ja pri tre diskutata teorio, kiel asertas kaj mem firme diskutas Claude Hagège en sia libro "L'homme de paroles". Sed Bickerton apogas sian teorion sur tiel ĝissufoke satiga kvanto de konvinkaj atestaĵoj, kiujn li kolektis dank la studadon de multaj malsamaj kreolaj lingvoj tra la tuta mondo, ke oni emas lin pravigi. Laŭ Bickerton, la kreolaj lingvoj nature elvolviĝas, ĉar iliaj strukturoj formiĝis el nenio, t.e. ne deiris de antaŭe ekzistantaj lingvoj. Li aldonas, ke la maniero kiel la infanoj lernas paroli pravigas la ideon pri tio, ke la kreolaj lingvoj reflektas lingvan bioprogramon. Tiuj observoj kondukis Bickerton aserti, ke la kreolaj lingvoj "give us access to the essential bedrock on which our humanity is founded" (irigas nin ĝis la bazaj pilieroj sur kiuj sidas nia humaneco), en la kompreno, ke nur la lingvo distingas nin disde la bestoj, t.e. nin humanigas.

Same la havaja kreola lingvo, kiel la pli ol tricent kreolaj lingvoj de la mondo, dividas preskaŭ identajn sintaksajn kaj semantikajn strukturojn. Ekzemple ĉiuj kreolaj lingvoj posedas tri artikolojn, nome difinitan, nedifinitan kaj nulan. Ili same posedas du ĝeneralajn tempojn: antaŭan kaj neantaŭan; du modojn: realan kaj nerealan. Cetere la kreolaj lingvoj disponas rimedojn por indiki la aspektojn, ĉu ago estas finita aŭ ne. Bickerton aldonas, ke tiuj kaj aliaj, ĝis naŭ, koincidoj konsistigas "strong evidence that some genetic program common to all members of the species was decisively shaping in the creation of creoles" (pli ol sufiĉan pruvon, ke iaspeca genetika programtipo komuna al ĉiuj membroj de la specio estis decidige kunformanta la kreadon de la kreolaj lingvoj).

Kvankam Hagège forte kritikas la teorion pri la lingva bioprogramo, pri la lingvostruktura kunnaskismo, post kiam la kunnaskismaj teorioj de Chomsky kaj aliaj fariĝis misreputaciaj, nu, pri la fakto ke la kreolaj lingvoj reproduktas la manieron kiel formiĝis kaj evoluas la nunaj lingvoj, ambaŭ, Bickerton kaj Hagège, eĉ se nuancigite, koincidas en la fundamentaj ĝeneralaĵoj. Legu ĉe Hagège ĉe la ĉapitro "La laboratoire créole" 2).

Meze inter unue la piĝinoj kaj poste la kreolaj lingvoj, Esperanto naskiĝis unue kiel kabineta artefakto*, kiel lingva artfaritaĵo, kiu, iom post iom, unue kun Zamenhof kiel gvidanto, poste dank al la kunlaborado de esperantistoj el multaj etnoj, pleje laŭ eŭropaj ŝablonoj, ĉefe leksikaj ŝablonoj, sed konservante sian ekstereŭropan aglutinan karakteron, ĉiam evoluante inter diverslingvaj skribosciaj uzantoj, nature ekiĝis per ĉiuj lingviloj de natura esprimmaniero, ĉefe dank la dinamisman kolizadon de siaj du plej karakterizaj tendencoj, nome: tiu, kiu postulas simplecon, eĉ se ĝi signifas malriĉecon; kaj tiu, kiu postulas riĉecon, eĉ se ĝi kunportas malsimplecon. Tiuj du ŝajne kontraŭaj sed vere komplementaj procezoj donis al Esperanto ĉi ties koheron, ĉi ties elanon, ĉi ties lingviĝon, kaj, sekve, ĝian aŭtentikan, legitiman, originalan literaturkapablon.

La libroj de Bickerton kaj Hagège priskribas kiel formiĝis kaj evoluas novaj lingvoj, laŭ procezoj sufiĉe similaj al tiuj, laŭ kiuj tre probable formiĝis la pralingvoj el kiuj devenas niaj nunaj idiomoj. Tre oportunus, ke kompetentaj lingvistoj funde studu Esperanton kaj ĉi ties literaturon kaj lokigu ĝin en la rango, kiun ĝi meritas, ĉar dum sia lingviĝo kaj idiomiĝo ĝi formis al si multajn analogiojn kun la trajtoj, kiuj difinas la kreolajn lingvojn.

Esperanto nome havas la samajn tri artikolojn, kiujn posedas la kreolaj lingvoj, ĉar malgraŭ la fakto, ke la Fundamento diras "Artikolo nedifinita ne ekzistas", jen en la sama Fundamento Zamenhof skribis "Unu vidvino havis du filinojn", frazo en kiu unu rolas kiel nedifinita artikolo. Kelkfoje same rolas iu, ia, certa, kelkaj k.s. Malgraŭ la vualado kaj subtila analizado, kiujn prezentas PAG kaj PIV (eble pro respekto al la dogmo pri la neekzisto de nedifinita artikolo), el lingvistika vidpunkto Esperanto evoluigis kaj posedas difinartikolon, nedifinartikolon kaj nulartikolon, kiel la kreolaj lingvoj. - Esperanto posedas rimedojn por montri la aspektojn de daŭranta kaj de finiĝinta agoj, same kiel la kreolaj lingvoj. Esperanto ne ŝanĝas la vortordon por formi demandajn propoziciojn, dank al la partikulo ĉu kaj al kelkaj tabelvortoj, ĉar tiu sistemo estas pli facila, pli natura ol reordigi la propozicion, kaj simile la kreolaj lingvoj ne ŝanĝas la vortordon por demandi. - Kaj tiel plu. - Necesus solida studado kaj komparo pri la maniero kiel en sia depiĝiniĝo la kreolaj lingvoj kaj en sia lingviĝo la artefakto Esperanto transiris al naturaj lingvoj, kun multaj koincidoj. Por modeste kunhelpi al la havigo de materialoj por tiu studado mi kunflikis la nunan lekcion.

En ĉiu vivanta lingvo, en ĉiu lingvado formiĝas frazeologismoj, lingvofiksaĵoj, kiuj ne estas proprasence disanalizeblaj, sed nur bloke, monolite signifantaj. Ĉar Esperanto estas vivanta lingvo, ankaŭ ĝi posedas frazeologismojn, kliŝlingvaĵojn nur historie-etimologie diserigeblajn, sed ordinare, normale sentatajn kiel idiotismojn estigitajn de sia propra kulturo, do kun Esperanta spirito, kun Esperantosignifa kromenhavo, rolantajn en ordinara konversacio kaj en la literaturo. En la fino mi listigas sortimenton de tiuj frazeologismoj, kiujn kunformis, elfaris la internacia tutmonda, tergloba fenomeno nomata Esperanto. Lingvofenomeno, kiu, cetere, fandis al si propran, apartan etnon, ĉar ĝi posedas ĉiujn bazajn konsistigajn formantojn de etno, nome: lingvon, ideologion, instituciojn. Eble oni objetos, ke tiu etno ne estas space kontinua, t.e., ke ĝi ne havas propran teritorion; ke al ĝi mankas materiaj trajtoj, kiujn posedas la plimulto de la naturaj etnoj; ke aparte mankas al ĝi propra antropologio, propra demografio, propra ekonomio k.s., kaj ke, sekve, en ĝi ne povas aperi patrujideo. Nu, similan fenomenon ni trovas en la juda etno, kiu dum dumil jaroj tranaĝis sian hazardoplenan, riskan ekzistadon, sen antropologia unueco, sen propra geografia teritorio, sen aparta ekonomio, eĉ sen difinita patrujideo, nur dank al tio, ke ĝi posedis propran lingvon, proprajn tradiciojn, proprajn instituciojn. Ke

Esperantujo posedas propran lingvon, proprajn tradiciojn, proprajn instituciojn, mi ne bezonas pruvi tie ĉi.

Unue ni ekzemplu per la vorto esperanto, samaĝa kiel la lingvo mem. Laŭ sia historia lingvostruktura morfologio, esper-ant-o estas aktiva participo substantivigita de la verbo esperi 'atendi kun fido la realiĝon de tio, kion ni deziras'. En siaj "Lingvaj respondoj" Zamenhof diris, ke "en la granda plimulto da okazoj la participa sufikso, laŭ sia senco mem, esprimas ulon, tial laŭ la principo de sufiĉo ni ne bezonas konstante aldonadi al ĝi la sufikson ul". Sekve esperanto estas 'ulo, kiu esperas'. Tiu senco troviĝas, por ekzemplo, en la himno La Espero, verkita de Zamenhof:

Kaj rapide kreskas la afero
Per laboro de la esperantoj.

Sed en 1887 Zamenhof pseŭdonimis sian unuan libron, Lingvo Internacia, per Dr. Esperanto, t.e. "Lingvo Internacia de D-ro Esperanto". Baldaŭ poste oni skribis kaj ekparolis pri la lingvo de Esperanto, formulo kiu sinkope transiris al lingvo Esperanto, kaj pli lingvoekonomie kaj simple nur al Esperanto. Esperanto do fariĝis tute nova vorto el semantika vidpunkto, historie formita laŭ la reguloj de la nova lingvo, sed jam sentita kiel unubloka, monolita radikvorto, t.e. kiel pura neologismo - kio pruviĝas per tio, ke laŭ la propra lingvogenio pluformiĝis Esperanta, esperantaĵo, esperantigi, esperantismo, esperantano, esperantisto, esperantistaro, esperantologo, esperantologio ktp. Per tio esperant- praktike fuĝis, eskapis for de la semantika kampo de esperi kaj, konsekvence, la leksikologoj, kiuj redaktis emzemple PIV kaj "Esperanto-Ĉinan Vortaron" donas esperant- kiel sendependan radikon 3).

En alia ekstremaĵo de semantika neologismado, ni ekzemplu per la vorto kompreneble 'en komprenebla maniero': "li ĉiam parolis kompreneble", kie oni povas disanalizi tiun adverboson laŭ la aglutina karaktero de Esperanto: kompren-abl-e 'en maniero, kiun eblas kompreni'. Sed se ni konsideras la zamenhofan frazon "li kompreneble estis la plej grava", tie oni ne plu alfrontas vorton disanalizeblan laŭ ĝiaj aglutinaj morfemoj: oni alfrontas la blokon komprenebl- plus la adverboson finafon -e, kun la signifo 'memkomprene, memsekve'. La sintagmo kompreneble ankoraŭ apartenas al la semantika kampo de kompren*i*, sed ĝi estas jam semantika kvazaŭneologismo. Al tiu nova signifo multe helpas la intonacio, kaj, sub skriba formo, la krisigno, ekz-e:

- Ĉu vi diskursos en la mitingo?
- kompreneble!

La vorto verda akiris en Esperantujo, jam ekde la jarcentoturniĝo, la simbolan kromsignifon 'Esperanta': La verda standardo 'la Esperanta standardo', la verda stelo 'la insigno de Esperanto'. Verda, kiel semantika Esperanta neologismo, donas okazon al pluformado de vortkunmetoj, ekz-e "verdisma ideologio", "Verdstelaj salutoj", "verdstandardaj kolegoj" ktp. Verda = Esperanta eniris nian originalan literaturon, ekz-e "Verdaj donkiĥotoj" (Baghy, 1933), "Verda parnaso" (I.U., japano, 1932), "Verdkata testamento" (Schwartz, 1926, laŭ la kabareto "verda Kato" de Parizo) ktp. Oni povus plilongigi la liston ĝis supersato per citaĵoj el Baghy (poemoj "Al la venko!", "Estas mi esperantisto"), Kalocsay ("En amara horo", "Rimportreto XXVII"), Nekrasov ("Krono de sonetoj pri Esperanto", "Letero al Leo Belmont"), Schwartz ("Esperanta eliksiro", "Tro!!"), Dresen ("Verdaj plendoj"), kaj en multaj aliaj, kiel oni povas konstati en "Esperanta antologio", kaj aliloke, ĉe Balbin, Boia, Boulton, De Kock, De Jong, Mattos, Miyamoto, Urban, Vallon-Wheeler ktp. ktp. Por ekzemplo Boia, rumano, verkis "Odon al adasismo", kies unuaj versoj tekstas:

En Esperantujo -
De l' Ad-As patrujo -
Vivas verdstelano
... ..

La tuta odo estas komponaĵo ironiumanta pri la rudimenta kutimo rimi per sufiksoj.

Jen laste aldona komento pri la frazeologismo Stafeto-libroj/Stafetaj libroj. Certe dank al tio, ke PIV difinas la vorton stafeto ankaŭ per la kromsignifo "progresema eldonejo en Kanariaj Insuloj" (kun jam apenaŭ forigebla eraro, ĉar Stafeto neniam estis eldonejo - sed nur marknomo; ĉiuj libroj indikas: J. Régulo - Eldonisto), la sintagmo Stafeto-libro(j) indiĝeniĝis kaj estas netradukebla en aliajn lingvojn sen granda parafrazo. Ĉar, kiel komprenigi al eksteresperantaj homoj la konotaciojn*, la ideoasociojn kaj rememorojn pri la historiaj, fizikaj kaj enhavaj valoroj, kiujn tiumentaj libroj elvokas ĉe kulturesperantistoj, plu la beletran aŭreolon, kiu nimbas titolojn kiel "Kvaropo", "La bapto de caro Vladimir", "La Zamenhofa Esperanto", "Libro de amo" ktp. Nur indiĝeniĝintaj kulturesperantistoj povas kapti tiun pure Esperantan spiriton, ĉi ties aromon...

Simile ni povus pluki kaj klarigi multajn aliajn aperaĵojn, frazeologismojn de nia internacilingva kulturo, fanditajn kaj

mulditajn de Esperanto dum ĝia lingviĝo kaj lingvado. Sed ni devas ja limiĝi, en la kadro de lekcio, al kurta specimenaro de niaj frazeologismoj, sen aldonaj formiĝokomentoj kaj montrado de ilia semantika evoluo – kio por kulturesperantistoj ne kunportas apartajn signifoproblemojn. Jen ili:

adasismo. Registrita en PIV kiel ad-as-ism-o, sed jam listigita en "Esperanto-Ĉina Vortaro" kiel radiko: adasism-o. Kalocsay versis:

Poste, vin gardu, kiel de abismo,
de la mucida, teda adasismo.

ata-ita. En "Bonan matenon, Majstro", poemo verkita de Auld en 1968, troviĝas:

Ne pensu, ke ni nenion faradas survoje!
Al ata-ita ni multe da tempo dediĉas!

Budapeŝta Skolo.

Bulonja Deklaracio.

ĉevaleto.

eterna komencanto.

fina venko.

Fundamento de Esperanto aŭ simple Fundamento.

ĝisostulo.

homaranismo.

ili-iŝi. Auld versis:

La veron plu konservis ili-iŝi.

interna ideo.

io/ujo-batalo.

ivo 'povo, kapablo fari ion'. Rilate kun la sekso Auld versis:

Kial, se daŭras ivo,
ne indas plu la peno?

kabei.

krokodili. Ankoraŭ sen science starigita semantika etimologio. Hilda Dresen, estonino, skribis pri la "kavaliroj de alta ideo" en sia poemo "Verdaj plendoj":

... ..
kotizon al la kasisto sendu,
sed admonojn ni malatentu,
nur krokodilu aŭ silentu,
indiferentu,
maldiligentu
kaj restu bonaj esperantistaj tipoj:
nin zorge gardu de labortroo,
en la esperantista zoo
ni estu la bradipoj.

Majstro.

neŭtralisma sinteno.

Principaro de Frostavallen.

samideano. Kalocsay skribis:

Vendiĝas la romanoj, kvazaŭ pano,
sur versojn – kraĉas la samideano.

Sennaciismo, sennacieco.

speso 'Esperantista mon-unuo', vorto, kiun Zamenhof proverbe eternigis:

Li faras princan promeson, sed ne havas eĉ speson.
Se ĉiu speson donos, malriĉulo malsaton ne konos.

Stafeto-libro, Stafeta libro.

stelo 'esperantista mon-unuo'.

ŝlosilo 'libreto por tuj kompreni simplan Esperantan tekston'.

talpa laboro.

tabelvorto(j).

ktp.

Mi volas fini per poemo de nia eminenta, antonomazia poeto, William Auld. Mi rilatas kun multaj esperantistoj. Por granda plimulto Esperanto estis io kroma, ne ĉefa, vitala. Por Auld, de kiam mi lin konas, Esperanto estas la esenco de lia vivo. Pri lia poeteco mi ne kapablas kompetence juĝi. Edwin de Kock, Aldo de' Giorgi, Marjorie Boulton, mem elstaraj poetoj, en siaj brilaj eseoj pri la originala poezio de Auld, aperintaj kiel enkonduko al ĉi ties plena originala poemaro, 874-paĝa volumo sub la titolo "En barko senpilota", asertas lin unu el la ĉefaj fortoj de la Internacia Lingvo; laŭ multaj, ĝia plej granda poeto. Neniam mi

Dank al tiu perfekta simbiozo inter poeto kaj sia lingvo, Auld artisme vivantigis multajn latentajn de Esperanto per elvokivaj frazeologismoj, kiaj ekz-e ĉeuloj, landaŭe, nenieso ktp. ktp. En 1969 mi eldonis lian libron "Humoroj" kun poemoj, kiujn li verkis en 1968. Unu el la arte pintaj pecoj de tiu libro, "Simfonieto", konsistigita de kvar partoj, finiĝas per jena poemo:

56

Ĉirkaŭokule maljunfaloj frostas,
la ĉirkaŭkora folrempar' kadukas;
stalon' batalhardita elstarostas,
iomiaa haremul' eŭnukas:
ne ĉiufoje, nek en ĉiu loko,
sed la spegulrigardo troreĵetas
seniluzion de l' orgojlomoko
kaj durlinie konturmagron kretas.

Mi cerboscie certas ke l' momento
eksplosos junprajmite, proidee;
sed arterioj skleraj de l' prudento
dehiskas. Oni grincas surglutee.
Tamen, se l' paradokson redeklaros,
el konvinkigo korofundsentita,
kreskantoj, mi ne kastre kontraŭstaros
sed hurapretos kvazaŭ prozelita.

Spegulrompiĝo.
 Nana grandegulo
 ekbalgas sin
 senbride antaŭkadre,
 kaj algalopas
 nenombrebla nulo
 da trompdragonoj hirtaj,
 fantomskadre.

Kontraŭ la kutimo de certaj novismuloj, kiuj farĉas siajn esperantaĵojn per troo da neologismoj, ĉiuj vortoj de tiu ĉi poemo troviĝas en PIV. Kaj tio ne malhelpis, ke Auld abunde metaforadu, aliteraciadu kaj, per aŭdacaj vortkunmetoj kaj per videbligo de latentaj, ke li montru la poveblojn de la lingvo por formi proprajn frazeologismojn kaj ke tiel li riĉigu ĝin per idiomaj kongeniaj, klare kaj senpere kompreneblaj, sen neceso transplanti alies pensokutimojn, sed forĝante propran spiriton. Neniam antaŭe mi trovis tiel elstaran ekspluatadon de la fundamentaj virtualoj de Esperanto. Plej probable neniu alia originala verkisto de Esperanto tiel flue kaj nature evoluigis nian lingvon. Ekzemple japanino Akiko Nagata piedas por formoj kiaj aseco, iseco, oseco k.s.; sed jen, jam dudek jarojn antaŭe, Auld artisme uzis kaj eĉ superis tiujn frazeologismojn, kiel montras la supra poemo.

En la lingviĝo kaj lingvado de Esperanto, same kiel en la lingviĝo kaj lingvado de la kreolaj lingvoj, la lingvistoj havas laboratorion, kie ili povas bildigi al si kiel naskiĝis ĉiuj lingvoj, kies origino datiĝas en nespureblaj pratempoj. La kreolaj lingvoj kaj Esperanto fariĝis do naturaj laborejoj, kiuj spontane restituas la naskiĝokondiĉojn de la lingvoj, ilian ontogenezon kaj filogenezon. La kreolaj lingvoj kaj Esperanto prezentas jam nemalhaveblajn atingojn por la ĝenerala lingvoscienco.

Mia konvinko estas, ke la nun jarcenta Esperanto kaj ĉi ties literaturo, lingvofenomenoj jam elstare, rimarkinde kaj firme defilantaj per eseoj, universitataj disertacioj, doktoraj tezoj k.s. post nelonge konstituos apartan, jam neignoreblan organ(ik)an studfakon de la homaj sciencoj. Tiumaniere, la homarana elpaŝo de la ruslanda hebreo Lazaro Ludoviko Zamenhof, t.e. la Internacia Lingvo, atingos sian definitivan glorkronon.

GLOSOJ

artefakto (angle artefact, germane Artefakt, hispane artefacto).

Faritaĵo (meĥanismo, maŝino, aparato) konstruita laŭ arteleĝoj.

fono (france phone, germane Phon, hispane fono). Segmento de la sona kontinuaĵo, rezultinta el fonetika analizo. Jamregistrita de Krause.

konotacio (angle kaj france connotation, hispane connotación).

Valoro sekundara, kiu ĉirkaŭumas vortosignifon aŭ lingvouzaĵon, ene de la valorsistemo de lingvo.

BIBLIOGRAFIO

- William Auld, "Esperanta antologio", 2-a plivastigita eld.: Rotterdam, UEA, 1984.
- William Auld, "En barko senpilota", Pizo, Edistudio, 1987.
- Sharon Begley, recenzo pri la tie ĉi listigita Bickerton-libro, sub la titolo "The Fossils of Language", en *Newsweek*, 15 marto 1982, pĝ. 57. En la angle parolantaj landoj la libro de Bickerton havis grandan eĥon.
- Derek Bickerton, "Roots of Language", Ann Arbor, Karoma, 1981.
- "Esperanto-Ĉina Vortaro", 1036 paĝoj, Pekino, Ĉina Esperanto-Ligo, 1987.
- Claude Hagège, "L'homme de paroles. Contribution linguistique aux sciences humaines", Paris, Fayard, 1985.
- Erich-Dieter Krause, "Wörterbuch Deutsch Esperanto", VEB Verlag Enzyklopädie, Leipzig, 1983.
- Kálmán Kalocsay & Gaston Waringhien, "Plena analiza gramatiko de Esperanto" = PAG, 4-a tralaborita eld., Rotterdam, UEA, 1980.
- Akiko Nagata, "Lingvikaj vortoj de Esperanto el la vidpunkto de japanlingvano", en *Serta gratulatoria in honorem Juan Régulo*, II, "esperantismo", La Laguna, Universidad, 1987, pĝ. 479-484.
- "Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto" = PIV, Paris, SAT, 1970.
- Juan Régulo Pérez, "Esperanto kaj Papiamento": la plej simplaj gramatikoj", en *Heroldo de Esperanto*, 3, 4-5, 1987.
- Juan Régulo Pérez, "Frazeologiaj sintagmoj en la Internacia Lingvo", en *Esperanto* (de UEA), 7-8, 1987.
- John Wells, "Lingvistikaj aspektoj de Esperanto", Rotterdam, UEA, 1978.
- Lazaro Ludoviko Zamenhof, "Lingvaj respondoj", 6-a eld. editorita de Gaston Waringhien, Marmande, Esperantaj Francaj Eldonoj, 1962.
- Lazaro Ludoviko Zamenhof, "Fundamento de Esperanto", 9-a eld. editorita de André Albault, Marmande, Esperantaj Francaj Eldonoj, 1963.

PAĜOPIEDAJ NOTOJ

- 1) Por aperloko, aperdato, eldonejo ktp. vidu la Bibliografion.
- 2) Claude Hagège, franco, universitata profesoro, estas aŭtoro de dek libroj pri la lingvo; li verkis pri lingvoj de Afriko (Kamerunio, Ĉadio), de Oceanio (Mikronezio), de Eŭropo kaj de


la araba mondo, de Ĉinujo kaj de la indianaj rezervejoj de Brita Kolumbio (Kanado) ktp. Lia lingva erudicio forte mirigas.

3) S-ro Gerrit Berveling, el Nederlando, skribis al mi la 12-an de aŭgusto 1987, ke li aŭdis voĉlegi, en Graz, resumon de lekcio, kiun mi intencis tie prezenti - kion mi ne faris, ĉar mi ne povis persone ĉeesti. Li sendis al mi jenan noton, kiun li poste apogis per sendo de fotokopioj de la unuaj Esperantaj dokumentoj:

"Nu, miaopinie vi ne tute pravas en tio / ke la vorto esperanto estas idiomaĵo farita sur la verbo esper/ - se rigardi historie. Ĉar en la unua eldono de la rusa "Unua Libro", en la vortaro staras la verbo sper (anstataŭ la hodiaŭa esper). Tamen la kaŝnomo de D-ro L.L. Zamenhof jam tiuverke estis D-ro Esperanto. Do, fakte, en tiu unua eldono de la rusa "Unua Libro", Esperanto ne devenas de la verbo esper, ĉar tiu verbo ne jam ekzistis: ekzistis la verbo sper."

D-ro André Albault, en sia eldono de la "Fundamento", indikas tiun lecionon de la ULr, kiu baldaŭ estis korektita. Supozeble temas pri preseraro; D-ro Albault klinemas al tiu supozo. Kp. la paron vipero/vipuro de la "Fundamento", kies duecon poste Zamenhof konfesis preseraro per sia Lingva Respondo 45.

"MEMORE AL IVO LAPENNA"



MEMORE AL IVO LAPENNA

La unua eldono de nia broŝuro pri Ivo Lapenna disvendiĝis. Pro tio ni presigis duan, pli ampleksan eldonon.

La broŝuro estas verkita de 45 esperantistoj kaj fakaj kolegoj. Prezo: 90 d.kr. inkluzive sendokostojn.

Mendebila ĉe Eldon. Perspektivo, Nørregårdsvej 91, DK-2610 Rødovre, Kopenhago, Danio.

Ĝirkonto: 1 19 06 01

Claude Gacond:

CENT JAROJ DE ESPERANTO-INSTRUADO

KONSTATO

Dokumentante pri la temo Esperanto-instruado mi perdis la iluzion, ke tiu instruado daŭre progresis, kiel emas opinii la esperantistoj. Statistike, sojle de la dua jarcento, la lingvo ne estas pli grandkvante instruata en publikaj lernejoj, ol ĉirkaŭ la jaroj 1922, kiam Pierre BOVET enketis por la raporto al Ligo de Nacioj, aŭ antaŭ dudeko da jaroj, kiam disvolviĝis kun granda entuziasmo kampanjoj favore al la enkonduko de Esperanto en la lerneajn programojn.

Iom atenta ekzameno de la diversaj situacioj montras, ke la granda plimulto el la instru-eksperimentoj estas la rezulto de la strebado de izolitaj pedagogoj. Ilia proponon instrui Esperanton ĉu en la normala instru-horaro, ĉu ekstere de ĝi sub formo de elektebla fako, bonvole akceptas la koncernaj lerneaj aŭtoritatoj. Sed kiam la koncerna pedagogo, pro iu ajn kaŭzo, rezignas je la plua gvidado de la kurso, malofte pludaŭras la eksperimento. Tio ne nur karakterizas la elementan kaj mezan instrunivelojn, sed ankaŭ la superan en fakaj altlernejoj kaj en universitatoj. En ĉiuj niveloj ĝi pli dependas de la iniciato mem de la koncernaj instruistoj, ol de la volo de la decidpovaj instancoj. Eĉ kiam Esperanto estas listigita inter la elekteblaj lerneblaj lingvoj en egaleco kun la aliaj, la eblo lerni ĝin ĉefe dependas de la ekzisto en la lernejo mem de sindonema kaj iom propagandema instruisto. Pro tio kelkaj eksperimentoj, kiuj estis vastskale diskonigitaj kaj ŝajnis malfermi la vojon al novtipaj eksperimentoj, subite ĉesas eĉ ne lasante alireblan spuron sub formo de konkluda raporto. Verŝajne la instruisto aŭ instruistaro, de kiu aŭ kiuj dependis la provo, perdis la kuraĝon ĝin daŭrigi aŭ ne povis pli longe persvadi la lernej-aŭtoritatojn aŭspicii la provon, aŭ eĉ konvinki la lernantojn aliĝi al la kurso. Estas fakto, ke tre ofte tiuj kursoj disvolviĝas en malfacilaj cirkonstancoj: horaro nekonvena por ĉiuj interesatoj apartenantaj tre ofte al malsimilaj klasoj, manko de financaj rimedoj dependiganta ĉion de la malavareco mem de la instruisto kaj de la interesatoj gelernantoj. Esperanto ne estas prestiĝa afero.

Mi persone travivis dek-unu fojojn tiun ĉi situacion. Mian unuan instru-eksperimenton okazigis favoraj cirkonstancoj. En la vilaĝo

La Sagne apud la urbo La Chaux-de-Fonds, kie mi tiam instruis, restadis ĉe mi dum pluraj semajnoj hungara esperantisto fuĝinta el sia lando en 1956, kaj la vilaĝanoj havis la okazon paroli kun li tra mia interpretado. Kiel ĉiam okazas en tiaj konversacioj, ili informiĝis, kial oni ne instruas Esperanton en la lernejoj. Kvazaŭ klasika demando! Al la membroj de la lerneja komisiono mi respondis, ke tio ne dependas de mi, sed de ili. Kaj la propono, ke mi eksperimente instruu Esperanton al la interesataj gelernantoj alvenis de la lerneja komisiono mem kun la apogo de la lernejinspektoro. La raporto pri tiu eksperimento kompletigis mian pedagogian diplom-laboron, kiu estis dediĉita al la interlerneja korespondado. Mi proponis instru-planon, kiu estis akceptita kun laŭdoj, sed sen aliaj rezultoj, ol poste kuŝi en dosierujo de la porinstruista lernejo, kie ĝi tre verŝajne daŭre troviĝas.

Tutcerte la manko de premgrupo apoganta tiajn eksperimentojn sensignifigas ilin je la okuloj de la decid-povaj instancoj. Eĉ se ili havas estimon por Esperanto kaj por la proponoj instrui tiun lingvon internacian, ili fakte havas aliajn zorgojn, ol okupiĝi pri tiu ne tre grava demando. Ekzistas pli prestiĝaj proponoj apogitaj de premgrupoj. La situacio ne multe ŝanĝiĝis ekde 1956 ĝis nun. Mia lasta eksperimento, kiu efektiviĝis en elementa lernejo de la urbo La Chaux-de-Fonds de marto 1977 ĝis majo 1978 konkludiĝis per raporto, kiun la komisiono "Esperanto Lernejen" de Kultura Centro Esperantista publikigis en 1979. Vastskala disdono de tiu 25-paĝa franclingva dokumento kaŭzis plurajn tre pozitivajn kontaktojn kun lernejdirektoroj kaj kun instruistoj. Samjare disvolviĝis du tre konstruigaj debatoj, sed montriĝis, ke la tuta pezo de la entrepreno restas fakte sur la ŝultroj de la Esperanto-pedagogoj mem.

Mi persone konvinkiĝis, ke tiom longe, kiam ni restos en tiu periodo de la Esperanto-instruado, ni ne esperu multon pli, ol eksperimentojn pli malpli sukcesajn, kiuj ĉiam kondukos al la samaj konkludoj: ke Esperanto estas instruebla en la lernejoj, kaj ke tiu ĉi instruado havas pozitivajn konsekvencojn sur aliajn instruadojn: tiun de la gepatra lingvo (kiel oni ĝenerale nomas la oficialan lingvon, en kiu disvolviĝas la instruado mem, kvankam minoritato da gelernantoj havas fakte aliajn hejmajn lingvojn), la instruadon de la aliaj lingvoj klasikaj aŭ vivantaj, kiel oni ilin nomas, kaj fine ofte aliajn instru-fakojn: geografion, natursciencojn, ktp.

Eksperimentoj, kiujn nuntempe kuraĝe gvidas en la ital-lingva kantono Tiĉino la eksinspektoro lerneja Dante BERTOLINI, pravas la samon. Nuntempe en la porinstruista lernejo de

Locarno la Esperanto-instruado restas dependa de la iniciato kaj energio de tiu eksterordinara pedagogo kaj poeto, kiu bedaŭrinde maljuniĝas. Kaj ĝi bedaŭrinde ne ricevis la necesan apogon de la esperantistaro, kiu ne reagis kiel premgrupo preta defendi la Esperanto-konkeron.

Diskutoj kun instruistoj el la tuta mondo, kiuj daŭre vizitas min en La Chaux-de-Fonds, konvinkigis min, ke samas la situacio en ĉiuj landoj de la mondo, eĉ en tiuj, kie Esperanto konkeras la lernejojn, laŭ onidiroj aŭ entuziasmigaj artikoloj en la Esperanto-revuoj. Kiam mi petas precizajn faktojn, realajn statistikojn, protokolojn de lernejaj decidoj, instru-planojn, ktp., malmulton realan mi ricevas, krom efemeraj projektoj de kelkaj propagandistoj, kiuj baldaŭ trovos novan laborkampon por siaj supraj agadoj.

La daŭraj agadoj plej ofte dependas de homoj, kiuj malmulte bruas eĉ en la propra lernejo. Ili nelacigeble daŭrigas sian pioniran laboron ne havante tro da iluzioj kaj sciante, ke eĉ la plej entuziasmaj artikoloj en Esperanto-revuoj ne multon alportos. Plej ofte la progreso de la instru-rimedo kaj de la Esperanto-metodiko iradas tra ilia persista agado. Plej signifa estas tiurilate la verkaro de D-ro István SZERDAHELYI, de kies energio dependas ankoraŭ nun la Esperanto-instruado en la Budapeŝta Teknika Universitato. Ĝi fariĝis por la Esperanto-pedagogoj labor-fundamento firma. Kaj ĉies espero estas, ke kiam emeritiĝos tiu granda pioniro de la Esperanto-instruado, la koncerna universitato ne profitos ĉesigi aŭ duarangigi la koncernan fakon. Ĝi nepre trovu posteulon, kiu havas la karakteron de pioniro. De tio dependas, ĉu Budapeŝto restos aŭ ne la lumturo de la Esperanto-metodologio.

Fine de tiu ĉi enkonduko iom pesimisma mi citos konkludajn rimarkojn el la kvara ĉapitro de la enciklopedia verko "Esperanto en Perspektivo" aperinta en 1974. La 45 paĝoj, kiujn en ĝi D-ro Ivo LAPENNA dediĉis al la temo "Instruado de Esperanto" finiĝas per tiuj daŭre aktualaj vortoj, kiuj bone pravas, ke ni restis en la sama epoko (p. 108):

"Iom atenta studo de la publikigitaj materialoj montras, ke en la postmilita periodo estas farita daŭra, solida progreso, kvankam certe ne spektakla, malgraŭ multaj malfacilaĵoj. Evidentiĝas ankaŭ, ke en multaj kazoj estas rimarkebla konsiderinda fluktuo: enkonduko de la lingvo en la lernejojn kaj instruado dum kelkaj lernejaj jaroj, kaj subita malapero el la instruprogramoj. Aliflanke, ekzistas ankaŭ multe da konstanteco en aliaj kazoj: seninterrompe la samaj lernejoj aperas en la

statistikoj. Estas sendube, ke la situacio multe dependas ne nur de la kvalito kaj amplekso de agado en lernejoj medioj, ĉu fare de unuopuloj, ĉu de la kompetentaj Esperanto-organizaĵoj, sed ankaŭ de la starpunkto, kiun havas la edukaj aŭtoritatoj; kaj tiu starpunkto siavice multe dependas de la ĝenerala politika klimato en unuopa lando en difinita periodo."

EKSTERLERNEJA INSTRUPERIODO

En ĉiu retrospektiva analizo de fenomeno oni emas proponi karakterizajn periodojn. Koncerne la instruadon de Esperanto, ju pli mi enprofundiĝas en la demandon, des pli mi konvinkiĝas, ke ĉio disvolviĝas tre malrapide, kaj ke ni daŭre troviĝas en la enkonduka kaj pionira fazo. Estas antaŭvideble, ke foje Esperanto estos lerneja fako en egaleco kun aliaj. Sed nun la Esperanto-instruado okazas plej ofte ekster la lernejoj. La Lingvon Internacian de D-ro Esperanto oni ĝenerale lernas mem aŭ en klubaj rondoj okaze de vesperaj aŭ semajnfinaj kursoj; fakte nur parteto el la esperantoparolantoj intimiĝis kun la lingvo pro lerneja eblo. Tial la aĉetebraj lerniloj ĉefe celas eksterlernejajn mediojn.

Ne ekzistas seriozaj statistikoj pri la maniero lerni Esperanton, sed niaj sondadoj ĉe Kultura Centro Esperantista montras, ke tre verŝajne nuntempe maksimume 2 procentoj el la esperantistoj ŝuldas sian konon de Esperanto al lerneja instruado. Proksimume 4 aŭ 5 procentoj intimiĝis kun la lingvo en la familia medio. La aliaj esperantistoj aŭ memlernis la lingvon: 40 procentoj proksimume, aŭ frekventis pli malpli regule kaj entuziasme klubajn kursojn ĝenerale vesperajn aŭ semajnfinajn: 50 procentoj.

Sed ni revenu al la temo lernolibroj. La Esperanto-lernolibroj havas grandajn similecojn kaj komunajn mankojn. Ili ne celas la ellernon de la lingvo kaj ekzercigas la samajn listojn de prefiksoj kaj sufiksoj sen antaŭesploro, ĉu aliaj afiksoj devus esti ankaŭ menciitaj. Por la daŭriga instruado la libro "Paŝoj al plena posedo" de William AULD ne havas konkurantojn. Mankas enkondukaj verkoj al la studo de la historio kaj literaturo de Esperanto.

Kritika trastudo de la aperintaj lernolibroj montras, ke ili ĉefe apartenas al la pertraduka instruado. Ili proponas vortojn, tekstojn, gramatikajn ekzercojn kaj respondotajn demandarojn. Ili bedaŭrinde ne proponas strukturŝanĝajn ekzercojn.

RAPIDA AKCEPTO DE LA VORTFARADA TEORIO DE RENE DE SAUSSURE

La vortfarada teorio de René de SAUSSURE historie ludis decidigan rolon. Antaŭ la lanĉo de lia konkurso pri la signifo de la vorto GRANDO, en la lernolibroj la vortfaradaj klarigoj estis tre nebulaj kaj diverĝaj. La danĝero de la ldo-skismo instigis la esperantistojn ekobservi sian lingvon kaj la priskribo de René de SAUSSURE renkontis unuaniman akceptemon. Zamenhof mem bonvenigis ĝin, la Akademio de Esperanto oficialigis ĝin kaj la kursverkantoj trovis en ĝi la necesan komplementon al la "Fundamento de Esperanto", kiu estis tro minimuma bazo kun kelkaj kontraŭdiroj.

Do se oni volas nepre decidi pri periodoj en la disvolviĝo de la Esperanto-instruado, oni parolu pri la antaŭ-desauŝura periodo, ĉar la lerniloj eldonitaj antaŭ la publikigo de "La Vort-teorio en Esperanto" ne longe postvivis la jaron 1910. Inter ili ni menciuj la lernolibrojn de Louis de BEAUFONT kaj iliajn tradukojn. Ili devis resti repensitaj. La efemera sed efika aktiveco de Instituto de Esperanto fondita en 1908 kun la celo okazigi ekzamenojn kadre de kongresoj, kun siaj sidejoj en Ĝenevo, Parizo kaj Nov-Jorko, dank al la dinamismo kaj efika laboro de Edmond PRIVAT kaj de liaj helpantoj en Svislando, Francio kaj Usono, multe kontribuis al la rapida diskonigo de la desauŝura vortteorio. Ankaŭ multe helpis tiun diskonigon la fakto, ke Hector HODLER kapablis kunlaborigi la esperantistaron kadre de la promesplena Universala Esperanto-Asocio, kies sidejo estis Ĝenevo, la urbo de René de SAUSSURE, kaj ke Ferdinand de SAUSSURE, la patro de la moderna lingvistiko, estas fakte la frato de René de SAUSSURE. Tiu parenceco efikis pozitive.

KONFERENCO PRI ESPERANTO EN LERNEJOJ

La unua mondmilito plifortikigis la influon de Ĝenevo. La naskiĝo de Ligo de Nacioj turnis ĉies rigardojn al la urbo pedagogie renoma pro la avangardismo de Instituto Jean-Jacques Rousseau, kaj ĝuste Pierre BOVET, la direktoro de tiu fako de la ĝeneva universitato, invitis kaj prezidis la Konferencon pri Esperanto en Lernejoj. La unua okazis en pasko 1922 en Ĝenevo mem kunvenigante plurajn centojn da instruistoj el 28 landoj kaj 16 reprezentantojn de registaroj. Estis antaŭvidite, ke tiu konferenco kunvenos ĉiujn 5 jarojn. Bedaŭrinde nur la 2-a povis disvolviĝi en pasko 1927 en Praha. Ĝia temo estis "Paco

per Lernejo". La renaskiĝo de la naciismoj, kiu fine kondukis al nova mondmilito, krizigis la Esperanto-movadon ekde la jaroj tridekaj, kaj en 1932 la etoso jam ne plu favoris la kunvokon de la konferenco. Iom postiom Ĝenevo ĉesis ludi ĉefrolon. Internacia Esperanto-Ligo konkurencis kun UEA kaj rigardis al Britio.

Laŭ sciencaj kriterioj Pierre BOVET daŭrigis la enketon pri la instruado de Esperanto en la lernejoj, kiun li komencis en 1920. Lin tre efike helpis Henriette ITH; sed fakte nur post la dua mondmilito, tio estas en 1948, ili fine publikigis raporton pri tiu enketo dank' al la eldona helpo de Sveda Esperanto-Federacio. Ne plaĉis al IALA (International Auxiliary Language Association), kiu aŭspiciis la enketon, ke tiu ĉi pruvis, ke inter ĉiuj planlingvaj projektoj nur Esperanto estis fakte instruata en lernejoj kaj privataj kursoj. Mankis al Pierre BOVET la rimedoj por pli rapida laboro, ĉar IALA ĉesis subvencii lin. La ĉefaj Esperanto-organizaĵoj ne kunlaboris por anstataŭi IALA-n. Fakte en la tuta historio de la Esperanto-instruado ni neniam konstatas veran kunlaboremon de la ĉefaj Esperanto-organizaĵoj favore al objektiva enketado pri Esperanto. Estas pro tio, ke daŭre mankas al ni statistikaj konfirmoj pri la disvolviĝo mem de Esperanto. Tiurilate la enketo de Pierre BOVET estas unikaĵo. Ĝi okazis, ĉar verŝajne ĝi estis entreprenita de neesperantista organizaĵo.

INTERNACIA ESPERANTO-INSTITUTO

Edmond PRIVAT retiriĝis en la itallingvan kontonon Tiĉino post kiam li estis fondinta kun Andreo CSEH Internacian Esperanto-Instituton, kiu rigardis al Hago. Ekde tiam Nederlando ekludis kreskantan rolon, unue pedagogie, kaj post la dua mondmilito ĉefe organize.

Fakte la Cseh-Metodo ekludis ĉefrolon en la Esperanto-instruado ekde la jaroj tridekaj. La Cseh-Instituto, tiel oni eknomis Internacian Esperanto-Instituton, kapablis ne nur lanĉi tre efikan instru-teknikon, kiu evitis la tempoperdan tradukan instruadon. Tiu metodo estis ĉefe paroliga, dum la tradiciaj lerniloj ĝenerale orientas la studentojn al la skriba uzo de la lingvo.

CSEH samtempe kapablis kontroli kaj kunordigi vastskalajn instru-kampanjojn, kiujn la postmilita movado envie rememorigas. Lin helpegis kun neimagebla sindono dudeko da bone trejnitaj kaj tre talentaj instruistoj. El tiuj kolegoj de Andreo CSEH ni

nepre memorigu la nomojn Tiberio MORARIU, Julio BAGHY kaj Lidia ZAMENHOF.

Edmond PRIVAT, kiu fondis en 1925 Internacian Someran Universitaton, rapide konstatis, ke tiu institucio restos enfermita en la Universala Kongreso de Esperanto. Li kontraŭe esperis, ke dum la tuta somero, antaŭ kaj post la Universala Kongreso de Esperanto, ĝi kunvenigos la profesoraron kaj studentaron esperantlingvaj el la tuta mondo al kurssesioj, kiuj fariĝos pli kaj pli allogaj kaj kulture signifaj. Estis tro frue. Tial li helpis al Andreo CSEH cele al organizo de feriaj kursoj universitat-nivelaj. Ili devis doni la eblon ellerni Esperanton kaj helpe de tiu lingvo plikleriĝi en kontakto kun mondkonataj instruistoj kaj verkistoj. La urbo Arnhem apogis tiun provon kaj unu el la fruktoj de la unua somera kurssesio estas la libro "Esprimo de Sentoj en Esperanto". En la sepdekaj jaroj renaskiĝis la ideo pri universitat-nivelaj kursoj, kaj SUK (Someraj Universitataj Kursoj) celas tiun vojon bedaŭrinde sen tre vigla apogo de la movadaj institucioj. Eble la San Marina pli allogos.

Sed la dua mondmilito baldaŭ ekfuroris, kaj post la jaroj kvindekaj ĉio estis refarota. La tiamaj pioniroj ne plu havis la forton direkti la pedagogian movadon. Edmond PRIVAT kaj Andreo CSEH propagandis la mond-federalismon kadre de Universala Ligo. Eĉ la organo "La Praktiko" perdis sian rolon praktikigi Esperanton al la novbakitaj kursanoj, meti ilin en kontakton kun la verkistoj, informi ilin pri la okazintaĵoj, raporti pri la okazintaĵoj. Tiurilate neniuj organoj transprenis tiun ĉi funkcion.

NOVA GAMO DA LERNOLIBROJ

Ne tuj proponiĝis novaj metodoj kaj neniuj agadcentroj akiris la prestiĝon kaj dinamismon de la tiama Cseh-Instituto, kiu daŭre vivetas. Ni menciuj kelkajn nomojn, sciante, ke ni tre verŝajne ĝuste forgesas tiun, kiun niaj aŭdantoj estus menciintaj: "Esperanto laŭ Metodo Friis" kaj la someraj kursoj en Danlando kondukis centojn da eŭropanoj al nuancita lingvouzo. "Esperanto-Programita" de Hermann BEHRMANN lanĉiĝis laŭ komercistaj kriterioj, kiuj efike diskonigis Esperanton en germanlingvaj teritorioj. "Ĉu vi parolas Esperante?" de A. PETTYN influis multajn postajn kurs-verkantojn kaj tutcerte efike paroligis la komencantojn en Pollando. La "Perkorespondaj kursoj programitaj por franc- kaj german-lingvanoj" de Kultura

Centro Esperantista en Svislando havas videblan efikon. El Hungario disradias la instru-konsiloj de István SZERDAHELYI, kiujn konkretigis la iom tro tradicia lernolibro "Esperanto Internacia". Hodiaŭ la libro "Saluton!" aŭ "Esperanto aŭtodidakte" de Audrey CHILDS-MEE apogas la revivigon de la Cseh-Metodo kaj la lerniloj de la "Zagreba-Metodo" vekas novajn entuziasmojn: Claude PIRON metis sian verkistan talenton je ĝia servo. Liaj kanzonoj kaj romanoj por komencantoj avantaĝe anstataŭas la eksmodiĝintajn "Karlo" de Edmond PRIVAT kaj "La Verda Koro" de Julio BAGHY.

Kio karakterizas la menciitajn librojn, tio estas, ke vortare ili baziĝas sur listoj ne plu rekte dependaj de la "Fundamento de Esperanto", sed de registrado de la plej oftaj vortelementoj. Pierre BOVET unue diskonigis tiun farmanieron, kiu estis jam praktikata por la nacilingva instruado. La komputiloj bedaŭrinde ne multe progresis tiun statistikadon, kiu estus povinta indiki, en kiuj vortoj aperis la registritaj plej oftaj vortelementoj. Tio fakte donus tre valorajn indikojn al la kursverkistoj. Estus ankaŭ ege utile ricevi la propoziciojn, en kiuj la verboj transitivaj kaj netransitivaj videbliĝis. Tio povus doni vortordajn indikojn kaj fundamentajn fraserojn. Esploroj povus faciligi la instruadon de la participoj. Laŭ la serĉado, kiun mi persone kondukis kun miaj limigitaj rimedoj, tre malofte la verbo "esti" akompanas ilin, kontraŭe al la lernolibra instruado. La participoj uzataj kiel adjektivoj plenumas ĉefe rolon aspektan, dum la lernolibraj ekzemploj kredigas al tempa funkcio. La kverelo ata-ita tre verŝajne fontas el artefaritaj ekzemploj daŭre imitataj el la unuaj lernolibroj de Louis de BEAUFRONT.

Pro manko de esperantologia formado kaj trejnado la komputistoj ne pretas por esploroj didaktike utilaj. Ili kontentiĝas ripeti jam entreprenitajn enketojn, kiujn ili ne konas pro manko de bibliografiaj sciigoj.

Fakte la nivelo de iu ajn instruado pli dependas de la ekzisto de bonaj bazaj verkoj, ol de la instruistaro mem. Sen metodikaj helpiloj la instruantoj perdas enorman tempon por pretigi propran materialon malprofite al la memklerigo. Tion verŝajne ne komprenis ĝis nun la gvidantoj de la Esperanto-movado kaj la plimulto el la instruantoj de Esperanto. Multaj mondlingvanoj eĉ kredas, ke Esperanton oni plej bone lernas, ĝin instruante al aliaj. Ili ne sentas, ke antaŭ ol instrui ion, tion oni devus unue ellerni.

Kio bremsas la progresojn en la Esperanto-didaktiko, ne nur estas la ĵus priskribita sinteno, kiu estas sufiĉe ofta, sed antaŭ

ĉio la daŭra reeldono de lernolibroj, kiuj havis sukceson antaŭ unu aŭ eĉ du generacioj. Kiuj eklernis helpe de ili, tiuj tendencas ilin uzi por la instruado. Tiun reeldonadon ni ŝuldas antaŭ ĉio al la malriĉeco de nia movado: Verkigo kaj eldonado de nova instruilo estas ege kosta afero. Ni donu ekzemplon: La verkigo kaj provizora eldono de la porkoresponda kurso por germanlingvanoj kostis al Kultura Centro Esperantista la impresigan sumon de 50.000 svisaj frankoj.

LISTO DE BAZAJ LIBROJ

Kiam ni devos ekplanadi la instruadon de Esperanto, kiel oni kutimas tion fari por enkonduko de fako en lernejan programon, la bibliografia antaŭesploro montros al ni, kiel neimageble malriĉaj ni estas je gvidlibroj. Kultura Centro Esperantista ne kontentiĝas nur instrui Esperanton al komencantoj. Ĝi ankaŭ invitas al progresigaj kursoj, al peresperanta instruado de tre variaj temoj, kaj al kursoj pri la Esperanto-literaturo kaj historio aŭ al pedagogia formado. Al la interesatoj por la pedagogia seminario, ni proponas liston de bazaj libroj, kiujn ĉiu instruisto devus ne nur posedi, sed tre atente trastudi. Jen tiuj libroj, kiujn ni konsilas al la frekventontoj de la pedagogia seminario. El tiu listo ni eliminis la beletrajn verkojn, kies legadon ni ankaŭ konsilas. Ni metas nun la akcenton sur la prilingvan materialon. Sed estu tuj dirite, ke en la instruado la lingvajn ekzemplojn oni nepre ĉerpu el la plej signifaj kaj konindaj beletraĵoj, eĉ por la instruado de Esperanto al tutkomencantoj. Povas tion ĉi fari kun sukceso nur instruistoj, kiuj bone konas la Esperanto-literaturon.

Ĉiu kandidato al la pedagogia diplomo devas do havi je dispono minimume la ĉi-sekvajn bazajn verkojn:

- a) De ZAMENHOF li povu konsulti la verkojn "Fundamento de Esperanto" kaj "Lingvaj Respondoj". En ili ni havas fakte la atestaĵon pri la ekvivo de la lingvo.
- b) La planteto Esperanto kreskis, kaj du verkoj provas speguli la lingvan disvolviĝon, kiun Esperanto akiris dank' al la dinamismo de la revuo kaj eldonejo LITERATURA MONDO. Ili estas la famaj PIV kaj PAG, kiujn ni grandparte ŝuldas al la nelacigebla sindonemo de Gaston WARINGHIEN: Tiuj "Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto" kaj "Plena Analiza Gramatiko de Esperanto" estas ofte kritikataj en la instruistaj medioj, sed malgraŭ la riproĉataj mankoj ili havas la bonan ideon ekzisti. Ili

estu pli konsilantoj, ol diktatoroj, kiam ni serĉas respondon leksikan aŭ gramatikan. Eble la fakto, ke ili jam estas iom eksaj, favoras kritikan sintenon al ili, kio ne estas malbono.

c) Tre atentan studon de "Lingvistikaj aspektoj de Esperanto" de John WELLS ni konsilas al la seminariantoj, kvankam ni bedaŭras, ke tiu verko restas viktimo de la greklatina terminara tradicio. La fonetikisto Michel FRESARD proponas Esperanto-terminaron, kiu montriĝas multe pli taŭga. Ni havos la okazon raporti pri tio pli poste, kiam ni repensos la uzatan instru-terminologion.

d) La verketo "Esprimo de sentoj en Esperanto" de Edmond PRIVAT inspiru la instruontojn kaj meditigu ilin pri aro da lingvaj kaj stilaj demandoj. Malmultaj enkondukaj instruiloj tiom delikate komprenigas esencaĵojn, kiujn tro da kursgvidantoj ne konas aŭ eĉ ignoras. Ĝi estas edukilo al pensa nuancemo.

e) Trastudindaj ankaŭ estas la libroj "Enkonduko al literatura kritiko" de Giorgio SILFER

f) kaj "Metodiko en la Praktiko" de Zsuzsa BARCSAY, kiu grupigas kontribuadojn de Baldur RAGNARSSON, Werner BORMANN, István SZERDAHELYI, Tili DAHLENBURG, Audrey CHILDS-MEE, Claude PIRON, István TERTS, Jozefo HORVATH, Ernő CSISZAR, Erzsébet BODNRAR, Tibor CSERNE, Zsuzsanna CSISZAR, Elisabetta FORMAGGIO-VILISICS kaj Germain PIRLOT. Tra ĝi la instruantoj kontaktas kun kolegoj ideoplenaj kaj tutcerte talentaj.

g) Kaj fine mi konsilas la posedon de malfacile akireblaj verkoj, kies daŭra konsultado estas nepre necesa, kiam oni celas realan formigon metodikan. Ili estas la universitataj kursoj de István SZERDAHELYI. Lia "Metodologio de Esperanto" kaj lia "Krestomatio de Esperanta Literaturo" en tri volumoj estas kvar dikaj libroj, kiujn ĉiu kandidato al pedagogia diplomiĝo devus esti nepre trastudinta. Ili restas la verkaro, al kiu oni daŭre reiras kaj ankaŭ konsultigas al la lernantoj. Ni esperas, ke alvenos fine la tempo, kiam eldonejo ilin publikigos en reviziita eldono pli facile akirebla. La nuna estas principe rezervita al la studentoj de la Teknika Universitato Eötvös Lorand en Budapeŝto.

h) En atendo, ke ekzistos vera "Enciklopedio de Esperanto", la libreto "Esperanto en Perspektivo" de Ivo LAPENNA, Ulrich LINS kaj Tazio CARLEVARO estas nepre posedinda. Bedaŭrinde la jaroj kuras, kaj oni sentas la bezonon je aldono. Espereble CED trovos kompetentulojn por ĝin verkigi. Supera instruado de

Esperanto estas malfacila, kiam daŭre mankas al la kursgvidantoj la sciigoj, kiujn enciklopedio devus doni.

OBEO AL LA FUNDAMENTO AŬ AL LA LINGVOUZO

Ni komencis nian liston per la "Fundamento de Esperanto" ne nur ĉar tiu dokumento plenumis dum multaj jaroj la rolon de lernolibro, sed ankaŭ pro ĝia plua rolo. "La Fundamento restos la roko, ĉe kiu ĉies opinioj devas cedi aŭ rompiĝi." Tiu frazo de André ALBAULT, ĉerpita el lia "Ĝenerala enkonduka notico" al la naŭa eldono de 1963, bone resumas la situacion.

Pli kaj pli raras la kurs-gvidantoj, kiuj vere trastudis tiun verkon. Pri tio ni havas videblajn pruvojn. Kiam en pedagogia seminario ni petas al la studentoj priskribi la Fundamenton, nur tre nebulajn respondojn ni ricevas. La posta diskuto malkovrigas, ke neniuj plu eklernis la lingvon helpe de la Fundamento kaj ke ĝia analiza trastudo ne estas facila afero, malgraŭ la notoj kaj lingvaj rimarkoj de André ALBAULT.

Multaj fakte aliras la Fundamenton kun retenemo simila al tiu, kiun oni konstatas vidalvide de sankta libro kiel la Sankta Biblio aŭ la Nobla Korano. Respektemon la esperantistoj esprimas al tiu "neniam tuŝebla kaj neniam ŝanĝebla Fundamento de la lingvo". Psikologia analizo de tiu sinteno estus interesa. Ĝi eble rivelus, kiom forta estas la premo de la Esperanto-publiko kontraŭ ĉia objektiva aŭ kritika ekzameno de la konsisto mem de la Fundamento. Ĝi estas libro pli malpli tabua, al kiu ĉiu apelacias por pravigi la proprajn vidpunktojn kaj por refuti la aliesajn. La esperantologiaj kaj interlingvistikaj esploroj restis afero de pionira elito, kiun la Esperanto-publiko ne tre ŝatas.

Oni nun scias en la franclingvaj medioj, ke la 6-an literon de Esperanto oni ne prononcas kiel "é" en "café" kiel asertas André RIBOT en sia "Précis grammatical d'espéranto", sed kiel "è" en la vorto "après", kiel prave indikas la vortaro "Dictionnaire de poche" de SAT-Amikaro. Atenta aŭskultado de radio-prelegoj, de kasedoj kaj diskoj pravas, ke la "Fundamento de Esperanto" eraris, kiam ĝi indikis al la franclingvanoj, ke ili devas elparoli "é" la 6-an literon. Malgraŭ tio la ĵus aperinta lernolibro "Nouveau cours d'espéranto avec ou sans professeur" de Edmond LUDWIG kaj Renée TRIOLLE, kiun eldonis "Heroldo de Esperanto" en 1986, asertas, ke tiu vokalo prononciĝas "toujours (ĉiam) é".

Tiuj aŭtoroj devis elekti inter la oboe al la Fundamento aŭ al la lingva realeco. Ili donis la preferon al la fideleco al la Fundamento, kies antaŭparolo diras: "la fundamento de Esperanto devas plej severe resti absolute senŝanĝa, ĉar severa netuŝebleco de nia fundamento estas la plej grava kaŭzo de nia ĝisnuna progresado kaj la plej grava kondiĉo por nia regula kaj paca progresado estonta". La konsekvenco de tiu elekto blinde obei al la Fundamento kondukas al fonetika misvojigo de la Esperanto-lernantoj.

Kiam en la perkoresponda kurso de Kultura Centro Esperantista ni konsilis prononci tiun vokalon "ĕ", ni ricevis viglajn kritikojn, kiuj riproĉis al ni malfidelecon al la Fundamento. Tiuj recenzantoj ripetis al ni la ordonon, ke "Neniu persono kaj neniu societo devas havi la rajton arbitre fari en nia Fundamento iun eĉ plej malgrandan ŝanĝon! Tiun ĉi tre gravan principon la esperantistoj volu ĉiam bone memori kaj kontraŭ la ektuŝo de tiu ĉi principo ili volu ĉiam energie batali, ĉar la momento, en kiu ni ektuŝas tiun principon, estus la komenco de nia morto."

La realeco volas, ke Esperanto evoluis. Ĝia elparolo fiksiĝis. La 16 fundamentaj principoj nuanciĝis. Ĉiu kursverkisto scias, ke la rimarko, kiu diris, ke en Esperanto "la uzo de la artikolo samas al tiu de la franca kaj germana." estas absurdaĵo, ĉar tiuj du lingvoj malsame uzas la difinan artikolon kaj Esperanto malsame, kaj ke en Esperanto tiu uzo evoluis. Ĉiu ankaŭ scias, ke la konsiloj de PIV kaj PAG ne plene sekviĝu, ĉar la lingvo akiras propran manieron utiligi la artikolon "la". La devo de la instruistoj estas prezenti al siaj ĝelernantoj kiel eble plej kompletan analizon de la hodiaŭa uzo. Same estas por ĉiu lingvero. La ĝisnuna manko de tiuj analizoj malhelpas la superan instruadon atingi la dezirindan nivelon. Esperantologio kaj interlingvistiko havas vastan studkampon, de kiu dependas la efiko mem de la instruado de Esperanto.

Sojle al la dua jarcento de Esperanto, ni miras pri la kvazaŭa tabua sinteno al la Fundamento, kaj bedaŭras la mankon de bazaj verkoj. Tamen ni konsciu, ke la bazaj verkoj, kiujn ni povas konsili, pravas, ke ekde la publikigo de la fundamentaj principoj ĝis nun la Esperanto-instruado daŭre riĉiĝis je tamen sufiĉe fidindaj gvidlibroj. Esperanton praktikas pli malvasta publiko, ol ni emas imagi. Mi persone dubas, ke ni atingas la milionon da parolantoj. Kiom da etlingvoj kiel Esperanto fierus, se ili posedus bazajn verkojn samnivelajn al la niaj. Ni tendencas kompari Esperanton al vastskale uzataj lingvoj, kaj tiam ni sentas la mankojn. Tio eĉ ofte senkuraĝigas nin. Ni

La lundan tagon ni komencis la Esperanto-kurson.
Je la lunda tago ni komencis la Esperanto-kurson.
Lunde ni komencis la Esperanto-kurson.
Kiam estis lundo, ni komencis la Esperanto-kurson.
Kiam lundis, ni komencis la Esperanto-kurson.

La lundon komenciĝis la Esperanto-kurso.
ktp...

La lundon ni komencis la kurson de Esperanto.
ktp...

La lundon komenciĝis la kurso de Esperanto.
ktp. ktp.

Abundas tiuj strukturŝanĝaj ekzercoj, kiuj avantaĝe anstataŭas la tradukekzercojn. Kiam ni havas gelernantojn el pluraj nacilingvoj, montriĝas tre interese kaj instrue informiĝi, kiu esprimmaniero plej kongruas kun ĉiu lingvo aparte. Tiuj komparoj malkovrigas la veran internaciecon de Esperanto, kiu ne estas je la nivelo de la elekto de la vortelementoj, sed de la kapablo speguli diverstipajn pensstrukturojn. Tiuj ekzercoj havas stilan efikon. La lernantoj akiras la kapablon pli flekseble esprimi sian penson. Staĝ-raporto, kiu listigas la tagojn, laŭ la ĉi-sekva ekzemplo, pravas la efikon de tiu instruado: "Lunde komenciĝis la Esperanto-kurso; la mardan matenon ni konatiĝis kun la verkaro de Julio Baghy; la merkredon ni skipromenis; kiam ĵaŭdis, fonduon ni frandis; kaj jam estis la vendreda tagmanĝo, la adiaŭa manĝo."

Ni iom longe atentigis vin pri tiuj ne tre konataj struktur-ekzercoj, ĉar sojle al la 2-a jarcento de Esperanto, ili estas fremdaj al la grandega plimulto de la Esperanto-lernolibroj, same kiel pluraj aliaj instru-teknikoj, kiujn ni nur menciis: perbilda kaj perlumbilda instruadoj, pergesta instruado, programita instruado.

IRADO AL NEŬTRALE HOMA PENSMANIERO

Kiam oni repensas la didaktikan terminaron serĉante pli kompreneblajn vortojn, ol la oficialajn, oni alvenas al vera universalismo, ĉar oni malkovras neŭtrale homajn pensmanierojn tuj kompreneblajn al ĉiuj. Ofte ili estas pli ĝustaj aŭ taŭgaj, ol la tradiciaj. Anstataŭ "radiko" la lernantoj preferas diri "vort-elemento", aŭ tute simple "elemento". Ekzistas "o-emaj elementoj", dum aliaj estas "a-emaj" aŭ "as-emaj". Tio estas pli taŭgaj esprimoj, ol la tradiciaj, kiujn ni ŝuldas al René de

Ne estas mia celo detale raporti pri tiuj provoj emancipiĝi el la grek-latina gramatika nomenklaturaro. Mi nur volis atentigi vin pri tiu strebado pli neŭtrale koncepti la lingvo-instruadon.

Ni diru nun kelkajn vortojn pri tre produktivaj ekzercoj, kiuj estas karakterizaĵo de la Esperanto-instruado praktikata ĉe Kultura Centro Esperantista, kaj iom post iom tutmonde en la medioj, kiujn KCE didaktike influas. Tiuj strukturŝanĝaj ekzercoj estas paroligaj kaj montriĝas ege efika gimnastiko lingva. Kiuj lernis Esperanton pere de ili, tiuj fariĝas lertaj interpretistoj kaj fajnaj stilistoj.

EKZEMPLO DE STRUKTUR-ŜANĜA EKZERCO

Ekde la unua enkondukita leciono la Esperanto-lernanto povas jam amuziĝi fari tiujn ŝanĝojn:

Al lernantoj, kiuj sekvis tradician kurson, se oni diras, donu kvardekon da malsimilaj frazoj, kiuj esprimas la penson: "Lundon ni komencis la Esperanto-kurson", oni donas la impreson peti ion nefareblan. La plimulto el la demanditoj ne konscias, kian esprim-riĉecon kaŝas Esperanto dank al sia gramatika reguleco.

Analizo de la proponita pensunuoj serĉigas unue la mastron kaj la kernvorton: kiuj estas "ni komencis". La restantaj vortoj estas la gastoj "la lundon" kaj "la Esperanto-kurson". Estas amuze ŝanĝi la markojn, kiuj karakterizas tiujn gastojn: ioma esploro kondukas tre rapide la lernantojn al vico da ŝanĝproponoj:

Anstataŭ "la lundon", oni povas diri: "je la lundo, la lundan tagon, je la lunda tago, lunde, kiam estis lundo, kiam lundis." Ni povas do elekti inter 7 diraĵoj.

Anstataŭ "la Esperanto-kurson", oni povus diri: "la kurson de Esperanto, la esperantan kurson, la kurson esperantan." Ni povas elekti inter 4 diraĵoj.

Plua esploro montras, ke "ni komencis" ankaŭ povus diriĝi "komenciĝis". La gasto "la Esperanto-kurson" fariĝas tiam la mastro "la Esperanto-kurso".

Sume ni havas do 7-oble 4 ekvivalentajn pensunuojn, tio estas 56 pli malpli ekvivalentaj pensunuoj. Ni listigu parton el ili.

La lundon ni komencis la Esperanto-kurson.
Je la lundo ni komencis la Esperanto-kurson.

La lundan tagon ni komencis la Esperanto-kurson.
Je la lunda tago ni komencis la Esperanto-kurson.
Lunde ni komencis la Esperanto-kurson.
Kiam estis lundo, ni komencis la Esperanto-kurson.
Kiam lundis, ni komencis la Esperanto-kurson.

La lundon komenciĝis la Esperanto-kurso.
ktp...

La lundon ni komencis la kurson de Esperanto.
ktp...

La lundon komenciĝis la kurso de Esperanto.
ktp. ktp.

Abundas tiuj strukturŝanĝaj ekzercoj, kiuj avantaĝe anstataŭas la tradukekzercojn. Kiam ni havas gelernantojn el pluraj nacilingvoj, montriĝas tre interese kaj instrue informiĝi, kiu esprimmaniero plej kongruas kun ĉiu lingvo aparte. Tiuj komparoj malkovrigas la veran internaciecon de Esperanto, kiu ne estas je la nivelo de la elekto de la vortelementoj, sed de la kapablo speguli diverstipajn pensstrukturojn. Tiuj ekzercoj havas stilan efikon. La lernantoj akiras la kapablon pli flekseble esprimi sian penson. Staĝ-raporto, kiu listigas la tagojn, laŭ la ĉi-sekva ekzemplo, pravas la efikon de tiu instruado: "Lunde komenciĝis la Esperanto-kurso; la mardan matenon ni konatiĝis kun la verkaro de Julio Baghy; la merkredon ni skipromenis; kiam ĵaŭdis, fonduon ni frandis; kaj jam estis la vendreda tagmanĝo, la adiaŭa manĝo."

Ni iom longe atentigis vin pri tiuj ne tre konataj struktur-ekzercoj, ĉar sojle al la 2-a jarcento de Esperanto, ili estas fremdaj al la grandega plimulto de la Esperanto-lernolibroj, same kiel pluraj aliaj instru-teknikoj, kiujn ni nur menciuj: perbilda kaj perlumbilda instruadoj, pergesta instruado, programita instruado.

IRADO AL NEŬTRALE HOMA PENSMANIERO

Kiam oni repensas la didaktikan terminaron serĉante pli kompreneblajn vortojn, ol la oficialajn, oni alvenas al vera universalismo, ĉar oni malkovras neŭtrale homajn pensmanierojn, kiuj kompreneblajn al ĉiuj. Ofte ili estas pli ĝustaj aŭ taŭgaj, ol la tradiciaj. Anstataŭ "radiko" la lernantoj preferas diri "vort-elemento", aŭ tute simple "elemento". Ekzistas "o-emaj elementoj", dum aliaj estas "a-emaj" aŭ "as-emaj". Tio estas pli taŭgaj esprimoj, ol la tradiciaj, kiujn ni ŝuldas al René de

SAUSSURE: "substantiva radiko, adjektiva radiko, verba radiko". Estas interese konstati, ke la lernantoj multe preferas karakterizi la verbojn per la finaĵo "as", anstataŭ ol per la infinitiva "i", kiu ebligas formi nur nekompletajn pensunuojn, en kiuj mankas la mastra vortgrupo. La observado malkovrigas, ke elementoj ne bezonas finaĵon. Ili estas "memstaraj" aŭ "finaĵ-malemaj".

Karakterizo de Esperanto estas, ke la finaĵoj estas ŝanĝeblaj. La elemento "manĝ" estas "as-ema", ĉar sub tiu formo ĝi plej ofte montriĝas. Sed ĝi povas esti "o-forma, a-forma" ktp. La praktiko montras, ke la simpleco de tiu terminaro ebligas malkovri lingvajn fenomenojn, kiujn la klasika grek-latina terminologio malhelpas vidi aŭ pensi. Unu terminologio estas kongrua al la lingvo, la alia estas fremda al ĝi. La nuntempe uzata terminologio ne estas neŭtrale homa, ĝi estas okcidenta kaj grandparte malhelpas la diskonigon de Esperanto en eksterokcidentajn mediojn kaj okcidente en neintelektulajn rondojn.

Fonetikaj klarigoj estas malfacile kompreneblaj por la plimulto el la lernantoj kaj instruistoj, simple ĉar la terminologio grek-latina ne konvenas al ili kaj al Esperanto. La adjektivoj "ploziva, afrikata, frikativa, likvida" estas ekster la vortaro de la grandega plimulto de la Esperanto-instruistoj, kiuj ne kapablas ilin kompreni kaj asimili. Kaj se la instruisto volas ilin uzi, li devas perdi enorman tempon por ilin klarigi. Se li estus uzinta la esperantajn adjektivojn "maldaŭra, malsimpla, daŭra, flua", proponitajn de D-ro Michel FESARD, li estus perdinta malpli da tempo kaj la lernantoj kapablus ilin kompreni kaj memori.

CELI SENPERAN KOMUNIKADON

Esperanto estas profunde demokrata lingvo, kiu celas la senperan komunikadon. Kiam terminaro komplikigas tiun komunikadon pro sia neadekvateco, tiam nia devo estas serĉi pli konvenan esprimmanieron. Niaj kontaktoj kun Esperanto-instruistoj el la tuta mondo malkovrigis al ni, ke la saman bezonon oni pli aŭ malpli klare sentas ĉie. La azianoj komencas sin demandi, kial Esperanto restu ligita al regionaj ĝentileco, tradicioj kaj gramatika terminologio. Pasintjare NAGATA Afriko montris, ke ekzemple la nocio de idiotismo estus pli komprenebla, se la instruantoj parolus pri "kutimvorto" aŭ "kutim-esprimo", laŭ la ĉina aŭ japana esprim-manieroj. Ŝi tutcerte prave riproĉas al la okcidentaj esperantistoj uzi plurajn

Daŭrigo de la lekcioj post la fotoj

Fotoreportaĵo de la Konferenco





1. Parto de la festsalonego de la Universitato tuj antaŭ la Inaŭguro de la Konferenco. Sur la unua vico de maldekstre: Ges-roj Birthe kaj Ivo Lapenna, ges-roj Rie kaj Peter Zacho, la rektoro de la Universitato, Prof. D-ro Christian Brünner.

2. Konferencanoj dum la Inaŭguro


LA INAŬGURO



1. S-ro Peter Zacho - la patro de s-ino Birthe Lapenna - voĉlegas la proponon pri Konferenca Prezidentaro. - S-ro Zacho estis la unua, kiu komencis labori post 1974 por la Neŭtrala Esperanto-Movado. Estas ankaŭ lia merito, ke ni povis eldoni "Horizonto"n en Kopenhago



2. De maldekstre: Urba konsilisto, Dipl. Inĝ. Helmut Strobl, la rektoro de la Universitato de Graz, Prof. D-ro Christian Brünner, honoraj protektantoj, Prof. D-ro Ivo Lapenna kaj D-ro Klaus Perko
3. D-ro Klaus Perko bonvenigas la konferencanojn
4. La rektoro, Prof. D-ro Christian Brünner salutas la Konferencon. Tradukanto (maldekstre): D-ro Hans Michael Maitzen
5. Prof. D-ro Oton Pancer, vicprezidanto de la Jubilea Esperanto-Konferenco
6. Parto de la Prezidentaro dum la Inaŭguro: S-ro Günther Becker, vicprezidanto, s-ro Jean Thierry, vicprezidanto, D-ro Klaus Perko, prezidanto, Prof. D-ro Ivo Lapenna, Honora Prezidanto



Konferencanoj dum la Inaŭguro



La Inaŭgura Festparolado de Ivo Lapenna en la Universitato de Graz

1. Prof. D-ro Ivo Lapenna, Honora Prezidanto de la Internacia Jubilea Esperanto-Konferenco, kaj D-ro Klaus Perko, Prezidanto, dum la Inaŭguro
2. Dum la Inaŭguro ludis stiriaj violonistoj



1



2



3




4



5

LA INAŬGURO



6

3.-4. Konferencanoj dum la Inaŭguro

5. Dum la Inaŭguro. De dekstre: S-ro Mark Fettes, redaktoro de la revuo "Esperanto" kaj reprezentanto de UEA, kaj s-ro Rafael Devis, la filmisto de la Konferenco

6. La tria de dekstre: Urba konsilisto, Dipl. Inĝ. Helmut Strobl

SUR LA ESPERANTO-PLACO

INAŬGURO DE MEMORTABULO

KAJ LA MONUMENTO "LA ESPERO"



Urba konsilisto, Dipl. Inĝ. Klaus Gartler kiel reprezentanto de la urbestro kune kun Prof. D-ro Ivo Lapenna malkovras tabulon sur la Esperanto-Placo



TRANSDONO de LA DOKUMENTO



1. Maldekstre: Membroj de la Polica Orkestro de Graz ludas dum la inaŭguro de la Monumento sur la Esperanto-Placo

2.-3. Prof. Lapenna transdonas la dokumenton pri la Jubilea Monumento "La Espero" al la reprezentanto de la urbestro de Graz, Dipl. Inĝ. Gartler



TRANSDONO de LA DOKUMENTO

1. Prof. Ivo Lapenna transdonas la dokumenton pri la Jubilea Monumento "La Espero" al la skulptisto, Jesper Neergaard. De maldekstre: Ivo Lapenna, Jesper Neergaard, s-ino Birthe Lapenna kaj D-ro A. Albault
2. Prof. Lapenna transdonas la dokumenton pri la Jubilea Monumento "La Espero" al la reprezentanto de la urbestro de Graz, Dipl. Inĝ. Gartler
3. Kaj al la Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno pere de Mag. Herbert Mayer
4. Prof. Ivo Lapenna montras la dokumenton, kiun desegnis la franca-dana skulptisto-pentristo, Pierre Gaborit (maldekstre de la dokumento)



1

POST LA CEREMONIO



2

1. La skulptisto de "La Espero", Jesper Neergaard, lia patro, D-ro Paul Neergaard, kaj Prof. D-ro Ivo Lapenna
2. Antaŭ "La Espero" de maldekstre: Pierre Gaborit (la artisto, kiu desegnis la Memordokumenton), Karim Ali, Lis Thune (la edzino de Pierre Gaborit), R. Shahram, ges-roj Birthe kaj Ivo Lapenna, Klaus Perko kaj ges-roj Rie kaj Peter Zacho

EKSPOZICIO "100 JAROJ DE ESPERANTO-LITERATURO"

de la Stiria Landa Biblioteko



EKSPOZICIO



1. D-ro Hannes Lambauer de la Stiria Landa Biblioteko kaj D-ro Klaus Perko ĉe la inaŭguro de la ekspozicio "100 Jaroj de Esperanto-literaturo"

2. Konferencanoj dum la inaŭguro de la ekspozicio rigardantaj kaj diskutantaj komputeran kurson en Esperanto. De maldekstre (starante): S-ro Bo Larsen kaj Prof. D-ro Helmar Frank



Einladung

AKCEPTO en LA URBODOMO




*La Urbestro
de la landa cefurbo Graz,*

Alfred Stingl

*permesas al si, inviti al akcepto okaze
de la Jubilea Esperanto-Konferenco*

*la 19-an de julio je la 20-a horo
en la urbodomo, kunsidejo de la Urba Senato*

Ĉe la akcepto en la urbodomo la reprezentanto de la urbestro, komunuma konsilisto, D-ro Dietmar Dragaric, alparolas la konferencanojn en Esperanto. D-ro Perko ne bezonis traduki
La oficiala invito de la urbestro de Graz.





AKCEPTO EN KASTELO EGGENBERG

1. + 3. Ĉe la akcepto en la kastelo Eggenberg la reprezentanto de la landestro, Franz Wegart (prezidanto de la Stiria Landa Parlamento) alparolas la ĉeestantojn. D-ro Klaus Perko tradukas en Esperanton

2. Konferencanoj dum la akcepto en la kastelo Eggenberg

4. Konferencanoj dum la akcepto de la landestro en la kastelo Eggenberg. De maldekstre: S-ro Sujet, D-ro Klaus Perko, s-ino Perko, la filino Petra Perko, kaj D-ro Kovačič



EKSKURSOJ

kaj en GRAZ



1. Junaj esperantistoj antaŭ Kastelo Belvedere, Vieno
2. Prof. D-ro Oton Pancer, unu el la vicprezidantoj de la JEK, kaj la juna irana kuracisto R. Shahram promenas en la parko de la kastelo Eggenberg
3. Junaj esperantistoj sur la Esperanto-Placo



INTERNATIONALES JAHR DES FRIEDENS



REPUBLIK ÖSTERREICH




LA BANKEDO

1. La Poŝta Direkcio por Stirio ne nur instalas - senkoste por ni - specialan poŝtejon en la Konferencejo dum kvar tagoj, sed disponigis ankaŭ oficialan poŝtan stampon kun teksto en Esperanto

2. En la nomo de geamikoj la iama Ĝenerala Sekretario de UEA, Günther Becker, transdonas al Ivo Lapenna belegan, arĝentan pokalon kun belega, engravurita danko pro lia multjara, eminenta laboro por Esperanto

La oratoro
IVO LAPENNA



- kiel ni lin memoras

vortelementojn por esprimi saman nocion, kiam la ĉinoj aŭ japanoj same klare esprimiĝas helpe de ununura vortelemento. Ekzemple la vorton "fonetiko" ili kritikas, ĉar en iliaj lingvoj la sciencon pri la sonoj oni nomas sen devi lerni novan vortelementon, kiel okazas en Esperanto. Kial diri "fon", kiam la lingvo posedas la elementon "son"? Jen tiklaj demandoj, kiuj devos ricevi respondon, se ni volas, ke Esperanto kaj ties instruado universaligu. Ni verŝajne devas eliri el la naturalisma epoko kaj repensi la tutan sciencan kaj teknikan vortaron. Ni mencias tion en nia raporto pri la Esperanto-instruado, ĉar la instruistoj kaj lernantoj estas daŭre konfrontataj kun tiuj demandoj.

Se ni volas, ke Esperanton oni povu lerni ie ajn en la mondo, sen antaŭe eklerni okcidentan lingvon, tiam ni devos pli universale pripensi la verkotajn instruilojn, ke ili konvenu al ĉiuj. Povas esti, ke la kursejo Kultura Centro Esperantista pli akre sentas tiun bezonon ĉion repensi, ol aliaj kursejoj troviĝantaj en unulingva lando, ĉar fakte ĉe KCE oni instruas Esperanton ĉiujare al centoj da studentoj alkurintaj el la tuta mondo. Ĉia traduka instruado fariĝis absolute neebla. Ofte estas tiom da lingvoj, kiom da lernantoj. Kursejoj kiel Kastelo Grésillon malpli sentis tiun problemon, ĉar ilia instruado baziĝis sur la perado de ĉeflingvo, en Grésillon la franca lingvo, kiel atestas la eldonitaj lernolibroj. La svisa plurlingveco devigis nin rezigni jam de longe je pertraduka instruado.

En altlernejo oni ne nur instruas la lingvon mem, sed per la lingvo oni instruas pri plej diversaj temoj kaj fakoj. La docentoj, kiuj havas la honoron instrui pri sia fako al internacia publiko renkontas la bezonon repensi aŭ ekpensi la fak-vortaron. Montriĝas, ke nura aldono de O kaj A al vortoj konataj de la franclingvanoj ne plu estas akceptebla sistemo. La "arbarkulturo" laŭ PIV diriĝas en Esperanto "silvikulturo", ĉar la franclingvanoj diras "sylviculture". Tion rifuzas la neokcidentanoj kaj la nova generacio da kursgvidantoj. Tre kompleksaj problemoj fontas el kaosa vortaro, kaj tio ege malhelpas la disvolviĝon de Esperanto en la supera instruado. Strange estas, ke la esperantistaro apenaŭ ekkonscias pri tio kaj tute videble la malnova generacio da scienculoj, kiuj forĝis tiun fakvortaron, ankaŭ ne perceptas la nunajn lingvajn bezonojn.

KONKLUDU

En cent jaro multe estis farita, eksperimentita. Pri tiuj

eksperimentoj ekzistas ofte relegindaj raportoj. Sed mankas bibliografiaj sciigoj, kaj tial ilia konsultado estas ege malfacila afero. Tial ne multe progresas la nivelo mem de la novaj eksperimentoj. Pro tio estas urĝe kunordigi la fortojn cele al starigo de dokumentejoj kaj formad-centroj, kiuj nepre kunlaboru, dividante inter si la esplor-laboron. Dum la pasintaj jaroj Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI) revigligis kaj pliseriozigis la eldonon de "Internacia Pedagogia Revuo", organo kiu povus ludi tre gravan kunordigan rolon. Espereble foje alvenos al ĝi la apogo de eduk-ministerioj sub formo de subvencioj, ĉar la nuraj jar-kotizoj al ILEI ne ebligas veran laboron.

Ni aludas tiun kotizan aferon, ĉar la instruado de Esperanto multe dependas de la financaj rimedoj disponeblaj. Ni jam menciis la kostojn ligitajn al kurs-verkigo. Ni ankaŭ memoru, ke kurs-gvidantoj rajtas esti salajrataj. Siatempe la Cseh-Instituto kapablis salajri aŭ salajrigi sian migrantan kurs-gvidantaron. Nuntempe malmultaj Esperanto-institucioj kapablas garantii regulan salajradon al la instru-kapablaj kunlaborantoj. Tial ili dependas de iliaj bonvolo kaj malavareco. Tiu nekontentiga situacio malhelpas didaktikan progreson.

Dum tiu ĉi prelego ni estus devintaj raporti pri kelkaj nesukcesaj provoj, kiujn ni ne devus forgesi. Inter ili okupas ĉeflokon "Grajnoj en Vento", kiun prizorgis dum pli ol 20 jaroj Marcel ERBETTA. Ĉiu rondo de "Grajnoj en Vento" grupigis dekon da klasoj de la tuta mondo kaj la eldonitaj kajeroj estis tre efika vigligo de la Esperanto-instruado. Ili donis al ĝi videblan celon. Kiel estas en Esperantujo, la financa strebado restis la afero de la iniciatinto. Mankis apogemo fare de la ĉefaj institucioj de la Esperanto-movado. Kaj pro tio ĉio ĉesis funkcii, kiam Marcel ERBETTA pro maljuniĝo kaj ripozemo deziris emeritiĝi. Estas nepre necese, ke finiĝu tiu epoko de la nehelpo al la fruktodonaj agadoj. Nur se la lernantoj povos uzi Esperanton, tiun lingvon oni povos reale instrui. Sed ĝis nun, kiajn praktikajn celojn oni proponas al la infanaro?

Mi eĉ povas diri, ke mi ne konas multajn sociojn, kiuj tiom neglektis la propran idaron kaj dediĉas tiom malmulte da mono al edukaj celoj porinfanaj, ekster la esperantlingva. Malmultaj naciaj Esperanto-societoj organizas regulajn porinfanajn aranĝojn paralele al la plenkreskulaj. Kaj kiam Esperanto estas instruata en lernejoj, la Esperanto-klasoj restas en verda dezerto. En la Esperanto-societo de la koncerna lando ne estas antaŭviditaj agadoj, kiuj povus integri la gelernantojn de tiuj klasoj al la Esperanto-vivo. Antaŭ ol startigi Esperanto-kursojn en lernejoj,

ni devas unue nin organizi, por ke la Esperanto-lernontoj trovu pli konvenan grundon en la Esperanto-movado mem.

Do la Esperanto-instruado ne estas nur afero de pli aŭ malpli bonaj lernolibroj, de pli aŭ malpli taŭgaj metodoj, de pli aŭ malpli kompetentaj instruistoj. Per la plej bonaj lernolibroj, didaktiko kaj pedagogia talento oni atingas nur efemeran sukceson, se la Esperanto-komunumo kvazaŭ ne ekzistas.

Vere kompleksa estas la tuta demando pri instruado de Esperanto. Ekzameno de la okazintaĵoj montras, ke dum la unua jarcento de Esperanto ĉio restas vere konstanta en senmoviĝemo. Ni komprenu, ke la kialoj de tiu stagno estas pli internaj al la Esperanto-movado mem, ol kaŭzataj de eksteraj kontraŭstaroj. Kiam nia movado reale ekmoviĝos, tiam la mondo moviĝos kun ĝi. Ni kapablu ekvenigi tiun entuziasman momenton.

HAMBURGO EN RETROSPEKTIVO

DOKUMENTOJ KAJ MATERIALOJ PRI LA KONTRAŬNEŬTRALECA
POLITIKA KONSPIRO EN UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

DE

IVO LAPENNA



Komitatano kaj estrarano de UEA 1938-1974,
ĝenerala sekretario 1954-1964, prezidanto 1964-1974,
Honora Membro ĝis la puĉo de 1974, rifuzinto de
proponita Honora Prezidanteco de UEA en 1974

PLI AKTUALA OL IAM ANTAŬE

LA CELO ESTAS DISKONIGI LA VERON

"Mi devas diri ke, leginte la detalojn en ĉi tiu
libro, mi skuiĝis pro la graveco de la situacio". -
H. A. de Hoog en 'Dia Regno'.

LA PLEJ GRAVA SOCI-POLITIKA VERKO DE LA ESPERANTO-LITERATURO
Aĉetebla ĉe Peter Zacho, Norregårdsvej 91, DK-2610 Rødovre, Kopenhago, Danio
Ĝirkonto: 1 19 06 01. Prezo: 150 d.kr. plus sendokostoj.

D-rino Marjorie Boulton:

Membro de la Akademio
de Esperanto



CENT JAROJ DE ESPERANTA PROZO

Kion utilan oni povas diri dum nur kvindek minutoj, pri temo tiel konsternante vasta? Eble, unue, iom indiki la veran vastecon de la temo.

Kvankam ni ankoraŭ renkontas homojn kiuj, kun aplombo enviinda, informas nin, ke Esperanto ne havas literaturon, eĉ, ke laŭ esencaj principoj pri lingvistiko ĝi ne povas havi literaturon, ni jam havas grandan kvanton de eĉdonitaj prozaĵoj. Kompreneble la kvalito estas alia afero, kaj tre varias, inter genio kaj fuŝego; sed unue ni konsideru la kvanton. Eĉ verko nebona iasence atestas pri vivanteco de lingvo; oni verkas, kredante pri legontaro; eĉ verko nebona atestas pri ia laborpreteco de iu esperantisto, ĉar verki ion ajn kostas ian penadon.

Kiam mi traserĉis la ne malhaveblan konsultlibron "Esperanto en Perspektivo", por kunmeti ian bazan statistikon pri prozaj verkoj en Esperanto, mi mem ekmiris denove pri la nura kvanto. (Mi ne garantias absolutan precizecon de miaj ciferoj; mi amas vortojn sed trovas nombrojn iom malamikaj; eble ialoke do mi miskalkuletis, sed mi kredas, ke mi nenie miskalkulegis.)

En "Esperanto en Perspektivo" mi trovis nomojn de minimume 267 aŭtoroj, kiuj verkis originalajn esperantajn prozaĵojn. Poste mi turnis min al tradukoj el prozaj verkoj. Ni memoru, ke adekvata tradukado estas severa testo, kaj tradukaj laboroj multe kontribuas al persona kaj komunuma evoluado rilate al lingvouzado, stilistiko kaj vortostoko. Mi kalkulis minimume 693 tradukitajn prozaĵojn, el 46 diversaj lingvoj.

Ekzistas ankaŭ prozaj verkoj fakaj, ekzemple pri filozofio, teologio, politiko, etiko, natursciencoj; biografioj, aŭtobiografioj, esperantologiaj studaĵoj, k.t.p. Penante eviti duplikatajn enkalkulojn, ĉar kelkajn verkojn oni notis jam sub aliaj kategorioj, mi preskaŭ certas, ke staras sendepende almenaŭ 569 fakaj prozaj verkoj. Se nun ni adicias la tri kategoriojn: originalan literaturan prozon, tradukitan prozon, fakan prozon, ni trovas, ke antaŭ la preparado de "Esperanto en Perspektivo" jam ekzistis almenaŭ 1529 libroj kaj libretoj. Al libroj kaj libretoj oni povas aldoni la prozaĵojn en miloj da gazetoj - ciferon apenaŭ kalkuleblan.

Sed "Esperanto en Perspektivo" aperis en 1974; estas dezirinde, trovi statistikon pli aktualan. Ne estus eble, havi informojn perfekte ĝisdatajn kaj kompletajn; io nova aperas ĉiumonate; sed mi esploris la lastan librokatalogon de UEA, tio estas, de 1984/85, kalkulante la prozajn verkojn, kiuj aperis post 1974 - ellasante nurajn represaĵojn kaj lernolibrojn. Kaj temis pri 590 novaj titoloj en tiuj dek jaroj: inter ili la romanoj de Johano Valano, István Nemere, Lorjak, John Francis kaj Karolo Piĉ, unu lasta novelaro de Sandor Szathmári kaj valora volumo de Endre Toth; la unika "Mondo de Travivaĵoj" de Tibor Sekelj kaj la monumente grava "Kaj la ceter' - nur literaturo" de Waringhien; du valoraj beletristikaj studaĵoj de Auld, "Enkonduko en la originalan literaturon de Esperanto" kaj "Vereco, Distro, Stilo"; ankaŭ la traduko "La Inĝenia Hidalgo Don Quijote de la Mancha", kiun faris Fernando de Diego kaj kiu enhavas en unu volumo 786 paĝojn de tradukita prozo...Eble estas ankaŭ aparte signife kaj interese, ke jam dum tiuj dek jaroj aperis 15 teknikaj verkoj en Esperanto pri aspektoj de komputera scienco.

Do, dum la unuaj 87 jaroj de Esperanto, 1529 verkoj prozaj; kaj dum nur la sekvantaj dek jaroj, aliaj 590! La unua cifero klare atestas pri kresko, kulturo, kaj kapabloj de la lingvo; la dua cifero indikas vere mirindan ekspansion: ne nur pli da verkoj, sed pli da legantoj, pli da eldonejoj; kaj pli disvastigita opinio, eĉ foje ĉe registaroj kaj diversaj organizaĵoj, ke valoras aperigi ion en Esperanto. Miaj ciferoj tre eble surprizis eĉ plurajn el la spertaj kaj dediĉitaj konferencanoj en Graz; ili iom surprizis min mem; sed eĉ pli signifa ol la kvanto de iuj ajn kulturaj produktoj estas la kvalito.

Kompreneble, la 2119 prozaj verkoj, kiujn mi kalkulis, inkluzivas la grandskalajn kaj bonajn tradukojn de, ekzemple, "La Faraono", "Cezaro", "Gösta Berling", "La Naŭzo", kaj kiajn ajn traduketojn aŭ eĉ fuŝtradukojn; inkluzivas sciencajn

informojn en tre duba Esperanto, kaj sciencajn verkojn stile neriproĉeblajn kiel "Atakoj kontraŭ Ĝardenplantoj"; religiajn monumentojn glorajn kiel la "Malnova Testamento" tradukita de Zamenhof aŭ "La Nobla Korano" tradukita de Chiussi, kaj ĝene naivajn religiajn broŝuretojn en lingvo, kiun Dio pardonu; romanojn de la profesia kvalito de Baghy aŭ Nemere, kaj misnaskitajn fikciojn senvvalorajn; novelojn artismajn kiel de Francis aŭ Rossetti, Rosbach aŭ Potts, kaj nurajn anekdotojn; la eseojn de Waringhien, enhave profundajn kaj stile elegantajn, ekzemplajn, atestantajn ankaŭ pri seriozaj esploroj, kaj ekscentrajn lingvajn polemikaĵojn de memfidegaj etsciuloj. Kaj kredeble estas same pri ĉiuj literaturoj de la mondo: la plej belaj verkoj sidas sur la supro de monto da verkoj nur meznivelaj aŭ eĉ senvvaloraj.

Se ni realisme rigardas la literaturan mondon, la nombro de niaj verkistoj almenaŭ dece kompetentaj estas eksterordinare granda, rilate al historio nur centjara kaj popolo dum ĝia tuta historio ne pli ol, plej optimisme, kelkmiliona. En iu ajn kulturo, genio estas ege rara: kiom da vere grandaj prozistoj aperis en iu ajn kulturo? iu Tolstoj, "George Eliot", Balzac, Dostojevski, D.H. Lawrence, - mirigas ĝuste ĉar ili estas tiel eksterordinaraj; eĉ multe pli meznivelaj talentoj estas maloftaj. Pri nia centjara literaturo ni rajtas fieri kaj devas miri. Miri des pli, ĉar verkado en Esperanto neniam portis grandajn financajn premiojn al la aŭtoroj aŭ eldonistoj; ĉiu esperanta librokatalogo estas, almenaŭ parte, ankaŭ katalogo de sinoferoj.

Mi proponos hipotezon pri grava faktoro en la granda kvanto kaj valora kvalito de nia literaturo, proporcie al la malgrandeco de nia popolo. Esperanto kaj la esperantistoj havis specialan fortunon, ĉar Ludoviko Zamenhof havis ne nur genian logikon, inventemon kaj delikatan sentemon pri bazaj lingvaj bezonoj - morfologio, sintakso, internacieca vortaro, kunmetado de radikoj kaj simile, sed vere konsiderindan literaturan talenton kaj laborkapablon heroan. Ni povas aserti, ke Esperanto estas lingvo, denaske stilkonscia kaj verŝajne ĝi ŝuldas grandan parton de sia sukceso al tiu ekstrema kaj noble humila konscienco de Zamenhof, kiu konstante testadis ĝin por tre diversaj literaturaj taskoj; kiu aperigis la unuajn eksperimentajn fragmentojn de nia literaturo en la "Unua Libro" en 1887.

Mi komencis legi la verkojn de Zamenhof kiam mi estis ne multe pli ol freŝbakita komencanto; kaj eĉ nun mi memoras, ke impresis min, kiel mi povis tuj kompreni. Tiutempe mi atribuis tiun komprenon al mia propra brila intelekto; nun, kiam la jaroj instruis al mi pli bonan mem-observadon kaj pli saĝan

humilecon, mi konstatas, ke mia tuja kompreno rilatis pli al la stilo de Zamenhof: ĉiam kristale klara, neniam egoisme pretendema, ĉiam pensanta pri la legonto, ĉiam fluanta per agrablaj ritmoj.

Mi pensis unue pri la prozo de la "Originala Verkaro", precipe la kongresaj paroladoj kaj gravaj eseoj. Sed tio estis la klariga, instrua, informa stilo de Zamenhof. Se ni rigardos ankaŭ liajn tradukojn, ni trovos la karakterizajn kadencojn de la "Malnova Testamento", simplajn kaj kutime mallongajn, sed majestajn; la malpli pezan rakontan tonon de la "Fabeloj" de Andersen; la komedian retorikon de Georgo Dandin; la sufiĉe malsimilan komedian konversacion de "La Revizoro", kun stila diferencigo de la karakteroj; la priskribojn kaj dialogojn de serioza, tiutempe moderna romano en "Marta"; aŭ, draste kontraste, la fajra kaj abunda sceneja elokvento de "La Rabistoj"; kaj ni konstatas, ke jam en la fruaj jaroj Zamenhof kreis por Esperanto vastan gamon de stiloj por diversaj bezonoj, kaj ĉiun stilon facile elparoleblan kaj kompreneblan.

Estis unika atingo en la literatura historio: almenaŭ dum la fruaj jaroj, Zamenhof devis elpensi ĉiujn siajn lingvajn rimedojn eĉ dum li verkis; kaj ni estas eksterordinare bonŝancaj, ke li havis tiel larĝan, plene artisman, literaturan sentemon, kaj frue donis al la esperantistoj tiom da ekzemploj, rimedoj, kriterioj.

El tiu kristale klara fonto, kiun Zamenhof, liberiga lingva Moseo de la monda popolo, pene kaj inspirite frapis el la malmola roko, kreiĝis nun vasta rivero kontribuanta al la monda kultura oceano. Jes; foje en tiu rivero estas koto aŭ kemiaĵoj, aŭ ŝlimaj konfervoj; sed ĉio homa havas neperfektaĵojn; kaj tra tiu riverego ni trovos multajn belajn partojn, kie arĝentaj fiŝoj vivoplenaj sagas aŭ saltas en la klaregaj akvoj.

Mi ne prezentos ian katalogon pri la sekvanta historio de la Esperanta prozo. Longa listo nur de nomoj aŭ verkoj ne tre instruas; mi preferas elekte mencii nur kelkajn el la belaj kaj signifaj atingoj de la jarcento.

Ni estis ege fortunaj, havi la prozon de Zamenhof, sed ni ŝuldas dankon al multaj aliaj prozistoj. La nomo Kabe (Kazimierz Bein) verbiĝis kun honta, malgaja signifo, kaj oni facile forgesas, ke antaŭ ol Kabe kabeis, li kontribuis sian vastan, zamenhofece klaran kaj fluan, tradukon de "La Faraono" de Prus, kaj kvin aliajn gravajn tradukojn; se nur ĉiuj, kiuj kabeas, unue farus tiajn servojn!

Administraj kaj komitataj laboroj povas terure malbonigi stilon,

ne nur en Esperanto; mi esperas, ke mi pagis plurajn miajn pekojn, travadante iam multajn tiaspecajn dokumentojn en la angla; ni esperantistoj estas des pli fortunaj ĉar unu el niaj fruaj organizantoj estis Edmond Privat, al kies prozo Szilágyi ("Enciklopedio de Esperanto", II. 453) atribuas "puritanan klarecon" kaj ankaŭ "elegantecon"; lia brile klara prozo enlasas ĝuste tiel modestan dozon da poezieco por ornamo la stilon sed ne konfuzi la leganton. Alia granda organizanto kun modele klara stilo estas Ivo Lapenna, kies "Retoriko" instruas ne nur konsile sed ekzemple.

Denove ni estas fortunaj, ĉar Julio Baghy dediĉis sin tiel plene al Esperanto. Li kontribuis malavare sur pluraj kampoj, sed kiel prozisto progresigis nin speciale per esprimrimedoj, kiuj kreas naturecajn konversaciojn; inter aliaj per lerta uzo de tiuj elipsoj, kiujn homoj uzas en ĉiutagaj interparoladoj; ankaŭ per esprimrimedoj pri fortaj emocioj: ni legu ekzemple lian majstran novelon "Nur Homo". Ĝi ja estas majstra parte pro la psikologia trafeco; sed niajn plej brilajn komprenojn ni povas esprimi nur per vortoj, kiujn oni ne ĉiam trovas facile. Mi foje suspektas, ke iuj subtaksis Baghy, ĝuste ĉar estas tiel facile, legi lian prozon; sed tia tuja komprenebleco kombinita kun serioza kaj foje eĉ subtila enhavo kostas multajn artajn zorgojn.

Ĝenerale la budapeŝta skolo kaj la tuta etoso kaj altaj kriterioj de la eldonejo "Literatura Mondo" kaj la sam-noma gazeto havis bonan efikon sur nian prozon; ni pensu ekzemple pri Ferenc Szilágyi aŭ K.R.C. Sturmer, aŭ pri la noveloj de Reto Rossetti, kiuj, plejparte, unue aperis en "Literatura Mondo".

Ĉe Reto Rossetti oni trovas grandan inĝeniecon, videblan plezuron, kvazaŭ ian avidan gustumemon, pri uzado de la lingvo, ekzemple por konversacii, ironii, sakri, interjekcii, aŭ por vivaj flugtuŝaj etaj metaforoj. Rossetti tamen tute ne penas tro individuisme ŝanĝi nian lingvon, krei propran dialekton; ordinara leganto ajnlanda povus tuj kapti lian intencon; la freŝeco de lia stilo konsistas el plena, sprita ekspluatado de la veraj eblecoj de la zamenhofaj reguloj, kutimoj kaj vortprovizo, kun nur kelkaj tiuepokaj neologismoj. Rossetti ankaŭ instigis sian fraton, Cezaron, verki sian aŭtobiografian romanon, "Kredu min, Sinjorino!" (1950); kaj tie denove, kvankam parte pro helpo de Reto, ni trovas tiun ĝojon en plena uzado de la lingvo, kiu ĝojigas observeman leganton; speciale, Cezaro Rossetti kaptas en Esperanto konvinkan slangon, proverbecajn frazojn, insultojn kaj aliajn konversaciajn spicaĵojn.

Eĉ pli ĝoja pro plaŭdoplena, petolema, plena naĝado en la oceano de la lingvo estis Raymond Schwartz, kun siaj vortludaj

piroteknikaĵoj, veraj fantazioj de gulaĵoj el radikoj, "kun siaspeca spico". Fakte, lia preskaŭ obseda vortludemo povas finfine tedi; sed ĝi valore atestas pri eblecoj de nia lingvo, kaj ni ne forgesu, ke Schwartz verkis fruan seriozan romaneton, "Anni kaj Montmartre", kaj unu el la vere solidaj kaj malnaivaj esperantaj romanoj, "Kiel Akvo al Rivero". Lin sekvis, tiufake, John Francis, kun "La Granda Kaldrono" kaj "Misio sen Alveno", kvankam, miaopinie, la plej brilaj prozaj perloj de Francis estas liaj noveloj.

Satiro estas la literatura ĝenro, kiu malplej plaĉas al mi, pro ĝia esence negativa sinteno kaj preskaŭ neevitebla elemento de nejusteco; sed nepre necesas mencii la tre nigrajn satirajn romanojn de Sandor Szathmári, ĉar ili estas inter malmultaj esperantaj verkoj, kiujn ni povas senhezite egaligi al samĝenraj nacilingvaj ĉefverkoj; do Szathmári vere estas unu el niaj grandaj prozistoj.

Oni eble ne sufiĉe atentis la propagandan valoron, en rondoj de nacilingvaj literaturamantoj, de libreto unika, "Specimene" (1962) de Henri Baupierre (Henri Vatré); kiom ajn ĝi ruĝigis min persone - kaj juste! - mi trovas ĝin tre signifa, ĉar la ebleco parodii verkojn esperantajn, kaj parodii ilin tiel lerte, trafe, detale, ke oni tuj rekonas karakterizojn kaj ekridas - eminente atestas ne nur pri la ekzisto de esperanta literaturo, sed pri rekoneblaj, forte diferencaj stiloj prozaj kaj poeziaj. Individuoj jam havas tre diversajn stilojn, tute inter la limoj de la normala, fundamenta Esperanto.

Mi menciis nur kelkajn gravajn prozistojn aŭ verkojn; sed niaj prozistoj facile provizus nin per materialo por pluraj preleg-serioj en universitata kurso. Kaj ne necesas longe retrorigardi por trovi talentojn: mi ĵus komencis legi kun ĝojo la romanojn de István Nemere, kiu ne nur rakontas interese, sed posedas maturan kaj riĉan stilon; mi avide kaptas ĉiun freŝbakitan frandaĵon de Johano Valano, kiu komprenas la valoron de malpeza legmaterialo en iu kulturo vere homa; serie aperis la brilaj eseoj de la nekomparebla Waringhien, kiu daŭre kontribuis al nia kulturo eĉ dum sia naŭa jardeko; venas interesaj verkoj el Japanio, Ĉinio, Norda Vjetnamio; kaj novaj voĉoj havas siajn individuajn tonojn. Kredeble post dek jaroj aŭ malpli, ni aŭdos iun gravan voĉon el Afriko.

Plej debatstimulaj ĝuste nun estas, kredeble, la romanoj de Karolo Piĉ. Mi mem forte kontraŭas lian grandskalan enkondukon de neologismoj, precipe novaj prepozicioj, afiksoj kaj konjunkcioj, kiuj riskas konfuzi lernantojn kaj grave malfaciligi

lingvolernadon kaj lingvouzadon, dum eksteraj radikoj substantivaj, adjektivaj aŭ verboj, eĉ superflujaj, relative facile ensorbiĝas se ili vere utilas. Sed ni argumentu, ni ne insultu: unue ni rekonu Piĉ kiel tre dediĉitan artiston kaj seriozan teoriiston, kies intencoj estas bonaj. Pri la taŭgeco kaj neceso de novaj vortoj, estos, kiel ĉiam en la historio de Esperanto, la esperantista popolo, kiu finfine decidos, per disvastigado de uzado aŭ per ignorado. Pri tiaj proponoj, ni memoru, ke oni nek volas operacii pacienton, nek defendas lin kontraŭ tro drasta operacio, se li ne plu vivas....

Mi ja scias, ke ĉi tiu prelego estas truoplena kiel kribrilo; unu grava manko estas, ke ne estis tempo por prezenti specimenojn de diversaj prozaj stiloj; sed oni legu la librojn! kaj oni neniam forgesu, ke, kvankam ne ĉiuj kapablas verki, tre necesa parto de la evoluigo, disvastigo kaj fortigo de nia literaturo estas la legado kaj la aĉetado de niaj libroj kaj gazetoj. (Kaj tiuj el ni, kiuj havas monon kaj organizajn rimedojn por aĉeti librojn kaj aboni gazetojn, ne forgesu, ke en multaj landoj seriozaj esperantistoj kaj kuraĝigindaj lernantoj apenaŭ povas esperi posedi legmaterialon, se iu ne sendos al ili ion).

En unu eta prelego mi povis mencii nur kelkajn elstarajn, foje epokfarajn, figurojn; iu alia elektus malsame; mi nur gratetis la surfacon de vasta monto plena de interesaj gangoj. Sed espereble ĉi tiu fragmenta studaĵo jam plene montris, ke laŭ la kvanto, kvalito kaj vario de nia jam ekzistanta proza literaturo, Esperanto tre evoluis, fortiĝis, kaj por multaj celoj jam klare sukcesis. Eĉ sukcesegis. Eĉ, rilate al ĉiuj cirkonstancoj, evoluis, fortiĝis kaj sukcesis kvazaŭ mirakle.

HORIZONTO

*KULTURA KAJ INFORMA REVUO
DE LA NEŬTRALA ESPERANTO-MOVADO*

Malnovajn ekzemplerojn vi povas aĉeti ĉe: Peter Zacho,
Nørregårdsvej 91, DK-2610 Rødovre, Kopenhago, Danio.

Baldur Ragnarsson:

Membro de la Akademio
de Esperanto



CENT JAROJ DE POEZIO EN ESPERANTO

Poezio en Esperanto dum cent jaroj: tio estas mia temo. Temo vasta, kvankam la mondo ne-esperantista preskaŭ ne konas ĝin. Kaj se okaze iuj ne-esperantistoj informiĝas pri la ekzisto de nia poezio, ili emas ne agnoski ĝin kiel poezion - poezio en lingvo arta ne estas ebla: tiajn antaŭjuĝojn ni ja konas. Eĉ la esperantistoj mem ne estas senteble entuziasmaj pri nia poezio, multaj dubas pri ĝia utilo, rigardas ĝin kiel ludon, kiu neniel aŭ malmulte helpas al la progreso de la lingvo sur tiuj kampoj, kie ĝi nepre servu laŭ ilia opinio: en la praktiko kaj la scienco. Eĉ la poetoj mem okaze malesperas:

"Ĉu plu projekti, fidi kaj revii malgrandknabe,
Kaj meti mozaikon el la lingveroj splitaj,
Aŭ ĵeti for el mano la plumon, kiel Kabe,
Kaj eksilenti - patro de versoj abortitaj?"

Tiel verkis Kalocsay en 1924. Tamen, kiel eldiras Marjorie Boulton en sia poemo pri Hilda Dresen:

"La delikata art' realas,
observo, sento, vero, ordo".

Niaj poetoj, malgraŭ ĉiuj obstakloj, daŭrigas observi kaj senti, serĉi la veron, ordigi ĝian esprimon kaj ĝin realigi en formo de tia delikata arto, kia estas la poezio. La Esperanta poezio estas fakto, kaj kiel ĉiuj gravaj kulturaj faktoj, ĝi serĉas sian rekonon - kaj ĝin trovas.

Por rekoni, por kompreni, ni bezonas vidpunkton. Vidpunkton, kiu permesas al ni pritaksi ne nur la objektivajn aspektojn de

nia temo, sed ankaŭ la subjektivajn. Vidpunkton, kiu ebligas analizi la formajn eksterojn kaj temajn evoluojn de nia poezio por poste ilin resintezi en tutafon pli profunde komprenitan; vidpunkton, kiu agordas la menson al simpatio kaj kunsentado, kiuj solaj ebligas vere eniri poemon ĝis la medolo. Tia simpatio intime ligiĝas al kompreno pri la kreaĵ cirkonstancoj de la koncerna poemo, kaj al amo al la lingvo mem. Ne eblas laŭmerite taksi ekzemple nian fruan poezion krom pere de tia kompreno, tia kunsentado, tia amo. Objektivaj kriterioj ne sufiĉas por plene kompreni la eksperimentojn, la sinesprimojn de Zamenhof, de Kofman, de Hankel, de Privat, kaj la ceteraj fruaj poetoj en nia lingvo. Ili verkis en aparta medio, en difinitaj sociaj cirkonstancoj, sub influo de certaj kulturaj postuloj. Krome, ili pionire pripalpis sian vojon enkadre de nova, freŝa lingvo; ke ili tute nature sekvis la plej facilan, plej sekuran vojon: tiun de maltensio, ne estas kritikinda en ilia kazo. Tensio en poezio, tiu plej karakteriza trajto de la moderna poezio, estis fremda al la liriko de la jarcentofino kaj longe poste, ne nur en Esperanto, sed ankaŭ en aliaj lingvoj. Ni ne kritiku niajn pionirajn poetojn pro manko, kiu ne estas ilia kulpo.

Ni pripensu por momento la poemojn de Zamenhof mem. Ili certe sin adresas al du sintenoj al poezio, kiuj estas bazaj: la inteligenta kaj la emocia. La inteligenta sinteno al poezio rilatas unuavice al la senco. Mi havas la konvinkon, ke la senco estas unuaranga en poezio, - la sonaranĝo, la sense perceptebla ekstero de poemo, havas plenan validon nur, kiam ĝi kontribuas al la senco per taŭgaj emfazo, paralelismoj kaj esencaj strukturaj efikoj. Poemo estas antaŭ ĉio komuniko de senco, aŭ pli specife, de poezia senco, per kontinua vico da lingvaj formoj. Kaj Zamenhof unuavice celis komuniki. Komuniki la sencenhavon de sia idealismo al la esperantista publiko, laŭeble rekte kaj senstreĉe. Liaj metaforoj estas anemiaj al moderna leganto, ili ne havas la tension, kiun multaj konsideras nepre nuntempe. Sed ili tamen sukcesas efektiviĝi tian transagon inter sencunuoj, kiu validigas metaforon: la muroj inter la popoloj, la semoj, kiuj perdiĝas, la monto traborata de la konstante frapantaj gutoj. Sed nenio surpriza, nenio mensostreĉa aperas en liaj poemoj. Ili antaŭ ĉio prezentas la sencon de la temo sendevie, sencon, kiu en la tiutempa socia cirkonstanco esperantista rikoltis fortan reagon, ne nur entuziasman, sed ankaŭ antagonisman. Zamenhof devis cedi pri la lego de la lasta strofo de sia "Preĝo sub la verda standardo" ĉe la Unua Kongreso, kaj ne aperigis ĝin en la Krestomatio.

Kiajn emociigajn rimedojn uzis Zamenhof en siaj poemoj? Ĉefe

du: la sentan enhavon de sia mesaĝo peratan de nespecifaj vortoj eĥantaj sentojn komunajn de sia aŭskultantaro, kaj sonorajn ritmojn kaj rimojn, kiuj emas drogi la aŭskultantojn. Ĉi tiuj estas rimedoj, kiuj karakterizas tian sintenon al la poezio, kiun oni kutimas nomi romantisma. La romantisma sinteno unuavice koncernas la povon de la poezio ravi la leganton. Por esti ravebla la homo devas demeti aktive kritikan alfrontemon, li devas esti mense manipulebla, psike akceptema. Certe ni povas supozi, ke precize tia estis la ĝenerala mensostato de la kongresanaro en Bulonjo-sur-Maró siatempe. "Kiam residis Zamenhof, denove aklamata senfine, multaj okuloj estis malsekaj", skribis Edmond Privat pri tiu evento en sia "Vivo de Zamenhof". Nuntempe, kiam poetoj klopodas drogi siajn aŭskultantojn per ritma sonoro de siaj versoj, ili ne tiel sukcesas. Mankas evidente tia akceptema mensostato ĉe la poemleganto aŭ aŭskultanto, kiu necesas por ke tiaj rimedoj efiku malfalse. Tio tamen ne devas malhelpi al la nuntempa esperantisto apreci la Zamenhofajn poemojn kaj aliajn el la unua periodo de nia literaturo. Tiujn ni devas taksu laŭ kriterioj, kiuj konvenas por tiu periodo. Ni ne serĉu tie la kvalitojn, kiuj apartigas, ni diru, la modernismon en poezio. Tio simple ne estas justa, kaj kondukas nin sur malĝustan vojon.

El ordinara, homa starpunkto cent jaroj ŝajnas longa tempo. Kiel evolutempo de literatura ĝenro ĝi tamen ne estas longa. Demandoj leviĝas: Ĉu cent jaroj sufiĉas por pravigi konstaton pri difinitaj tendencoj en literaturo? Ĉu ĝistioma tempo ebligas evoluon de diferencaj literaturaj skoloj?

Komparo kun naciliteraturaj kondiĉoj ne liveras tre pozitivajn respondojn al tiaj demandoj. Angla kritikisto, F.W. Bateson, atentigas ekzemple pri tri skoloj de la angla poezio: la Renesanco, la Aŭgusta kaj la Romantisma, ke ili havis efektivan daŭron de proksimume sama longo. Inter la unuaj verkoj ĝis la lastaj de tiuj tri skoloj li kalkulis 164 jarojn, 193 jarojn kaj 178 jarojn respektive. Tio signifas, ke ĉiu el la menciitaj anglaliteraturaj skoloj superetendas kvin generaciojn, se oni kalkulas generaciojn po ĉ. 35 jaroj.

Evidentas, ke tia kriterio ne estas transmetebla al la Esperanta poezia historio, kvankam ni emas konstati tie diferencojn, kiuj almenaŭ supraĝe egalvaloras diferencajn skolojn. Mi memorigas pri la dividoj de Auld en liaj du eldonoj de la "Esperanta Antologio": la tristadian en la I-a eldono de 1958: Romantismoj primitiva kaj polurita, kaj Metafiziko, kaj la kvarstadian en la II-a eldono de 1984: Romantismoj primitiva kaj matura, Parnasismo kaj Postparnasismo. Ni ja havas niajn diferencojn,

niajn dividojn, eĉ niajn skolojn en miniatura senco. Iuj tamen plendas, ke la Esperanta poezio estas iusence anakronisma, ke la modernismo ankoraŭ ne tre sentebles en nia poezio, ke niaj poetoj estas ankoraŭ tro multe influataj de romantismaj kaj parnasismaj sintenoj. Tio tamen ne estas tute vera, dum la lastaj tridek jaroj modernismaj tendencoj estas klare konstateblaj ĉe iuj el niaj poetoj. Demando estas, kiuj alproksimiĝi al la historio de nia poezio; ĝi havas sendube apartan pozicion inter la literaturoj de la mondo. Mi elektas la vojon ne klopodi nete difini ĝin laŭ apartaj skoloj, sed rigardi ĝin kiel tutafon, kie oni povas distingi eksperimentadon, aŭtentikon, rafinitecon, dekadencan, kaj fine komencon de io nova.

F.W. Bateson, la kritikisto, kiun mi menciis antaŭe, dividas difinitan literaturan skolon laŭ kvin stadioj jene: La unuan stadion okupas la Eksperimentaj Iniciatantoj, la duan la Ĉefroluloj, la Protagonistoj, la trian la Aŭtentikaj Majstroj, la kvaran la Rafinitaj Metiistoj kaj la kvinan la Dekadenculoj. Li tamen ne sugestas, ke ĉiu skolo ekzakte konformas al tia skemo, sed ke la ĝeneralaj tendencoj ŝajnas iel tiaj. En ĉiu skolo la tria stadio, tiu de la Aŭtentikaj Majstroj, povas esti konsiderata la klasika esprimo de tiu skolo. Tie ni havas la oran momenton de ekvilibro inter la fortoj de la evoluo kaj la fortoj de la kadukiĝo.

Kiel aplikeblas tiaj dividoj, terminoj kaj kriterioj al la historio de la Esperanta poezio? La respondo, laŭ mia takso, povas esti nur relativa. Evidente la tempodaŭro de nia poezio estas tro mallonga por povi absolute kompariĝi kun la menciitaj kvin stadioj de evoluo. La sola interpreta vojo, laŭ mia opinio, estas rigardi la historion de nia poezio relative, kiel ian miniaturan korpuson, kie daŭre efikas akcelaj fortoj. Tiuj fortoj tendencas konstrui imiton de la evoluaj tendencoj de la nacilingvaj literaturoj laŭ pli-malpli artefaritaj manieroj, kunpremante la kunpremeblan, sintezante la tempajn efikojn en malpli ampleksajn funkciajn unuojn. Tiel klopodas tiuj fortoj aŭtentigi nian literaturon, specife la poezion, laŭeble paraleligante ĝin al tiuj eksteraj faktoj, kiuj estas konstateblaj ĉe la naciaj literaturoj en la nuna jarcento, precipe ĉe la Eŭropa literaturo. Elirante el tiu vidpunkto rilate al la historio de nia poezio mi riskas analizi ĝian evoluon jene:

Unue, la komenca periodo, kiu atingas ĝis la fino de la unua mondmilito. El lingva vidpunkto tiu periodo estas monotona kaj senvaria, grandparte pro la tre limigita materialo de la tiama lingvaĵo. Sed ankaŭ enhave kaj esprimmaniere ĝi estas malriĉa kaj naiva el moderna vidpunkto. Ĉi tiu periodo havas daŭron

ekde la komenco ĉe Zamenhof ĝis la aperoj de Miĥalski kaj Kalocsay. La naivismo de tiu periodo karakteriĝas ĉefe per du trajtoj. Unuflanke vegetas senverva romantismo, verŝajne influita de ia nedigestita sento pri la ĝenerala dekadenco de tiu poezia skolo en ĉiuj Eŭropaj landoj en tiu tempo; aliflanke mankas poetaj talentoj krom agnoskinde ĉe Edmond Privat, kiu iom montras pli profundan komprenon pri poezia senco ol la ceteraj versaĵistoj de tiu periodo. Li havas almenaŭ la honoron enkonduki lingvan metaforigon en nian poezion kiel esencan poezian rimedon, kvankam unuopaj metaforoj ja estas troveblaj antaŭ lia "Tra l'silento", eĉ en "La Espero" de Zamenhof. Privat komencis ankaŭ esprimriĉan uzadon de adverboj, plejparte neglektitan antaŭe. Sendube la primitiva lingvomaterialo de tiu unua tempo enhavis en si ne nur la evidenton de malhelpo al poezia kreado, sed ja ankaŭ defion, sed tiel nur por vere lingve konsciaj poetoj kiel Privat, Kofman kaj Grabowski, kiu lasta cetere montris sian talenton preskaŭ nur kiel tradukanto. Oni ankaŭ ja povus hipotezi, ke se Zamenhof mem estus sin pli okupinta pri verkado de originala poezio, ankaŭ li estus prirapidiginta la evoluon de la poezia lingvo, sed certe oni ne devas bedaŭri lian preferon por la prozo; la historio jam delonge pravigis tiun lian elekton.

Tiu naivisma periodo ne povas esti konsiderata ia skolo de poezio. Maksimume ĝi estas ia eksigno pri la ĝenerala direkto de la komenciĝanta Esperanta poezio favore al plifortiĝanta romantismo, malgraŭ la kreskanta alidirektiĝo ĉe la nacilingvaj poezioj dum la intermilita tempo. Dum tiu periodo ni jam povas konstati ian strangan anakronisman tendencon en la Esperanta poezio, anakronismon, kiu eĉ ankoraŭ sentigas sin ĉe iuj el niaj poetoj. Por tion esplori ni unue rigardu supervide la intermilitan periodon.

Kvin poetoj la plej grave influis la evoluon de la Esperanta poezio dum la unua intermilita jardeko: Miĥalski, Kalocsay, Baghy, Schwartz kaj Hohlov. El tiuj kvin Miĥalski certe estas la lingva eksperimentanto en la vera senco de la vorto. Se ni rigardas ankaŭ Kofman, Grabowski kaj Privat el la unua periodo kiel eksperimentantojn pri la kapabloj de la nova lingvo, ni havas ĉi tie almenaŭ kvar poetojn el la frua stadio de la formiĝanta romantisma skolo, tiel karakteriza tra la daŭro de nia poezia historio, kiuj, kvankam neegale, kontribuis al la ekevoluigo de la poezia lingvouzo. Ĉu ni povas egaligi ilin al tiuj verkistoj de la unua stadio de literatura skolo, kiuj nomeblas Eksperimentaj Iniciatantoj? En miniatura senco, eble jes, kvankam Miĥalski ja havas apartan pozicion laŭ la enhavo

kaj direkto de sia poezio. Tamen, malgraŭ realismaj eldiroj, kritikoj kaj aludoj en multaj el liaj poemoj, precipe en "Fajro kuracas" kaj "Prologo", oni facile povas konstati ĉe li sube kaj ofte libere funkciantan romantisman movforton. Ni do povas diri, ke ni havas ĉi tie disvolviĝon de poezia skolo, ĉi-kaze de la Esperanta Romantismo.

Ĉu do la ceteraj: Kalocsay, Baghy, Schwartz, Hohlov kaj iuj malpli gravaj poetoj de la postmilitaj jaroj, estas rigardeblaj kiel la ĉefroluloj, la Protagonistoj de la romantisma stilo en Esperanto? La afero ne estas tiel simpla, se oni konsideras la historie gravan influon de la celkonscia agado de tiaj literaturistoj kiel Kalocsay kaj Waringhien, i.a. pere de ilia "Parnasa Gvidlibro" aperigita en 1932. La ĝistia nebuleca evoluo de nia poezio tiam rimarkinde rapide akiris serenajn direkton pro la rekta kaj insiste aŭtoritata influo de tiu libro, kiu dum preskaŭ tri jardekoj kontrolis la iradon de nia poezio: Ĉi tiun periodon Auld nomas Parnasismo, daŭranta laŭ lia difino de 1931 ĝis 1956. La termino Parnasismo ŝajnas taŭge elektita, ĉar ĝi rekte ligas almenaŭ parton de la karaktero de tiu periodo al la klasikismo, kiu laŭ difino klopodas respeguli la kvalitojn de la antikva greka kaj romana kulturoj, precipe en literaturo kaj arto.

Evidente la aŭtoroj de la Parnasa Gvidlibro celis ordigon, ordigon de la poezia esprimo en Esperanto. Ili skizis la regulojn de la metriko, aldonante rimvortaron; Kalocsay ankaŭ tie disvolvis per versoj sian arton poetikan, tiel impresante la poetojn per siaj personaj spertoj kaj vidpunktoj. Demando stariĝas: Ĉu nia poezio en tiu tempo vere bezonis tian ordigan gvidadon? Verŝajne jes. Tro abundis fuŝaĵoj en nia poezio tiutempa, ia informado, gvidado kaj klopodo ordigi la konfuzon estis bezonataj. Sed tiu, ja agnoskinde respektinda kaj bonintence kontrola fortostreĉo tamen havis sian negativan flankon. Kalocsay kaj Waringhien ambaŭ apartenis al tiu generacio de alte kulturitaj homoj, kiuj multe emis al tiu klasikisma vidpunkto, kiu emfazas senton pri formo, unuecon de strukturo kaj celo, klarecon, ekvilibron, moderon, memkontrolo, intelekton, konservativismon. Samtempe ili estis ankaŭ sub la influo de la ĝistia romantismo konstatebla en la Esperanta poezio. Kalocsay mem estis verkinta subtilan poezion laŭ tiu stilo. Do, ilian klasikisman sintenon eniras ankaŭ forta tendenco al romantismo, kiu kiel literatura skolo tamen kutime estas kontrastigita al la klasikismo, kvankam, agnoskinde, tiuj du skoloj fojfoje troviĝas en sinteza kombino. La efikanta rezulto de la Parnasa Gvidlibro estis do pliordigo de romantismaj

tendencoj en la evoluo de nia poezio, kun aparta emfazo pri klaro kaj ordo. Tiu emfazo portis en si la danĝeron forrifuzi ĉian oblikvecon kaj deviojn dis de la reguloj de ordinara prozodio. Ĉi forte subtenis la rolon de la intelekto rilate poezian esprimadon, karakteron, kiun mi cetere, parolante pri la graveco de la senco en poezio, jam enplektis kiel nemalhaveblan. Sed samtempe tiu emfazo pri klaro kaj ordo emis malvastigi la skalon de la akcepteblaj aperoformoj de la intelekto en poezio. "Do - viajn versojn fajlu sen ripozo / ĝis ili fluos kiel bona prozo" estas unu el la konsiloj, kiujn donas Kalocsay en sia "Arto Poetika". Ion similan li skribis al mi persone antaŭ multaj jaroj, asertante, ke se la senca enhavo de poemo ne estas transmetebla en klaran prozon, io ne estas en ordo. Mi ne scias, kiom da seriozo li inkluzivis en tiu aserto, altkvalita poeto kiel Kalocsay certe konsciis pri tio, ke en bona poemo regas aliaj semantikaj principoj ol en proza verkaĵo, ke tie antaŭ ĉio validas la principoj de subtila sintezado, ne tiuj de analizado, tiuj de aludo kaj oblikvo, ne tiuj de fermo kaj rekto. Sed restas la sinteno, ke Kalocsay faris akran dividon inter tia poezio, kiun li nomis intelekta, kaj tia poezio, kiun li tro ĝeneralige nomis antiintelektala.

Nu, kion diri? Mi mem havas la firman opinion, ke la Parnasa Gvidlibro faris nesupertakseblan servon al la Esperanta poezio, en tiu senco, ke ĝi multe helpis por konsciigi la esperantistojn pri la ekzisto kaj valoro de poezio kiel inda esprimformo en nia lingvo, samtempe plialtigante la kriteriojn pri polurita formo de metrikaj poemoj. Ĉi tiu lasta ja estas laŭdinda rezulto kaj rekte devenas de la klasikismaj sintenoj de la aŭtoroj. Certe ni povas danki al tiu emfazo pri forma kultivo la pliiĝantan rafinitecon konstateblan en nia poezio dum la postaj jardekoj. Ĉu ni eble do povas paroli ankaŭ pri Rafinitaj Metiistoj kiel stadio en nia poezio? Kaj sekve de tiuj, pri Dekadenculoj? Pri tiu lasta stadio apenaŭ estas dubo. La romantisma periodo de nia poezio certe atingis la finon de sia evoluo. Romantismaj poemoj ankoraŭ aperas, sed iom malegale distribuite laŭ landoj kaj kultursferoj, kaj ja havantaj ĉiujn signojn de dekadenco. Novaj tendencoj, novaj stiloj, iom post iom dum la lastaj du aŭ tri jardekoj ankaŭ samtempe ĉiam pli certigas pri sia vivrajto, sia ekzisto tra sia disvolviĝanta ekstadio, kaŭzante forpaliĝon de la romantismo.

Antaŭ ol mencieti la modernismajn tendencojn en la Esperanta poezio, mi volas mallonge resumi la jam diritan. La disvolviĝo de nia poezio havas plejparte romantisman karakteron, kiu evoluis ekde palpanta naivismo tra ĉiam pli konscia trakto de lingvo kaj enhavo, kiu atingis sian kulminon en la poeziaj verkoj de

Kalocsay, kiu tiupozicie eble meritas noman difinon kiel nia sola Aŭtentika Majstro de la romantisma skolo. La influo de la Parnasa Gvidlibro kaj de la Budepeŝta revuo "Literatura Mondo" rezultis plejparte en produkto de poezio, kiu ĝenerale karakterizeblas kiel rafinita metio kun individuaj trajtoj de poezia aŭtentikeco. Mi rimarkigas pri tio, ke la vorton "metio" mi uzas ĉi tie nepre en pozitiva senco. Ĉi-rilate mi volas memori pri iama eldiro de Auld pri Kalocsay mem, ke ties graveco kiel poeto originala troviĝas en la fakto, ke li estas elstara metiisto ("Enkonduko en la originalan literaturon de Esperanto", p.45). La dekadencan stadion de la romantisma skolo ni havas ankoraŭ inter ni, sed ĝiaj signoj ĉiam pli minimumiĝas.

Kaj fine, kio pri modernismaj tendencoj en la nuntempa Esperanta poezio? Auld, en sia postparolo por la II-a eldono de sia "Antologio" datas la komencon de la periodo, kiun li nomas Postparnasismo je la publikigo de "La Infana Raso" en 1956. Post tio aperis verŝajne iom malpli ol cent poemplibroj en Esperanto. Ĉu ni povas egaligi la Postparnasismon de Auld kun la modernismo? Laŭ mi, nur parte. Efektive, la lastajn tri jardekojn de nia poezia historio karakterizas ia eklektikismo pli ol difinitaj modernismaj tendencoj. La poetoj ĝenerale elektas formojn, vidpunktojn kaj esprimmanierojn laŭ siaj kulturaj fonoj kaj emoj. "La Infana Raso" mem estas miksita verko, forme kaj esprimare; laŭ atesto de la poeto li tie klopodis "ekspuati ĉiujn prozodiajn eblecojn ĝis tiam elprovitajn en Esperanto", sed li kreis ankaŭ novajn formojn kaj novajn poeziajn rimedojn, aŭ surbaze de la tradicio, aŭ memstare. Ĉe Edwin de Kock, kiu eble estas nun nia plej ambicia poeto, ni povas konstati ĉion: tradicie metrikajn poemojn, eĉ en formo de eposo, erudiciajn reagojn al tiu tradicio, rezultantajn en novmetrikaj eksperimentoj, kaj ankaŭ tute modernismajn poemojn laŭ aspekto kaj vidpunktoj. Ni ankaŭ havas ĉe ni poetojn, kiuj evoluigis la tradicion al nova freŝeco, elvolvante novajn temojn, kreante novan sentivecon; ĉi tie plej menciindas Marjorie Boulton, kiu per sia poezio donis al ni novan sentan dimension, la virinecon. Sed la moderneco en la kutima senco: konscia disiĝo for de la tradiciaj normoj, estas inter ni tiel rara, ke Kris Long, en intervjuo antaŭ tri jaroj, kuraĝis aserti, ke ĝis tiam nur du Esperantaj poetoj povas esti karakterizataj kiel modernismaj, li menciis Sadler kaj Ragnarsson. Certe ne decas, ke mi komentu pri mi mem, sed mi certe aldonus pliajn poetojn karakterizeble modernismajn: Nervi, Nogueira, Rossi, kaj certe ankaŭ Auld, kiu faris la pioniran laboron per "La Infana Raso", malgraŭ ĝia miksita karaktero, kiun mi jam menciis.

Kio estas antaŭ ni sur la vojo en la futuron? Kio atendas niajn poetojn? Lastsomere mi havis la okazon kunlabori en elekto de poemoj por libreto titolita "Poemaro por paco". Mi ne povis eviti la impreson, ke ne plu eblas fari aŭtentikajn komentojn pri la mondo kaj ĝia destino, pri la pozicio de la homo en la Universo, pere de poezio. Mi emas samopinii kun la angla literaturisto J.M. Cohen, fine de lia libro "Poetry of This Age", ke la eventoj de nia epoko nanigis ĉian eblan poezian komenton. Auld jam verkis "La Infanan Rason", Edwin de Kock ankoraŭ laboras super sia eposego "La Konflikto de l'epokoj". Tiaj fortostreĉoj ne estas ripeteblaj. La poetoj povas esperi nur tion, ke ili sukcesos elsvi sian individuecon per personaj komentoj pri momentoj de klara kompreno pri propraj spertoj. Ĉu ni nomu tiun sintenon modernisma aŭ ne, malmulte gravas. Kio gravas estas persona senpretendo. Kaj progresigi nian lingvon, ne nur poezie, sed ankaŭ ĝenerale. Je la nuna stadio la plej inda servo, kiun povas fari la poetoj al Esperanto, estas ĝin pli subtile nervizi, t.e. provizi ĝin per pli da asociiĝe semantikaj nervoj, por riski la uzon de organisma metaforo. Neologismoj, kvankam ofte necesaj, nesufiĉe kontentigas tiun bezonon je nervizado de la lingvo. Novaj valoroj en vivanta literaturo prefere kreskas el novaj vidpunktoj, novaj pensaj kombinoj kaj serioza alfrontiĝo al psikaj realaĵoj. Novaj valoroj kreiĝas el persista fido al la transformaj povoj de la profundaj strukturoj de la lingvo, la lingva psiko mem, por denove riski organisman metaforon.

En mallonga lekcio ne eblas doni kontentigan superrigardon pri tiel vasta tereno, kiun jam okupas la poezio en Esperanto. Ĝis nun mi ekzemple ne menciis nian tradukitan poezion. Tamen ĝia rolo en disvolviĝo de nia poezio ne estas troige emfazebla. Inter "Sinjoro Tadeo" en traduko de Grabowski kaj "Aniara" en traduko de Auld ni ja povas konstati diversajn grandfarojn mejloŝtonajn en si mem: "Inferon" kaj "La Tragedion de l'Homo" en traduko de Kalocsay, "Kalevala" en traduko de Leppäkoski, "La Luzidojn" en traduko de Knoedt, "La Sonetojn" de Shakespeare en traduko de Auld, "La Florojn de l'Malbono" de Baudelaire kaj la "Kantojn kaj Romancojn" de Heine en traduko de Kalocsay kaj Waringhien, kaj la traduk-kolekton de Kalocsay, "Tutmondan Sonoron". Aldone al tiaj ni havas centojn kaj milojn da unuopaj poemoj troviĝantaj en antologioj kaj aliloke. Tiuj tradukoj ligis nian Esperantan poezian mondon al la ĉirkaŭmondo per ligoj instigaj kaj inspiraj. Sen la tradukoj nia poezia literaturo estus alia ol ĝi nun estas.

Kaj kia ĝi estas? Unika fenomeno, kiu meritas la akcepton de la esperantistoj kaj la agnoskon de la ĉirkaŭmondo, - akcepton,

AFIŜOJ

GLUMARKOJ

POŝTKARTOJ



La poŝtkarto, 11 cm x 15 cm


La afiŝo, 48 cm x 68 cm

"La Espero"

POR LA JUBILEA JARO 1987

CENT JAROJ DE POEZIO EN ESPERANTO (Daŭrigo)

kiun ni ĝenerale dirite jam havas ja, kaj agnoskon, kiun ni ankoraŭ atendas en fido kaj - ankaŭ agnoskinde - en senpacienco.



Prof. D-ro Paul Neergaard:
Vicprezidanto de la Akademio
de Esperanto

CENT JAROJ DE ESPERANTO EN LA SERVO DE NATURSCIENC KAJ TEKNOLOGIOJ

1. Enkonduko

La apliko de Esperanto en la sciencoj, eble precipe en la natursciencoj kaj teknologioj, havas kreskantan signifon por la sukceso de la lingvo nuntempe kaj en la estonteco. Kiel ĝenerale oni scias, la nombro de nune vivantaj aktivaj sciencistoj superas tiun de la sciencistoj de ĉiuj antaŭaj generacioj en la miljara historio de la homa kulturo. Tial, evidente, la rolo de Esperanto en la sciencoj estas pli aktuala hodiaŭ ol iam antaŭe kaj postulas studon de tiurilataj faktoj, vidpunktoj kaj ebloj.

Ni devas pristudi la diversajn kategoriojn de la apliko de Esperanto kaj la efikojn de tiuj aplikoj al la ĝenerala evoluo de nia lingvo. Temas pri jenaj ĉefaj laborkampoj: popularigo de sciencoj, publikigo de rezultoj surbaze de originalaj sciencaj esploroj, disvolvado de fakaj terminaroj kaj klopodoj por kontribui al ilia normigo, aperigo de esperantlingvaj resumoj de sciencaj publikigaĵoj, revuoj kaj libroj, apliko de la Lingvo Internacia en sciencistaj konferencoj, ktp.

2. La unua periodo: Rekono de aŭtoritatuloj. Konsidero de reformoj.

En la unuaj jardekoj en la evoluo de Esperanto, kiam ĝi ankoraŭ estis en la stato de projekto disvolviĝanta al lingvo bazita sur

internacia socio de uzantoj, oni treege bezonis rekonon flanke de superaj aŭtoritatuloj. La unua tia tre helpa rekono estis tiu de Tolstoj. Zamenhof en la unuaj jaroj post la publikigo de sia projekto Lingvo Internacia, ne rigardis ĝin definitiva kaj estis preta, unue en kunlaboro kun la tre grava Amerika Filozofia Societo akcepti reformojn surbaze de la prijuĝo de intelektuloj reprezentantaj naciajn sciencajn akademiojn, kiuj tamen montris intereson pri la afero. Post voĉdonado inter la esperantistoj, temis pri kelkaj centoj, kun plimulto kontraŭ iuj ajn reformoj, ĉesis ĉiu diskutado, kaj de tiam la tiel stabiliĝinta movadeto komencis progresi.

Estas karakteriza por la unua epoko antaŭ kaj tuj post la unua mondmilito la granda intereso por ricevi kiun ajn teorian apogon de sciencaj eminentuloj kiel ekz. de la filozofo Ernest Naville, kiu atentigis la Francan Akademion pri Esperanto, de 20 membroj de la Internacia Asocio de Akademioj en 1901 kaj tiu de 40 membroj de la Franca Akademio de Sciencoj en 1924, same kiel de Albert Einstein, kiu en 1923 akceptis esti honora prezidanto de la 3-a Kongreso de SAT en Kassel, Germanio. Tiuj rekomendoj de eminentuloj vere tre ofte estas nuraj ĝentilaĵoj kaj malmulte aŭ neniom kontribuas al progresigo de Esperanto. Nur la aktiva uzado de la lingvo fare de elstaraj sciencistoj, nur tio havas efikon pli malpli daŭran. Inter la unuaj aktivaj eminentaj sciencistoj en la unuaj jardekoj de tiu ĉi periodo estis francaj famuloj kiel la fizikisto Aimé Cotton, prezidanto de la Franca Akademio de Sciencoj, la balitistikisto Hippolyte Sebert, membro de la Akademio, la matematikisto profesoro Charles Menay, membro de la Akademio, kaj la filozofo, univ. rektoro Emile Boirac.

3. Popularscienca literaturo. Rilato al la Komuna Lingvo.

La amplekso de la popularscienca literaturo en Esperanto estas modesta same rilate al la nombro de libroj eldonitaj kiel rilate al iliaj eldonnombroj. Kutime vendiĝas en la daŭro de jardekoj malpli ol 1000 ekzempleroj. Mia amiko Ivo Lapenna diris, ke aĉetas sciencajn librojn en Esperanto nur tiuj, kiuj mem verkas tiajn librojn. Libroj aperis pri temoj de filozofio, ĝenerala scienco kiel tiuj el la Internacia Somera (Kongresa) Universitato (1948, Malmö; elekto de prelegoj 1949-1954, en 1955), kaj unuope aperantaj en diversaj revuoj. La Mondpercepto de la Modernaj Natursciencoj (red. Behrmann, 1967), plue pri matematiko, astronomio, fiziko, meteorologio, geologio, biologio, inkl. de botaniko (1957), hortikulturo (1954), zoologio (1976), medicino, i.a. Nishi: Anatomio (1928), kaj Nia Korpo (1961, 1964), kaj Kato (1959): oftalmologio, cetere akupunkturo,

geografio. Popularscienca prelegaro estas fiksita program-parto de ĉiuj Universalaj Kongresoj. En 1910-1912 aperis trivoluma libro de Cyrril Vörös pri la neeŭklida geometrio de Balayi, jam ne popularscienca, sed pli ĝuste universitata lernolibro. Fama estas la libro de Aisberg: Mi fine komprenas la Radion, tradukita el Esperanto en pli ol dudek lingvojn.

Aperis multaj popularsciencaj artikoloj en plej diversaj libroj kaj revuoj, kiel jam en la klasika Fundamenta Krestomatio de Esperanto aperinta unue en 1903 sub redakto de Zamenhof, en kiu estas 60 paĝoj da popularsciencaj artikoloj. Tiaj artikoloj aperis multnombre en la revuoj Scienca Revuo, Astronomio, Kemio (kvar volumoj 1964-1968), El Popola Ĉinio kaj aliaj gazetoj de unuopaj landoj. La temoj ofte estas tagaktualaj en la tempo de publikigado, kaj multaj sciencaj-teknikaj terminoj, ofte uzataj en la etnaj lingvoj, eniras en la komunan lingvon kiel necesa parto de la ĉiutaga lingvaĵo. Ekz. en la lastaj jaroj (post la apero de Plena Ilustrita Vortaro, PIV) multaj fakesprimoj de komputeristiko eniris universale la ĉiutagan lingvon de ordinara konversacio kaj de la gazataro. Scienca terminologio estas integra parto en la moderna evoluo de ĉiuj lingvoj inkluzive de la Lingvo Internacia.

4. Studoj bazitaj sur originalaj esploroj.

Jam frue en la historio de Esperanto oni publikigis la unuajn raportojn pri originalaj sciencaj esploroj - la vera testo de la uzebleco de nia lingvo por sciencaj celoj. Ekde 1904 oni eldonis Internacian Sciencon Revuon, kiu ĝis la unua mondmilito aperis kun entute ĉ. 4000 paĝoj. Inter pluraj original-esploroj en ĝi ŝajnas al mi aparte menciinda tiu de la fama svisa entomologo kaj seksbiologo Auguste Forel. Li publikigis raporton pri nova genro kaj specio de formikoj kun la baza priskriba diagnozo en Esperanto, do temo el la sciencobranĉo, en kiu Forel famiĝis. Ankaŭ en Medicina Internacia Revuo (nun Medicina Revuo), kiu nuntempe aperadas en Japanio, daŭre aperas original-esploraj raportoj, same en la postmilita Scienca Revuo, en Geologio (kvar volumoj: 1968, 1972, 1976, 1987 kaj nova volumo baldaŭ aperos en Sovetio). Ekde 1983 aperas "Komputado", nun nomata "Fokuso", kun original-esploraj artikoloj. Okaze de la 50-jara jubileo de ISAE oni aperigis la volumon Sciencaj Studoj, enhavantan nur original-esplorajn artikolojn. La hungara gazeto Sciencaj Komunikadoj enhavas multajn similajn studaĵojn.

En la jaroj post 1980 fondiĝis per la iniciato kaj persista klopodado de profesoro d-ro H. Frank internacia universitato sub la nomo Akademio Internacia de la Sciencoj San-Marino, kun

plena oficiala agnosko de la Respubliko San-Marino. Ĝi havas ĉ. 300 kunlaborantajn sciencistojn el ĉiuj kontinentoj, kvalifikitajn surbaze de iliaj postenoj en rekonitaj hejmaj universitatoj kaj esplorinstitutoj, kiel ordaj profesoroj, asociitaj profesoroj, docentoj, lektoroj, asistaj sciencistoj. La ĉefa laborlingvo estas la Lingvo Internacia. Ĝi celas disdoni diplomojn post plenumo de akademiecaj ekzamenpostuloj ekde diplomo, magistro, doktoro ĝis doktoro habilitacia. Ĝis nun ĝi formale, per ekzamenoj, rekonis la universitatan gradon de kelkaj dekoj da diversnivelaĵaj diplomitoj el naciaj universitatoj. Krome ĝis nun du (afrikaj) kandidatoj post studoj en nacia instituto en la Internacia Lingvo kaj post laŭstatuta ekzameno akiris kiel la unuaj du en Esperanto ĉe AIS la gradon de magistro. Cetere vi ja jam ricevis detalojn pri AIS en la speciala programero dediĉita dum tiu ĉi Konferenco speciale al tiu ĉi pionira institucio.

Fondiĝis, fine, en 1986 la Internacia Scienca Akademio Comenius kun jura sidejo en Uppsala, Svedio, por la plej elstaraj sciencistoj kaj uzantoj de la Lingvo Internacia. La baza kriterio por fariĝi membro estas, ke oni jam estas membro de oficiala nacia akademio de sciencoj. Aliĝis 32 Fondaj Membroj, el kiuj 22 membroj de naciaj akademioj (dume du membroj forpasis, tiel ke nun estas 30 membroj, el kiuj 20 membroj estas naciaj akademianoj). Mi rapide, per la retroprojekciilo montras al vi la nomojn de la Fondaj Membroj. La Akademio eldonas Aktojn de Akademio Comenius kun nuraj original-esploraj studaĵoj. La unua volumo estas nun sub preso, aperonta en Ĉinio.

La original-esplora literaturo en Esperanto kovras ĉiujn ĉefajn kampojn de la scienco. Ĝi plene atestas la taŭgecon de nia lingvo por eĉ la plej komplikaj sciencaj tekstoj. La taŭgeco minimume egalas al tiu de tiuj etnaj lingvoj, kiuj estas aplikataj por sciencaj studoj. Tiu ĉi vidpunkto estas konfirmita de mia persona sperto. Mi publikigis sciencajn studaĵojn originalajn en tri lingvoj, la dana, la angla kaj la Internacia.

En la periodo inter 1954 kaj 1973 minimume 86 periodaĵoj regule aperigis tiajn resumojn. Inter periodaĵoj regule publikigantaj resumojn estas: Journal de Médecin de Lyon, Medicamundi (radiologio), Der Chemischreiniger und Färber, Language Problems and Language Planning, Grundlagenstudien aus Kibernetik und Geisteswissenschaft. Se oni komparas tiun ĉi situacion kun tiu de la lingvoprojekto Interlingua de Alexander Gode, kiu praktike ekskluzive sin dediĉas al publikigo de resumoj en sciencaj revuoj k.s. (sed kies nombro de parolantoj ne superas 20 en la tuta mondo, laŭ informo de Gode al Ivo Lapenna), oni povas konkludi, ke la nombro de resumoj sciencaj en Esperanto multege superas tiun de la resumoj en Interlingua.

5. Bibliografio de Esperanto-terminaroj.

Por libro eldonota, Esperantologio kaj ties DisCIPLINOJ, mi ellaboris detalan bibliografion de Esperanto-terminaroj. Mi montras al vi mian sinoptikon pri terminaroj tre rapide pere de retroprojekciilo, nur por ke vi povu havi impreson pri la granda varieco de la temoj pritraktitaj. Tiu bibliografio sendube estas la plej kompleta ĝis nun farita, sed apenaŭ estas eble fari tute kompletan tian bibliografion. En la sinoptiko la temoj estas aranĝitaj konforme al la Universala Decimala Klasifiko (UDK), uzata ĉie en la mondo. Mi inkludas ankaŭ studojn kaj tekstlibrojn same gravajn kiel listoj de terminoj. Mi indikis ĉiujn lingvojn konsideritajn en la terminaroj. La plimulton de la referencoj mi persone studis, sed restas multaj, kiujn mi ne vidis, kaj pri kiuj la informoj tial ne ĉiam estas kompletaj. La bibliografio ne aperas kun la publikigo de tiu ĉi revuo, sed en la menciita libro pri esperantologio.

6. Sciencaj kaj teknikaj terminaroj en Esperanto

La terminologia literaturo pri la Internacia Lingvo estas sufiĉe ampleksa. Ĝi kovras ĉiujn ĉefajn laborkampojn de la scienco. Tamen la elekto de temoj estas tre sporada, pri kelkaj gravaj scienbranĉoj ne ekzistas terminaroj en nia lingvo, kaj multaj el la aperintaj terminaroj estas aŭ tre malnovaj jam de 60-70 jaroj aŭ eventuale samtempe tre skizaj terminaretoj. Evidente racia disvolvado de la scienc-faka lingvaĵo en Esperanto estas ne malpli ol vitala. Svarmas, bedaŭrinde, fuŝaĵoj en la tiurilata literaturo. Devas esti nepra postulo, ke pri terminaro de iu fako okupu sin nur fakuloj de la koncerna branĉo, kun bona scio de Esperanto. Prefere ili kunlaboru por lingvistika asistado kun kompetenta esperantologo. Laŭ mia persona konstato, la klopodoj faritaj dum la lastaj jardekoj iom post iom fariĝis pli seriozaj, la nivelo ĝenerale plialtiĝis.

7. Normigo de sciencaj kaj teknikaj terminaroj

Ekde la apero de la klasika baza verkaĵo de EUGEN WÜSTER (1931): Sprachnormung in der Technik, besonders in der Elektrotechnik, daŭre okazas klopodoj unuformigi, normigi sciencajn-teknikajn terminojn en kadroj naciaj kaj internaciaj. En tiu laboro nia lingvo povas esti tre helpa, kaj por ĝia propra evoluo estas nepre necese partopreni tiun planlingvistikan faklaboron.

En la lastaj jaroj konsiderinde kreskis la intereso por ke Esperanto aktive partoprenu en tiuj klopodoj. WERA BLANKE (laste en revuo Esperanto 1986, 1987) faris revuon pri la rolo

kaj kontribuaĵoj de la Internacia Lingvo tiurilate. Aparte grava estas la atento pri terminologiaj principoj, t.e. principoj konsiderendaj ĉe racia ellaborado de terminoj. J. WERNER detale studis kaj priskribis tiajn principojn en diversaj artikoloj kaj precipe en sia kvazaŭa lernolibreto Terminologia Kurso. Liaj proponitaj principoj estas nepre studindaj, kaj mi konsentas pri ili, sed mi opinias, ke en la ĝenerala praktiko la nombro de principoj devas esti limigita kaj Werner operacias per tre multaj principoj. Jam en mia unua libro (1933, pri enkonduko de t.n. fremdvortoj en Esperanton) mi starigis 5 tiajn principojn, kaj en postaj studoj dediĉitaj al sciencaj-teknikaj terminoj mi prezentis entute 8 tiajn principojn, nome jenajn: principo de lingva unueco, oportuneco (prikaksante la neceson enkonduki terminon), internacieco, klareco, koncizo, analogio, bonsoneco kaj tradicio (NEERGAARD 1987 kaj en libro eldonota).

Scienca lingvonormigado estas vartata de la naciaj normigaj komitatoj kaj de la Internacia Normiga Asocio, kiu delegis specialan terminologian komitaton por la tasko de internacia normigado de terminoj laŭfakte. En la unua eldono de sia supre menciita libro Wüster pledis por ke Esperanto fariĝu bazo por internacia terminologia kodo (same kiel estas la latina lingvo por la nomenklaturetoj de botaniko kaj zoologio), sed post diskutoj en la Internacia Lingvonormiga Komitato li kun la aliaj membroj de tiu komitato konstatis, ke Esperanto estas nesufiĉe internacia estante ne tre konforma al aliaj lingvoj pro sia skemisma vortfarado tiel, ke ĝi ne povis esti akceptita por la rolo de internacia terminologia kodo tiel kiel tamen fakte proponis sovetiaj fakuloj (DREZEN 193?). La Internacia Terminologia Komitato preferus naturalisman sistemon de vortfarado. La dua mondmilito interrompis la internacian kunlaboron, kaj poste ĉesis ĉiuj diskutoj pri internacia terminologia kodo. Mia persona sinteno al la afero estas, ke se oni trovas realisma la eblon uzi Esperanton por internacia terminologia kodo parte pro ĝia fakta disvastiĝo en la mondo, oni devus adapti nian lingvon por tiu celo per naturalisma disvolvado de la esperantlingvaj terminaroj. Entute por la nuna scienca mondo, kiu uzas ĉefe vortformojn en tute internacia formo ĉie, la vortformoj en Esperanto devus devii de tiuj internaciaj formoj kiel eble plej malmulte. Alia afero estas fari la akran distingon al la komuna lingvo, la ĉiutaga lingvo de Esperanto. En ĝi oni devas favori la aŭtonoman, skemisman vortfaradon.

8. Esperanto kiel scienca konferenca lingvo

Kredeble la Internacia Kibernetika Asocio estas la unua ekstermovada, pure scienca organizaĵo, kiu en sia internacia

konferenco en Namur, Belgio, enkondukis Esperanton kiel laborlingvon apud la angla kaj franca. 20 procentoj de la studoj estis prezentitaj kaj publikigitaj en Esperanto. Esperanto poste restis laborlingvo en la konferencoj regule faritaj en Namur.

En la 1980aj jaroj internaciaj sciencaj konferencoj adoptis Esperanton kiel laborlingvon apud naciaj lingvoj aŭ kiel la sola. Internacia Ekologia Konferenco en Ruse, Bulgario kaj postaj samtemaj konferencoj aliloke, la komputerscienca konferenco Interkompoto '82, en kiu Esperanto estis la nura laborlingvo, kun 200 fakuloj el 19 landoj, kies raportoj aperis en 100-paĝa volumo, en 1985 la Tutmonda Asocio pri Kibernetiko, Informadiko kaj Sistemiko (TAKIS) aranĝis internacian konferencon Interkibernetiko '85 kun Esperanto kiel la ĉefa laborlingvo, en 1986 okazis sub aŭspicio de la Ĉina Scienca Akademio, Internacia Akademiula Konferenco en Pekino kun ĉ. 300 partoprenantoj, en kiu la naturscienca sekcio prezentis 30 studojn, ĉiuj en la Internacia Lingvo. Oni denove organizos tian konferencon en Pekino en 1988.

9. Retrospektive

Resume, kiom grava estas Esperanto hodiaŭ kiel internacia lingvo en la scienco? Estus nejuste kompari lingvon disvolviĝintan de projekto al lingvo dum kelkaj jardekoj kun la t.n. grandaj multmiljaraj naciaj lingvoj angla, franca, germana, rusa k.a. - kompare la uzado de Esperanto estas bagatela. Aliflanke Esperanto estas uzata pli multe internacie ol multaj t.n. malgrandaj lingvoj por ne paroli pri tiuj sennombraj etnaj lingvoj, kiuj ne havas sciencajn literaturojn.

En kelkaj fakoj, ĉiukaze en komputeristiko kaj telekomunikado, dum la lastaj jaroj Esperanto estas komparebla kun la grandaj lingvoj. Aliflanke estas sciencobranĉoj, en kiuj apenaŭ ekzistas literaturo en la Internacia Lingvo. Rimarkinda estas la potencialo de Esperanto, kiam okazas taŭgaj iniciatoj. Ĝia sukceso dependas, nature, de la talento kaj iniciatemo de la esperantistoj mem, ofte de unuopaj talentaj kaj iniciatemaj organizantoj kiel, por mencii nur du elstarajn ekzemplojn, profesoroj Haszpra, Hungario kaj Helmar Frank, FRGermanio.

La lastatempa progreso de Esperanto en scienco kaj teknologio, krom la kvalitoj de la lingvo, kondukis al kreskanta seriozezo en la sinteno de sciencistoj al nia lingvo.

Grava fariĝis la rolo de la lingvo en komputeristiko, nome en la klopodoj ellabori metodojn de "maŝintradukado". Oni konsideras uzi Esperanton kiel pontolingvon, komputeran interlingvon.

Eŭropa Komisiono, la gvida instanco de la Eŭropa Komunaĵo, financis projekton ĉe BSO, nederlanda sistemprogramada firmo, Buro voor Systeemontwikkeling, kun la celo esplori, ĉu eblas stoki kaj transsendi informojn en unu sola lingvo pere de riceviloj en la hejmoj. Komputera ricevilo en la hejmo laŭelekte tradukus en iun ajn lingvon. Kiel rezulto de ampleksa esplorado aperis raporto, Distributed Language Translation (=DLT) (WITKAM 1983), kiu montras, ke tia sistemo estas farebla, kaj ĝi proponas etapon konkretan de la koncepto. Kiel la nura stokolingvo ĝi proponas Esperanton, adaptitan por la celo. Tiuj modifoj ne aperas al la publiko, sed restas en la interna laborilo, ene de la komputera traduksistemo, uzata de la diversaj sistemistoj. La kaŭzo de la neceso modifi estas la fakto, ke ekzistas en Esperanto, kvankam multe malpli ol en etnaj lingvoj, vortoj kaj frazoj dubsencaj, kiujn oni devas prilabori por atingi la teknologie necesan senambiguecon. Esperanto havas multajn avantaĝojn antaŭ la etnaj lingvoj: la reguleco de vortfarado, la relative malmultaj signifoj de radikoj, la unusencaj gramatikaj finaĵoj. Esperanto modifita por la originala komputera traktado diferencis maksimume 20 procentoj de la homa Esperanto, sed post kelkaj jaroj da studado oni venis al la konkludo, ke necesas konsideri malpli multe da modifoj de la normala Esperanto por ĝin uzi kiel komputeran interlingvon.

BSO antaŭvidas investi en DLT 17 milionojn da guldenoj ĝis la jaro 1990, el kio 7,6 milionojn kontribuos la nederlanda registaro. Pluraj el la komencitaj laboroj povas utili al aliaj esperantologiaj esploroj.

10. Perspektive

La iama ĝenerala enkonduko de Esperanto en la scienco kaj en la cetera socio estas afero de kredo. Neniu povas antaŭdiri ĉu Esperanto venkos. Mi mem pozitive tion antaŭvidas, sed kredas, ke tio estas afero de generacioj, verŝajne multaj generacioj. Intertempe, per daŭra aktiva multflanka uzado de la lingvo ĝi iom post iom fariĝos klasika kaj tiel pli respektata kiel kulturlingvo. Mia motivo por kredi pri la fina venko de Esperanto estas, ke kiu ajn afero, kiu estas pli racia, justa kaj praktika ol aliaj, havas pli da ŝancoj por finfine elkonkurenci la malpli tiel kvalifikitajn aferojn. Tio ĉi ne nepre okazas de unu momento al alia, kiel montras nia kutima referenco, la malrapidega, eĉ ankoraŭ nekompleta enkonduko internacia de la metra sistemo, proponita antaŭ du jarcentoj.

Pluaj iniciatoj kiel tiuj de komputeristiko kaj telekomunikado, simile fareblaj en aliaj sciencbranĉoj, certe plirapidigas la

D-ro Eugène de Zilah:

CENT JAROJ DE FILOZOFIO KAJ SOCISCIENCOJ EN ESPERANTO

Neniu iom klera homo konfuzas filozofion kun sociaj sciencoj, eĉ se la limoj inter la patrino, la filozofio, kaj la idoj, la socisciencoj, estas iom konfuzaj kaj laŭepoke variantaj. Nur la mizero de Esperanto-eldonaĵoj ĉi-kampaj povas argumente subteni la komunan traktadon de la filozofio kun prisociaj kaj prihomaj sciencoj. Tia pritraktado povus eĉ aperi kvazaŭ marksisma amalgamemo, se ni ne strebadus ĉiam zorge gardi nin kontraŭ la miksado de metodoj.

La filozofio aperas en E-o ekde la komenco de la movado. Ni povas konsideri, ke la Fundamento entenas kelkajn filozofiajn argumentojn; sed ĉiamaniere la Zamenhofa traktaĵo, aperinta en 1900, "Esenco kaj Estonteco de la Ideo de Lingvo Internacia" estas verketo kun filozofiaj pretendoj. (Pro ĉi tio, cetere, la unua numero de la filozofia revuo "SIMPOZIO" aperis kun Zamenhof-portreto sur sia kovrilpaĝo en marto 1983). Inter la praulojn de filozofiaj tekstoj Esperantaj ni rajtas listigi la tradukaĵon fare de Boirac de la "Monadologio" de Leibniz, en 1902, kaj la tradukaĵon fare de Noël de la "Parolado pri la Metodo" de Kartezio, en 1906. La unuaj originalaĵoj estis la "Eco

NATURSCIENCOJ KAJ TEKNOLOGIOJ *(Daŭrigo)*

alproksimiĝon de la fina ĝenerala enkonduko de la Lingvo Internacia. En tiu kunligo estas esenca ĝenerala informado, eĉ propagando, en la ĝenerala esperantista publiko por kreskigi la nun minimuman intereson kaj komprenon de sciencaj aktivadoj en Esperanto. Hodiaŭ por la plimulto de la esperantistoj Esperanto ne estas pli ol hobbio, plej ofte en formo de vegetantaj lokaj klubetoj. Tiu malserioza sinteno reganta hodiaŭ ne subtenas, nek morale nek finance, la seriozajn iniciatojn, kiuj ofte suferas pro manko de la vitala financa bazo por solida kaj profesia organiziĝo.

de la logika pensado" de K. Aars (1907); la "Malgrandaj pensoj pri grandaj demandoj" de Dombrowski (1909); la "Teorio pri evolucio de la kono" de N. Kolowrat.

La unuaj tradukaĵoj ne povis havi sciencan valoron. Ili estis propagandiloj por la lingvo, sed nenia studento, nenia fakulo povintus utiligi ilin en sia laboro. Tradukinto de Kartezio eĉ fuŝis la tradukon de la ŝlosilkoncepto Kartezia "bona menso", tradukinte ĝin per "saĝo". De la ekiĝo de la Filozofia Asocio Tutmonda ni ekhavis du aŭ tri science valorajn tradukaĵojn, kiuj cetere vundas la lingvosenton de multaj filozofie malkleraj homoj. Unu el ili, ekzemple, komparas la tekston de mia esperantigo de la "Diskurso pri la Metodo", la fama verko de Kartezio, kun albanlingva traduko, kaj preferas la albanajaĵon, ĉar li pli bone komprenas kaj pli facile legas ĝin, pro la fakto, ke mia esperantigo estas "tro proksima al la originalo". Ĉi tiu fideleco al la originalo estas cetere la plej grava problemo en la esperantigado de filozofiaj verkoj. Jam en literatura tradukado estas konata la ŝerco, ke tradukoj estas kiel virinoj: aŭ ili estas fidelaj kaj malbelaj, aŭ ili estas belaj, kaj pro tio, malfidelaj. Se tiel, la kompatinda filozofo devas kontentiĝi pri malbelaĵoj, ĉar ne absolute fidela traduko, en filozofio, estas senvalora kaj fake neuzebla. La fideleco de la tradukitaj tekstoj estas multe pli grava en filozofio ol en natursciencoj.

En filozofio ia koncepto estas la nuna stato de ia vivanta aĵo, kiu komencis kreski antaŭ minimume tri mil jaroj. Komprenu! La koncepto ekzemple de "libero" komencis kreski, kiam la homoj je la unua fojo devis fari diferencon inter samtribanoj kaj kaptitoj, sklavo. Do en ĉiuj hindeŭropaj lingvoj, do etimologie ankaŭ en Esperanto, la radiko "liber-" elvenas el la hindeŭropa "*leudheros" (aŭ *swobhodhyos), kiu signifas "apartenanta al grupo, membro de tribo, ktp", do nek kaptito, nek sklavo. Libera homo estas tiu, kiu estas membro de la tribo, de la grupo. La sama senco de la evoluonta koncepto "libero" estas do "aparteneco al sia grupo". Sed ĉi tio estas nur komenco. La koncepto kreskos, kiel kreskas arbo, kiel kreskas besto. Aldoniĝos novaj ideoj: liberulo rajtas posedi aĵojn, havi armilojn, partopreni en politikaj decidoj, submetiĝi al specifaj devoj, esti juĝisto en konfliktoj inter aliaj liberuloj kaj fine esti juĝisto en konfliktoj inter siaj propraj sentoj kaj volo. Ĉiu nova ŝtupo de la disvolviĝo de koncepto organike interdependas kun la antaŭaj, el kiuj kelkaj cetere povas malaperi. Se mi volas scii kio estas libero, mi devas priskribi la tutan koncepto-kreskaĵon. Por havi en mia kapo filozofian koncepton, mia penso devas ontogeneze trairi la avatarojn de la intelekta evoluo de la

koncepto, kvazaŭ feto trairas la statojn de fiŝo kaj simio, por alveni al la adulta koncepto de mia civilizo. Por tion fari mi ne povas malhavi la ellegon de la verkoj de la plej famaj filozofoj, kiuj estas la intelektaj etapoj de mia civilizo. Estas dudeko da tiaj pensuloj, sed mi reduktas niajn bezonojn al nur 14, ĉi tie.

Ni do vidas, ke se mi ne havas fidelan priskribon de la koncepto en unu el siaj avataroj, do se mi ne havas fidelan tradukon de la verko de necesa filozofo, mia konceptigo montriĝos, skemiĝos, konfuze erariĝos kaj fariĝos malinda je mia civilizacia nivelo. Estas homoj, kiuj ne leginte la filozofojn, konceptadas kiel homoj antaŭ tri jarmiloj, aliaj kiel Neandertalanoj. En naturscienco oni perkoncepte pensadas, en filozofio oni konstruadas la konceptojn. Tio sekvigas, ke oni ne povas instrui filozofion, se oni ne disponas pri la bazaj filozofiaj tekstoj. En filozofio oni nepre devas havi la klasikajn tekstojn por kompreni la modernajn. Ne tiel estas en natursciencoj, kie la plej moderna elmetaĵo de la konoj anstataŭas kaj forviŝas la antaŭajn. La homsciencaj tekstoj havas karakteron interecaj, inter filozofio kaj natursciencoj.

Laŭmetode elmetiĝis la demando: kiuj estas homsciencoj, ĉar laŭnature, kompreneble, ĉiuj sciencoj estas homaj. Por nia laboro ni utiligis negativan difinon. Ni konsideris kiel homscienco ĉiujn studkampojn elvenintajn el la filozofio, kiuj ne estas eksperimentaj kun matematika sistemigo kaj kiuj ellaboriĝas dialektike, aŭ almenaŭ tra redaktitaj tekstoj. Multe da studkampoj tiaj ne meritas la nomon scienco, ekzemple tiuj, kiujn ni nomis "literaturo pripensa", aŭ "saĝumadoj".

Ni provis retrovi ĉiujn tiajn tekstojn publikigitajn de la komenco de Esperanto. Helpis nin la baza verko "Esperanto en Perspektivo", la katalogoj de libroservoj nunaj kaj jam malaperintaj, la recenzoj aperintaj en Esperanto-revuoj. La plej grandan parton de ĉi tiu materialo ni trovis en la "ESPERANTO-MUZEO DE SAN PAU D'ORDAL", en Katalunio, kie ni kvarope laboris dum unu semajno kun la sindediĉa helpo de s-ro Hernandez-Yzal, kiun ĉi tie ni varme kaj admire dankas. Jen kion ni trovis kaj kion oni povas konsideri kiel la Esperanto-produktaĵo surkampe de filozofio kaj homsciencoj:

Entute ni trovis 668 titolojn rilatantajn al 51782 paĝoj, el kiuj 330 librojn (pli ol 49 paĝajn) enhavantajn 46012 paĝojn.

443 aŭtoroj verkis ĉi tiujn tekstojn. Estas 217 aŭtoroj, kiuj verkis librojn.

Laŭteme la tekstaro estas el 32 rubrikoj:

rubriko	studkampo	paĝoj	%
ANTR	Antropologio kultura (7)	552	1,06
ARKE	Arkeologio	60	0,12
ARTH	Arthistorio	1118	2,14
EKOG	Prigeografia ekonomiologio	3	0
EKON	Ekonomiko, ekonomiologio	361	0,69
EKOP	Pripolitika ekonomiologio	49	0,09
ETNO	Etnologio	402	0,77
FILE	Filozofio priarta, estetiko	6	0,01
FILK	Filozofio prikultura	236	0,45
FILO	Filozofio	3749	7,19
FILP	Filozofio pripolitika	2175	4,17
FILR	Filozofio prireligia	125	0,24
FILS	Filozofio priscienca	230	0,44
	(subtotalo)	<u>6521</u>	<u>12,5</u>
HISK	Historio prikultura	1029	1,97
HISP	Historio pripolitika	980	1,88
HISR	Historio prireligia	118	0,23
HIST	Historio	4982	9,55
	(subtotalo)	<u>7109</u>	<u>13,6</u>
MOVA	Primovadaj skribaĵoj	1294	2,48
MOVF	Primovada filozofio	280	0,54
MOVP	Movada politiko	249	0,48
ORIE	Orientalismo	661	1,27
PEDA	Pedagogio	292	0,56
POLI	Politiko, propagando	<u>13190</u>	<u>25,3</u>
PSIK	Psikologio	1071	2,05
PSIS	Psikologio prisocia	424	0,81
SOCI	Sociologio	461	0,88
SOCP	Sociologio pripolitika	982	1,88
SPIR	Spiritismo	2329	4,47
MIST	Mistikismo	7431	14,25
RELI	Religio	3009	5,77
MORA	Moralismaj skribaĵoj	1305	2,5
LITP	Literaturo pripensa, saĝumadoj	2998	5,75
	(subtotalo)	<u>17072</u>	<u>33,14</u>

Do, ne estas kiel multaj el vi opiniis. La ĉefa produktaĵo de Esperanto, almenaŭ se oni konsideras la jarcentan totalon, ne estas la propagandaj eldonaĵoj de totalismaj landoj (ili grandparte ekzistas nur de la 60aj jaroj), sed la mistikisma-moralisma "kaĉo". Kune la propagandaĵoj kaj la mistikaĵoj estas pli ol la duono de nia tuta filozofia kaj homscienca literaturo. La trian kaj kvaran lokon okupas la filozofio kaj la historio, kun verkoj kies valoron estus tro malfacile analizi ĉi tie.

Ĉi tie elmetiĝas la demando: per kia precizeco ni faris nian enketon? Bedaŭrinde ĉi tiu ne estas tre grava demando ĉi tie, ĉar eĉ se nia eraro estus je 50%, ĝi ne ŝanĝus la proporcion inter la rubrikoj, kaj, atentante la absolutajn ciferojn, komparante al tio, kio ekzistas en ajna kulturlingvo, la duono de nulo, samkiel la duoblo de nulo, estas nulo. Mi volas diri, ke la tuto havebla sur nia kampo en Esperanto dum cent jaroj estas neglektinda kompare al tio, kio ekzistas en nur unu jaro en kulturlingvo. Pensu, ke aperadas en Francio, nur sur la kampo de filozofio, pli ol 6000 titoloj jare! Por bone mezuri niajn mankojn ni provu vidi, kio estas nemalhavebla por la instruado unuaŝtupa, tia, kian donas la du tri unuaj jaroj de diversaj universitatoj, aŭ la tiel nomata filozofia klaso de francaj liceoj, en filozofio, en psikologio kaj en sociologio.

En filozofio ni prenu elementan referlibron, en kiu oni priskribas la konendajn aŭtorojn kaj verkojn klasikajn: la "Histoire de la Philosophie" de Brehier¹⁾. Ĉi tiu verko mencias pli ol 2000 aŭtorojn, sed detale priskribas nur 195. El ili nur 12 estas konataj en Esperanto, tio estas 6,15%. Sed ni ne rajtas konkludi el ĉi ĉio, ke 6% de la nepra filozofia literaturo ekzistas en nia lingvo, ĉar nur neglektinda parto de la verkoj de ĉi tiuj aŭtoroj estas tradukita. Ni pristudu iomete la situacion de 14 nepraj filozofoj kaj pensuloj en Esperanto. Mi nomas ilin "nepraj", ĉar mi neniam konis eĉ malaltnivelan universitaton, kie koni ilin ne estas postulate. Ni vidu el kiom da paĝoj konsistas la parto enda de ilia verkaro, kaj ni vidu kiom el ĉi tiuj paĝoj ekzistas en Esperanto.

Nu, se ni havas 2,45% el la verkoj de 6,15% el la nepraj aŭtoroj, tio signifas, ke ni povas fieri pri la ekzisto en Esperanto de 0,15% de tio, kio nepras por la plej elementa filozofia laboro. Tia laboro do ankoraŭ ne eblas nur en Esperanto. Ĉi tio signifas, ke internacilingva filozofo por labori devas almenaŭ

aŭtoroj	paĝoj	en Esperanto	%
PLATONO	2600	220	8,3
ARISTOTELO	3000	0	0
PLOTINO	1200	0	0
AUGUSTENO	3500	0	0
TOMASO	2700	0	0
KARTEZIO	1400	44	3,11
SPINOZO	1300	43	3,3
LEIBNIZ	700	41	5,9
KANT	4100	88	2,12
HEGEL	7000	0	0
NIETZSCHE	6000	366	6,1
ROUSSEAU	1000	0	0
MARX-ENGELS	7000	229	3,3
FREUD	3000	59	2
<u>totaloj</u>	<u>44500</u>	<u>1090</u>	<u>2,45%</u>

lege scipovi almenaŭ unu el la grandaj filozofiaj lingvoj modernaj: la germanan, la francan, la italan aŭ la anglan. (Mi ne parolas pri la evidenta lernejtipa kono de la helena kaj latina, kies neceson eĉ komplete tradukita filozofia biblioteko ne forigus).

Surkampe de la sociologio la situacio ne estas pli brila. Ni prenu la plej elementan manlibron pri sociologio, la libron de Mendras: "Eléments de Sociologie"²⁾. Ĝi entenas la priskribon de la verkaro de 228 sociologie gravaj aŭtoroj. Nur de 3 el ili (4,82%) ni havas ion en Esperanto kaj la tradukita parto de iliaj verkoj ŝajnas eĉ malpli granda ol en filozofio.

La psikologio ne estas pli ŝatata ĉe ni. Mi elektis kiel komparilon la manlibron por studentoj en medicino, ĉar ĝi estas la malplej postulema, la libron de Delay: "Abrégé de Psychologie"³⁾. Ĝi raportas pri 53 gravaj aŭtoroj en psikologio. Nur tri el ili (5,66%) estas sur miaj listoj, kaj la tradukita parto de ilia verkaro estas neglektinda.

Ne valoras elmeti rezultojn eĉ malpli bonajn desur aliaj studkampoj; ni devas kuraĝe aliri niajn konkludojn.

La germana filozofo Oswald Spengler antaŭdiris, ke la dua parto de la 20a jarcento estos en Okcidento tiu de konfuzaj, moralismaj ideologioj. Esperantismo, iasence, estas parto de ĉi tiuj ideologioj, kiuj naskiĝas dum dekadenta erao. Ne estas do

mirige, ke pli ol duono de nia pli-malpli filozofia aŭ homscienca prozo fontu el tiaj ideologioj. Tiun, kiu konas la situacion realan de la Esperanto-movado, ankaŭ ne mirigas la grandiganta parto de la pure politika, ĝenerale sovetiisma propaganda prozo. Multe pli mirigas la tamena ekzisto de kelkaj valoraj verkoj kaj eldonaĵoj, iniciativoj de kuraĝaj unuopuloj, ne kun la helpo, sed malgraŭ la aktivaj aŭ pasivaj malhelpoj de oficialaj Esperanto-organizaĵoj. Se en filozofio la horizonto estas iom pli hela, ol en homsciencaj, ni ŝuldas tion al Filozofia Asocio Tutmonda, fondita antaŭ 4 jaroj, kaj de tiam tre aktiva per sia revuo "Simpozio" kaj siaj eldonaĵoj de tradukoj kaj de originalaj filozofiaj verkoj. La foresto de fakaj asocioj por la ceteraj homsciencoj grave bremsas la progresojn. Pro tio ni ĝoje salutis la ĵusan fondiĝon de faka asocio de historiistoj. Neprus tiaj asocioj por sociologoj, psikologoj, etnologoj kaj aliaj.

La perspektivoj estas grizaj. La esperantistaro ankoraŭ ne komprenis, ke Esperanto fariĝos kulturlingvo nur tiam, kiam ni havos filozofian kaj homsciencan rektajn laborojn komparindajn al tiuj de kulturlingvoj, kiuj permesus al internacia elitaro elekti Esperanton kiel sian kulturlingvon. Sur la kampo de natursciencoj ni estas provizore venkitaj de grandaj etnolingvoj, sed surkampe de filozofio kaj de homsciencoj, kie la nuanca, precizega, dialektika kompren- kaj parolkapablo nepras al la intelektularo, ni povas ankoraŭ sukcesi. Sufiĉus, ke estu subteno de esperantistoj kaj malapero de la politikokiala malhelpo de Esperanto-organizaĵoj pere de malkompetentaj recenzoj, rektaj alhomaj kalumnioj aŭ organizita silentado. Eĉ se filozofio aŭ homsciencoj ne interesas vin, vi devus subteni la eldonagadojn, konferencarojn, lekciarojn per via mono kaj ĉeestado, ĉar mi certas, ke sur ĉi tiuj kampoj ni povas sukcesi, kiel ni sukcesis en literaturo, kaj sur ĉi tiuj kampoj ni povas alporti al la movado la gradajn atingaĵojn de la dua jarcento de Esperanto.

Piednotoj

- 1) Emile Brehier: Histoire de la Philosophie, 4 vol (704p. 1059p. 184p. 324p.) 1a eld. 1938/ Paris/PUF/1963.
- 2) Henri Mendras: Eléments de Sociologie. Paris/A. Colin/coll.U./1967, 252p.
- 3) Jean Delay et Pierre Pichot: Abrégé de Psychologie. Paris/Masson/ 1964/489p.

Mag. Herbert Mayer:

ELDONEJOJ, KULTURAJ CENTROJ, BIBLIOTEKOJ

Esperanto estas la unua planlingvo, kiu festas la centjariĝon de sia ekzisto en plena vivo kaj evoluo. Ĝi fariĝis medio de internacia kulturo kaj de arta aspiro. Tio en si mem estas unika en la historio de la homaro.

Aliflanke ni ne forgesu, ke Esperanto ankoraŭ ne atingis sian bazan celon: fariĝi la dua lingvo por ĉiuj. Malgraŭ la partaj sukcesoj de la unua jarcento ni devas konstati kun bedaŭro, ke en la nuna historia momento Esperanto havas nenian ŝancon esti ĝenerale akceptata. La respondo al la demando, kial do ni dediĉas grandan parton de niaj energio kaj tempo al tiu lingvo, kvankam ĝia fina celo verŝajne ne realiĝos dum nia vivo, ne povas koncerni nur ian utopian idealismon: Ĉar Esperanto en la nuna fazo de ĝia evoluo kaj en la nuna grado de disvastiĝo ofertas ion al ni, kion aliaj lingvoj ne kapablas doni: duan, ne nacie ligitan kulturen identecon, kiu neniam eniras en konflikton kun nia baza, t.e. etna aŭ nacia identeco.

Ni ne subtakso la kulturen faktoron por la konstituo de la Esperanto-parola-lingvo-komunumo kaj por ĝia pluekzisto. En tiu senco ne nur la kvanto de la esperantistoj, sed - en pli alta grado - ilia kultura kvalito determinas la valoron de Esperanto por ni mem kaj por la cetera mondo.

Oni povas konstati strangan fenomenon: Esperantistoj, kiuj montras sin tre kleraj koncerne al sia nacia kulturo, restas sur la tereno de Esperanto preskaŭaj senalfabetuloj malsciante la bazajn faktojn de ĝia historio kaj ĝiaj kulturaj atingoj. Multaj komencas en sia por-Esperanta laboro sur la nivelo nula, kvazaŭ ili estus pioniroj kaj kvazaŭ nenio valoro ekzistus antaŭ ili: Eble tial nia afero baraktas surloke kaj ne sukcesas antaŭeniri tiom, kiom ĝi povus. Kaj tio okazas pro manko de scio - aŭ se vi preferas - pro manko de kulturo.

La valoroj kaj atingoj - kiujn ni ĝenerale nomas kulturo - ne naskiĝas senpere kvazaŭ io mistera, sed bezonas konkretajn antaŭ-kondiĉojn por sia ekzisto. Tia antaŭ-kondiĉo estas funkciantaj informaj retoj.

Ĉiu socio kreas siajn proprajn informajn retojn, kiuj sia-vice havas altan influon sur la internan organizon de la socio. Ili estas politike, kulture kaj science decidaj.

Se ni rigardas la historion de Esperanto, ni konstatas, ke progresoj efektiviĝas nur en kunligo kun medioj kaj aktivecoj, kiuj distribuas informojn kaj sciojn: t.e. eldonejoj, revuoj, bibliotekoj kaj kulturaj centroj.

La iniciata impulso de ĉio fariĝis per la eldono de la unua Esperanto-libro antaŭ cent jaroj ĉe la Varsovia eldonejo Kelter, kie aperis ankaŭ la "La neĝa blovado" de Puŝkin kaj "La gefratoj" de Goethe en la traduko de Antoni Grabowski - ambaŭ estas verkoj, en kiuj jam sin anoncis la literaturaj ebloj kaj kvalitoj de nia lingvo.

En la sekvantaj jardekoj en multaj landoj kreiĝis eldonejoj kun specifaj aktivecoj, kiuj postlasis al ni kulturalan fundamenton, sur kiu la hodiaŭa generacio povas plukonstrui. En la eminenta libro "Esperanto en Perspektivo", al kiu ĉefredaktoris prof. Ivo Lapenna, vi trovas la nomojn de tiuj entreprenoj. Permesu tamen, ke mi malmultajn el ili nomu pro ilia speciala graveco.

Dum la vivo de Zamenhof pleje gravis la firmao Hachette en Parizo, kiu konsekvence aperigis en formo de serioj la kompletan gamon de la verkoj de Zamenhof, liajn tradukojn kaj aron da lernolibroj. Nur la profesieco de tiu eldona laboro ebligis al pluraj generacioj de Esperantistoj la aliron al la verkaro de la iniciatinto de Esperanto.

La plurisma karaktero de la Esperanto-parola komunumo, la diversiĝo de ĝia socia realeco esprimiĝis i.a. en laborista Esperanto-movado, kiu havis siajn komunikajn forumojn en la eldona laboro de SAT kaj de EKRELO. Ambaŭ produktis vastan paletron de ideologia literaturo, inkluzive de sciencaj studoj kaj altkvalita beletro. Ni nepre menciui kiel ekzemplon la romanon "La metropoliten" de Vladimir VARANKIN, kiu aperis en 1933 ĉe EKRELO estante verko kun dokumenteca valoro pri la intermilila periodo kaj kun intereso, kiu ampleksas pli ol la Esperantan mondon.

En kiu alta maniero eldonista laboro povas krei kaj formi kulturalan atmosferon, montras la aktiveco de Literatura Mondo en Budapeŝto, kies unua animiganto estis Vilmos Bleier kaj kiu kapablis arigi ĉirkaŭ si talentojn determinantajn la vojon de nia literaturo dum kelkaj jardekoj. Kaj ne nur de la literaturo, sed ankaŭ de la lingva evoluo.

Per la kontinueco kaj konsekvenco en sia agado Literatura

Mondo formis al si publikon kleran, kiu per sia intereso garantiis pluan kreskon de la literatura produktado.

La katastrofo de la dua mondmilito kaj la sekvaj malfacilaĵoj de ŝtalinismo interrompis la aktivecon de Literatura Mondo. Estas tamen kontentige, ke Hungara Esperanto-Asocio en la lastaj jaroj per sia riĉa eldona programo iasence reprenas la malnovan tradicion.

Pardonu, ke pro la multnombreco estas neeble menciĝi ĉiujn eldonejojn, kiuj post la dua mondmilito ludis aŭ ludas rolon por la kulturo de Esperanto. Preferindas konstati ion ĝeneralan pri la hodiaŭa situacio.

En 1979 Vilmos Benczik skribis en sia artikolo "La Esperanta Literaturo antaŭ la centjariĝo" la jenon:

"Nia kulturo konkeris por si certan stabilan legantaron, tamen, tiu legantaro estas ne pli ol 500 homoj. Kompreneble ne tiom da personoj legas Esperantajn verkojn, sed certe ne troviĝas pli da homoj, kiuj laŭ naciaj normoj estas nomeblaj 'informataj legantoj'. Tiu malalta cifero ege malhelpas la disvolviĝon de la libro-eldonado, malebligas pagadon al la verkistoj, kaj finfine bremsas ankaŭ la kvalitan progreson de la literaturo."

Eĉ se kelkajn jarojn post tiu aserto ni rajtas iom pli optimisme taksii la situacion kaj supozi, ke la nombro de informataj legantoj altiĝis je kelkaj centoj pliaj, la baza problemo restas: La kvalitat-hava Esperanto-publiko ankoraŭ tro malgrandas, por ke ekzistu daŭra kaj kontinua evoluo. La eldonejoj Esperantaj ĉiam finance baraktas, vivas ofte nur per la idealismo de unuopaj personoj, kiel siatempe Stafeto per la sindediĉo de Régulo Pérez.

Plian problemon, kiu estas same en konekso kun la tro malalta nombro de legantoj, rezultigas la fakto, ke bazaj verkoj de nia historio, beletro kaj filozofio post elĉerpiĝo restas neaĉeteblaj dum jardekoj: Novaj generacioj nur malfacile kaj pene povas aliri la trezorojn de nia kulturo. La konsekvencojn vi konas.

Por Esperanto multaj kondiĉoj estas pli severaj ol por naciaj lingvoj. La naciaj lingvoj havas ĝenerale sian klerigan sistemon, kiu integriĝas la individuon en la komunumon kaj transdonas al ĉiu minimuman scion pri bazaj faktoj. Ekzemple ne ekzistas germanparolanto, kiu ne konas la nomon de Goethe kaj legis kelkajn versojn liajn. Plurgrada lerneja sistemo, altlernejoj kaj universitatoj, kulturaj institucioj, teatro, radio kaj televido

garantias lingve la aplikon kaj adaptiĝon al vasta gamo de esprim-bezonoj.

Ekzameni la situacion sur la Esperanta tereno: La esperantistaro estas diaspora lingvo-komunumo, kiu nur parte kaj ne-sufiĉe havas tiajn mediojn kaj instituciojn.

Ŝajnas tamen, ke la situacio pli-boniĝas. Jam en 1952 fondiĝis la Centro de Esploro kaj Dokumentado (CED) fare de prof. Ivo Lapenna. Ĝi estas institucio de UEA kaj okupiĝas pri faktoj kaj studoj de la internacia komunikado. Aro da publikaĵoj estas la rezulto de ties konstanta laboro.

Pliajn esperojn donas la estiĝo de la Internacia Scienca Akademio Comenius, kies celo estas la praktikado de Esperanto en sciencoj, kaj la fondo de la Akademio Internacia de la Sciencoj San Marino, kie Esperanto estas unu el la oficialaj lingvoj. Plie menciindas, ke Esperanto kaj esperantologio estas regule instruataj en diverslandaj universitatoj.

Sur alia nivelo - iom pli suba, sed despli larĝa - troviĝas institucioj, kiuj kompareblas kun elementaj kaj gimnaziaj lernejoj. Plej aktivaj nuntempe estas Grésillon, Literatura Foiro kun siaj aranĝoj, la Internacia Kultura Servo Zagreb kaj Kultura Centro Esperantista en La Chaux-de-Fonds, kiu jam estas dinanisma faktoro en la kultura evoluo de Esperanto. Miloj da personoj lernis en La Chaux-de-Fonds ne nur Esperanton, sed intimiĝis ankaŭ kun ĝia spirita tradicio, studis elementajn sciojn de sciencaj fakoj kaj spertis la atmosferon de entrepreno, kie Esperanto estas la ĉiu-tage parolata lingvo.

Speciale la ekzemplo de Kultura Centro Esperantista montras al ni, ke kultura aktiveco ne povas okazi sen la necesa instrumento: bone ekipita Esperanto-biblioteko, kiu instaliĝis en la urba biblioteko de La Chaux-de-Fonds sub la nomo CDELI (Centro de Dokumentado kaj Esplorado pri la Lingvo Internacia).

Bibliotekoj estas la grundo, sur kiu povas kreski kultura tradicio. Preskaŭ ĉiu lingvo-komunumo havas siajn naciajn bibliotekojn, kie kolektiĝas ĉio aperinta en la koncerna lingvo. Tio fakte formas komunan memoron kaj bonan instrumenton por socia, kultura kaj scienca progresoj. Similan rolon ludas la Esperanto-bibliotekoj, inter kiuj la Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno, la biblioteko de UEA, la biblioteko de la Brita Esperanto-Asocio kaj CDELI en La Chaux-de-Fonds (Svisio) estas la plej gravaj.

Konsideru la jenon: Averaĝa samideano ne konscias pri la fakto, ke nia lingvo postlamas certajn evoluojn en giganta dimensio por ni esperantistoj angoriga kaj preskaŭ nesuperebla. Ekzistas internaciaj informretoj specialaj, aliĝintaj al komputilaj datumaj centroj, kiuj kolektas ĉiujn sciencajn kaj kulturajn novaĵojn - en la angla lingvo. Oni facile povas aliri tiujn informojn: ili prezentigas en skribita formo kaj krome estas konsulteblaj tra ĉiu iom grava biblioteko. Tiuj informretoj ludas hodiaŭ gravegan rolon - scienca esploro sen ili ne plu eblas. La konsekvenco: la lingvo de la scienco estas hodiaŭ preskaŭ senkontesteble la angla. Pli kaj pli da sciencistoj rekte skribas en la angla por havi plej vastan publikon. Mi bone scias, ke mi tuŝas per tio esperantistajn tabuojn, sed jen la faktoj! Ni ne estu ĉi-rilate naivaj kaj ni bone konsideru la sufiĉe komplikajn mekanismojn de interretaj lingvorilatoj.

Kio farendas? Kontraŭstaro kontraŭ tiu evoluo estus senrezulta, ĝi nur ridindigus nin. La unusola ŝanco por ni estas partopreno: ankaŭ ni esperantistoj dokumentu la verkojn de nia kulturo, kiuj fariĝu alireblaj en la nuno kaj en la estonteco en formo de bibliografio.

Oni foje komparis la Esperanto-bibliografion al mara serpento: Ĝi aperas kaj malaperas, poste ree aperas, malaperas ... Tiuj malaperoj estas rompoj en nia kultura tradicio. Fakuloj de esperantologio scias, kiom malfacile estas kolekti ĉiujn necesajn dokumentojn por esploro de certa temo. Pri kelkaj dokumentoj oni nur ekscias post longa serĉado. Tial informoj perdiĝas kaj ne eniras nian komunan scion. Bona bibliografio regule aperanta decide plibonigus la situacion.

Konsciante, ke tia bibliografio havus pli firman ekziston, se ĝi starus sur pluraj piedoj, la Internacia Esperanto-Muzeo en Wien-Vieno (IEMW) kaj la Centro de Dokumentado kaj Esploro de la Lingvo Internacia (CDELI) eniris intertraktadon por komuna eldono de Esperanto-bibliografio. La intertraktado ankoraŭ daŭras kaj la rezulto dependos de la sinteno de kelkaj svisaj kaj aŭstraj instancoj.

CDELI kaj IEMW estas bibliotekoj kun samaj taskoj kaj samaj celoj. Estiĝas inter ili konkurenca situacio. Sed tio ne kreis militon, sed klopodon de kunlaboro por atingi la komunan celon.

La taskoj en Esperantujo tiom grandas, ke ilia solvo dependas de la forto de nia kunlaboro.

SERIO ORIGINALA LITERATURO KLASIKA

Borovko, Nikolaj A.: En la tombo. Rakonto originala el la jaro 1892. Kun studo de H. Mayer. Vieno: Pro Esperanto 1988. 36,-S.

(Literatura evento en la tempo, kiam Esperanto estis nur 5-jara: La rakonto priskribas la agonion de viva entombigito.)

Levenzon, Lev: La kapo de l' Gorgono. Originalaj dramoj kaj poemoj. 1912-1916. Editoris, pristudis kaj komentis H. Mayer. Vieno: IEMW 1988. 126,-S.

(Tiu eldonaĵo prezentas por la unua fojo la originalan verkaron de grava aŭtoro el la frua periodo de Esperanto.)

Payson, Eduard S.: La fantoma edzino. Vieno. Pro Esperanto 1988. 20 paĝoj. 33,-S.

(Stranga okazaĵo en Usona montaro. Lingve klasika. Unua eldono: ĉirkaŭ 1930 en la Dek-Centa Serio.)

Privat, Edmond: Tra l'silento. Kun ampleksa studo de Ed Borsboom. (Aperos en Januaro 1989.)

Waśniewski, Józef: En la brikejo. Rakonto originala el la jaro 1896. Kun studo de H. Mayer. Vieno: Pro Esperanto 1988. (Aperos vintre 1988/89.)

(Waśniewski estas grava persono en la unuaj jaroj de Esperanto - movade kaj kulture. 'En la brikejo' estis mejloŝtono en la evoluo de la originala prozo. La akompana studo malkovras novajn detalojn pri la finredakto de la teksto. Kun lingva komentario.)


Perkoresponda kurso de KCE:

La originala Esperanto-Literaturo. Parto I: La bazaj literaturaj ĝenroj. Mendu ĉe "Pro Esperanto" provlecionon je 30,-S.

TOMBOŜTONO POR IVO LAPENNA

Jam tuj post la funebro de Ivo Lapenna rondo ĉirkaŭ Günther Becker, Germanio, iniciatis monkollektadon inter geamikoj por povi digne honorigi al Prof. D-ro Ivo Lapenna per bela tomboŝtono kun nomo, dankesprimoj kaj reliefa portreto. Ĝi estu inda memoro al li kaj samtempe nova monumento por Esperanto.

Kompreneble tiu iniciato estis kun danko akceptita de lia edzino Birthe Lapenna kaj la cetera familio. Kolektiĝis ĝis nun konsiderinda sumo, kiu kovras ĉ. la duonon de la kostoj. Ni trovis belegan naturŝtonon granitan kaj atendas, ke ĝi en la nuna jaro lokiĝos sur lia tombo en la ĉarma preĝejo ĝardeno, Rødovrevej 116, Rødovre (Antaŭurbo de Kopenhago).



Jean Thierry:

Sekretario de la Akademio
de Esperanto

CENT JAROJ DE ESPERANTO EN SERVO DE KULTURAJ INTERŜANĜOJ, PRAKTIKAJ CELOJ KAJ INTERNACIA SOLIDARECO

Ĉiu esperantisto ja scias, ke la unua konversacio en Esperanto okazis inter du poetoj: la kuracisto d-ro L.L. Zamenhof kaj la inĝeniero Antoni Grabowski. Sed ne ĉiuj konscias, ke kulturaj interŝanĝoj povas jam efektiviĝi, tuj kiam almenaŭ du homoj komuniĝas inter si per unu sama lingvo. La interŝanĝo povas efektiviĝi nur laŭgrade, kiam ĝi intervenas inter homoj de sama nacieco aŭ sama socia grupo; ĝi efektiviĝas eĉ laŭspece, kiam la homoj estas de malsama nacieco aŭ malsama civilizacio. La interŝanĝo pli riĉigas unu kaj la alian, kaj tio montras, ke lingvo per si mem ne povas esti dirita kultura aŭ nekultura: ĝi fariĝas pli malpli kultura laŭ tio, kiom da kulturaj valoroj la homoj uzantaj ĝin kapablas kvazaŭ "enkarnigi" en ĝin. Kiel kantas ĝuste la poeto Antoni Grabowski en sia poemo "La Tagiĝo",

"La lingvo benata montriĝis al ni
Mirinda donaco ĉiela:
Per amo al hejmo, patrujo, naci',
Ni flamas en koro fidela.
Kaj same fidelaj al hejma altar'
Ni sentas nin filoj de 'tuta homar'."

Nu de post tiu unua konversacio kiom da interŝanĝoj, kiom da renkontiĝoj okazis per Esperanto tra la mondo kaj la multaj

jardekoj de ĉi tiu unua jarcento, kiun ni celebras hodiaŭ! Kompreneble por memori kelkajn faktojn estu permesite al mi inspiro el tiu fundamenta enciklopedio pri agoj kaj faroj en Esperanto, kies titolo estas "ESPERANTO EN PERSPEKTIVO".

Kulturaj interŝanĝoj kaj praktikaj celoj subtenas unuj la aliajn kaj estigas tiun internacian solidarecon, kiun d-ro L.L. Zamenhof nomis "interna ideo", tiun humanecan internaciismon, kiun d-ro L.L. Zamenhof difinis "frateco kaj justeco inter ĉiuj popoloj", la ideon, kiu "akompanadis Esperanton de la unua momento de ĝia naskiĝo ĝis la nuna tempo", kiel li mem emfazis en parolado dum la Universala Kongreso en Ĝenevo 1906.

*
* *

Jes, sur pure kultura kampo neniam pli multaj ol en ĉi tiu pasinta jarcento estis la personaj kontaktoj; jam la privataj kontaktoj pere de Esperanto estas per si mem nenombrelaj, sed eĉ pri la publikaj kaj organizitaj estas nepre necese limigi sin per mencio de la plej elstaraj el la konkursoj, prezentaĵoj, festivaloj, seminarioj, vojaĝoj kaj aliaj aranĝoj, se ne paroli pri konstanta ekspozicio kiel ĉi tiu de la Muzeo en Vieno.

Unu el la plej malnovaj manifestiĝoj estas sendube la BELARTAJ KONKURSOJ. Ilin iniciatis ekde la 5-a Universala Kongreso en Barcelono prof. Delfi Dalmau, tiel revivigante sub la tradicia nomo "Floraj Ludoj" la mezepokajn konkursojn de la trobaroj, kiuj en okcitana lingvo priantis la kortezan amon. Inter la gajnintoj estis Marie Henkel el Dresdeno kaj Edmond Privat el Ĝenevo.

En la Universala Kongreso de Bournemouth (1949) propono de Reto Rossetti revigligis la konkurson, kiu sub la plumo de prof. d-ro Ivo Lapenna reorganiziĝis per la "Regularo de la Belartaj Konkursoj de UEA". De 1950 ĝis 1972 estis prezentitaj preskaŭ 2000 konkursaĵoj, premiitaj 100 el 26 landoj; kaj plej multajn premiojn ricevis Marjorie Boulton (entute 21).

Ne malpli gravaj estas la ORATORAJ KONKURSOJ. D-ro L.L. Zamenhof mem eldiris la unuajn paroladojn, sed tiuj ĉi estis precipe antaŭe aranĝitaj, komplete skribe verkitaj. Nur kun Edmond Privat komenciĝis la vera parolarto en Esperanto kapabla improvize emocii kaj entuziasmiĝi sian aŭskultantaron; kaj jam en Krakovo dum la 13-a Universala Kongreso de 1931 la konkurson partoprenis ok kandidatoj.

Tamen ĉar la provo de konkurso en Bournemouth en 1949 donis neniel kontentigan rezulton, prof. D-ro Ivo Lapenna projektis por la Universala Kongreso de Parizo en 1950 "Regularon por la

Oratora Konkurso por la Junularo". Pritraktitaj estis plej diversaj temoj, kies ĉefaj substrekis la solidarigan rolon de komuna lingvo, ekzemple: Mondpaco kaj Esperanto - La idea signifo de Esperanto - Kial mi batalas por Esperanto - La rolo de la internacia lingvo por la spirita unueco de la homaro - ktp. Por diskonigi la laŭreatojn speciala arĝenta pokalo estis donacita de la plej konata oratoro en Esperanto kiel Demosteno en la helena lingvo kaj Cicerono en la latina, la pokalo "IVO LAPENNA" sur kiu la unua engravurita nomo estas tiu de Carlo Minnaja (unua premio en 1960). Inter la gajnintoj de la Oratora Konkurso estis ankaŭ konataj A. Albault, la fratoj Minnaja, H. Tonkin, J. Wells, F. Simonnet, Svetomir Budimir, H.M. Maitzen, D. Charters... Ja nemalhaveblan rolon havas tiuj konkursoj: la malkovron kaj subtenon de novaj elstaraj talentoj inter la gejunuloj.

Tria grava kampo estas tiu de TEATRO, des pli grava, ke ĝia origino estas religia kaj ĝia efiko tuŝas la koron de la homa specio! Teatra prezentaĵo estas unika okazo por socia grupo komun-iĝi en saman penson kaj ĉefe saman senton. Kio klarigas, kial ĉi tiu kampo estis malpli sukcesa ol la du antaŭaj.

Ja, ekde la 27-a de septembro 1896 en Smolensk junaj amatoraj geaktoroj provis ludi la komedion de L. Tolstoj "Unua Brandfaristo" laŭ traduko de V. Burenkov. Multaj aliaj verŝajne provis same. Kiel en 1905 dum la 1-a Universala Kongreso de Bulonjo-ĉe-maro same sep diversnaciaj geroluloj ludis la komedion de Molière "La edziĝo kontraŭvola". Sinsekve estis prezentitaj dum Universalaj Kongresoj: La floro de l'pasinto, de E.de Amicis - Boks kaj Koks, de M. Merton - Ŝi kliniĝas por venki, de O. Goldsmith - Ifigenio en Taŭrido, de Goethe - Mistero de doloro, de Gual - Kiel plaĉas al vi, de W. Shakespeare - Katje, de P. Spaak - La urso, de Ĉeĥov - Natan la Saĝulo, de G.E. Lesing - Hamleto, de W. Shakespeare - D-ro Knock, de J. Romaine - Angla lingvo sen profesoro, de Tristan Bernard - Georgo Dandin, de Molière - ktp. ktp.

Sed ĉiuj tiuj teatraĵoj estis tradukaĵoj; kaj la teatra prezentado estas des pli malfacila ĝenro, ke ĝi postulas publikon, kiu ne bezonas tempon por kompreni kaj tuj senti ĉion, kion esprimas la geaktoroj. Tial gravas en la komenco la simpleco de la teatra lingvo: kiu ankoraŭ bezonas pli ol unu sekundon por plene kompreni aludon aŭ ŝercon de repliko, tiu kompreneble ne povas tuj eksplodi per ridoj aŭ larmoj. Tial plej gravega punkto por teatra publiko estos subteni la originalajn teatraĵojn. Kompreneble ĉi tiuj ne povas tuj ekbrili ĉe la pinto, sed ili bezonas favoran apogon de la publiko por progresi kaj prosperi...

Ĉi-rilate ankaŭ pluraj provoj estis faritaj ekde la unua de "Ginevra", verko de Edmond Privat en Bern (1913), sed ili ankoraŭ malfacile trovis tiel favoran grundon, ke publiko kiel unu tuto "vibru" kun la sentoj esprimataj; ja, kiel ĉiuj scias, la teatro estas la lasta ĝenro aperanta en ĉiuj literaturoj de la mondo!

Dume ekde 1957 jam du trupoj da geaktoroj anoncis la venontan sukceson: IAT (Internacia Arta Teatro) kaj BET (Bulgara Esperanto-Teatro). Temis pri profesiaj teatristoj, sed IAT ludis nur tradukajn teatraĵojn krom unu, du esceptoj. Kvankam elstaraj, tradukoj neniel rekte respondas al sociaj komunaj sentoj de internacia publiko. Citindaj estas: La homa voĉo, de J. Cocteau - La respektama p... de J.P. Sartre - Advokato Patleno - Onklo Maroje, de M. Držić - tamen, Maneken-parado, originalaĵo de Marjorie Boulton - Seneliro de J.P. Sartre, ktp.ktp. Same estis pri BET: preskaŭ ĉiam nur tradukaĵoj! Dume pluraj malpli konataj trupoj provis ludi originalaĵojn, kiuj pli kaj pli sukcesis: sendube en la 2-a jarcento de Esperanto plene ekbrilos la originala teatrado.

Estus tede memori la elementojn de ĉiu INTERNACIA ARTA FESTIVALO.

La 1-an iniciatis prof. d-ro Ivo Lapenna en Harrogate (Britio) en 1961. En la programo enestis folkloraj dancoj, teatraj prezentadoj, bukedo de hispanaj, francaj, italaj, israelaj kaj libanaj kantoj, aranĝo pri la vivo de F. Liszt, pluraj filmoj kun sonkomentoj en la lingvo, kaj eĉ en la Internacia Somera Universitato tuta serio da prelegoj pri unu sama temo: la arto. Ankaŭ citindaj estas konkurso pri la plej bona afiŝo por Esperanto, fotokonkurso pri "La Homaro", ekspozicio de la itala pentristo Eupremio, fotoj pri la vivo kaj popolo de Japanio, kolekto de klasikaj japanaj lignogravuraĵoj.

En la 2-a INTERNACIA ARTA FESTIVALO okazinta en Sofio (Bulgario) 1963 estis prezentitaj sep teatraĵoj de la aŭtoroj A.P. Ĉeĥov, J. Cocteau, J.P. Sartre, W. Shakespeare, V. Kljaković; kantis operkantistoj, kaj en vespero partoprenis kantogrupo "Luigi Gazotti" el Modena, per japanaj melodioj en "noo-stilo" Deguĉi Kjotaro kaj Umeda Joŝimi; ankaŭ operkantistinoj el Pollando, Nikolaj Rytjkov aktoro el Moskvo, dancensemblo el Jugoslavio, kaj estis aŭdigitaj eĉ melodioj el Madagaskaro. Okazis konkursoj oratora, deklama, fota, kaj ekspozicio de fotografaĵoj, grafikaĵoj kaj pentraĵoj.

La 3-a INTERNACIA ARTA FESTIVALO havis lokon en Budapeŝto en 1966. Partoprenis tri teatraj grupoj kaj estis

prezentitaj sep teatraĵoj kaj multaj unuaktaĵoj kaj monologoj. Vespero konsistis el hungara muziko kaj dancoj el diversaj regionoj de Hungario. Ankaŭ prezentiĝis Junulara Popoldanca Ensemblo, ciganorkestro kaj Pupteatro, unuakta originalaĵo de Marjorie Boulton "Ĉu esti aŭ ne esti?", kaj filmo "ANGOROJ" la unua fikcia filmo en Esperanto havis plurajn prezentojn. Aŭdiĝis koncerto de modernaj kantoj, kaj japana aranĝo prezentis la teceremonion, la flaranĝon, japanan kalkulilon, paperfaldan arton kaj belskribadon. Same celis Oratora kaj Belartaj Konkursoj kaj la Internacia Somera Universitato.

La 4-a INTERNACIA ARTA FESTIVALO efektiviĝis en Madrido (1968) kun sep teatroprezentaĵoj, koncerto de popolaj kantoj, varia arta vespero el muziko kaj poezio, oratora kaj belartaj konkursoj kaj la Internacia Somera Universitato. Ĝi estis la lasta laŭ mia scio!

FILMADO estas multekosta kultura manifestiĝo, kaj tio sendube klarigas, kial ĉi tiu kampo ne estis tiel prilaborita kiel la aliaj.

Rimarkinde tamen estas, ke filmfakuloj kiel Chaplin rekonis la valoron de Esperanto kaj eĉ uzis la lingvon laŭokaze, ekzemple en la fama filmo "LA DIKTATORO". En 1929 estiĝis la unua provo de mallonga filmo fare de "Paramount"; ĝin sekvis dua en 1930 okaze de Universala Kongreso en Oxford. Sed la unua plena sonfilmo estis "Morgaŭ ni komencos la vivon" de la fama verkisto kaj reĝisoro Jean Forge, kiu prezentis ĝin en 1934 kadre de la Universala Kongreso de Stockholm.

Post la 2-a Mondmilito multaj turismaj filmoj estis produktitaj kun versioj en Esperanto; sed la unua originala filmo estis ANGOROJ, kiun produktis J.L. Mahé proprakoste en Parizo en 1964: kriminala filmspeco. En 1966 tiam Paramount provas produkti la filmon "INCUBUS" kun dialogoj en Esperanto; bedaŭrinde la geaktoroj ne scipovas paroli la lingvon, kaj ilia prononcmannerio ne utilas al la filmo. Sekvis multaj filmoj sed ĉefe el la specoj dokumenta, reklama kaj propaganda; ĉi tiu arta branĉo bezonas mecenatojn.

Male multiĝis la PUPTEATROJ, kiuj ja ne necesigas kapitalan amason.

La unua prezento okazis en la 3-a Internacia Arta Festivalo de 1966 kun la titolo "Sorĉa fajrilo" laŭ H.A. Andersen. Ekde 1968 ĝis 1972 sin sekvis kvin PUPTEATRAJ INTERNACIAJ FESTIVALOJ, sed ĉiuj en Jugoslavio, la unua en Zagreb (1968) kun kvin televidaj raportoj kaj radio-elsendoj; la dua en Zagreb (1969) kun partopreno de kvin landoj; la tria en Zagreb kaj Sisak (1970) kun sep pupteatroj el sep landoj; la kvara samloke

kaj en Varaĵdin (1971) kun sep pupteatroj el ses landoj; la kvina samloke en 1972 kun 11 pupteatroj el ok landoj; ktp...La sukceso instigis la Unuiĝon Internacian de Marionetistoj (UNIMA) organizi internaciajn turneojn de pupteatraj grupoj. Des pli interesa kultura paŝo, ke la pupteatra ĝenro estas tre favorata de ĉiuj infanoj tra la mondo!

* * *

Sed en la bilanco de ĉi tiu unua jarcento de la Lingvo estas ankaŭ multaj alispekaj kulturaj manifestiĝoj, kiuj, kvankam sur malpli vasta skalo, havas gravan valoron des pli, ke ili kompensigas la malplian vastecon per pli ofta okazado.

El inter ili elstaras la INTERNACIA SOMERA UNIVERSITATO.

Ekde la jaro 1925 en la 17-a Universala Kongreso en Ĝenevo serio da prelegoj celis diskonigi la sciencajn akiraĵojn. Post la 2-a Mondmilito en 1949 la Komitato de UEA devis precizigi ĝian regularon: la celo estis popularigi ĉiujn sciencajn kaj artajn branĉojn pere de Esperanto. Entute de 1948 ĝis la fino de 1972 en 25 sesioj lekciis 91 profesoroj, docentoj kaj aliaj kvalifikitaj homoj. Ekzistis tri ĉefaj branĉoj: en la unua - sociaj sciencoj kaj filozofio - 47 lekciistoj faris 107 lekciojn; en la dua - naturaj sciencoj - 22 lekciistoj donis 58 lekciojn; kaj la tria - arto kaj literaturo - kalkulis 29 lekciistojn kaj 66 lekciojn. Pluraj el la lekciroj aperis en libroj aŭ en periodaĵoj precipe en Scienca Revuo kaj Internacia Jura Revuo.

Sed multiĝas ankaŭ pluraj aliaj kursoj aŭ seminarioj kun prelegoj aŭ raportoj sur scienca nivelo.

Tre konataj estis la seminarioj de SVEDA SOMERA SEMAJNO okazintaj en Frostavallen (Höör). Sub la gvido de Jan Strønne tiuj kulturaj aranĝoj estis sesfoje organizitaj de Sveda Esperanto-Instituto inter 1953 kaj 1972 kun ĉ. 100 partoprenantoj el 15 ĝis 20 landoj.

Similajn seminariojn organizis Germana Esperanto-Junularo sub la titolo INTERNACIA SEMINARIO DE GEJ, plej ofte en junularaj gastejoj kaj ĉe la jarfino.

SOMERA ESPERANTO-UNIVERSITATO, kies iniciatinto estis Prof. Imre Kádár, okazis en Gyula (Hungario) kun plej variaj temoj.

Ekde 1972 nova iniciato de prof. E. Natalis el la Lieĝa Universitato kreis la SOMERAJN UNIVERSITATAJN KURSOJN pri lingvistiko kaj medicinaj sciencoj.

Sporade funkciis aliaj internaciaj seminarioj aŭ konferencoj.

Unua estis INTERNACIA SEMINARIO PRI LA KULTUROJ KAJ CIVILIZOJ DE LA MONDO de 1954 en Kastelo Grésillon (Francio) kun 5 fakuloj, 15 lekcioj, sesdek seminarioj el 13 nacioj.

Alia estis SEMINARIO ORIENTO-OKCIDENTO en la Universitato de Londono (1961) kun 10 specialistoj, 20 lekcioj, 60 partoprenantoj el 15 landoj.

Plej grava estis UNUA INTERNACIA KONFERENCO PRI LA LINGVA PROBLEMO EN LA SCIENCO en la Teknika Altlernejo de Kopenhago (1962) kun grupo da sciencistoj sub prezido de d-ro Paul Neergaard. Ĉeestis 61 sciencistoj kaj observantoj el 13 landoj, kaj 22 raportoj estis prezentitaj de 18 fakuloj.

Pluraj renkontiĝoj de TEJO aspektis kiel seminarioj sur alta nivelo: tiaj estis "LINGVO KAJ KULTURO" en Strasburgo (1971) kun 15 raportoj kaj 140 paĝoj publikigitaj, kaj "LINGVO KAJ POLITIKO" en Parizo (1972).

Alia formo de kulturaj aranĝoj estis pli konstanta, preskaŭ ĉiujara, kiel tiu de la kulturaj programoj en la Kultur-Domo de Grésillon jam de 1952. Kaj de tiam multaj aliaj estiĝis laŭ simila formulo, citindaj estas: La Chaux-de-Fonds kun C. Gacond, Saarbrücken kun R. Haupenthal, Balaston kun Marjorie Boulton, kaj antaŭnelonge Metz kun d-ro E. de Zilah, eĉ ĵus inaŭgurita la "Kvinpetalo" en Bourresse apud Poitiers kun f-ino S. Bourrot.

Fine kulturaj interŝanĝoj okazas ankaŭ per personaj kontaktoj okaze de grupaj kunvenoj aŭ per internacia korespondado aŭ jam de 1957 laŭ iniciato de Rüdiger Eichholz el Kanado pere de magnetofona servo, kiu kolektadas kaj distribuadas sonbende registritajn prelegojn, radio-elsendojn, kantojn, teatraĵojn, humoraĵojn, kursojn kaj sondokumentojn kaj atestojn pri la vivo de la Lingvo Internacia. Sed la organizo de PRELEGVOJAĜOJ estis en tiu rilato tre fruktodona.

Jam antaŭ la 1-a Mondmilito notindaj estis tiuj de I. Krestanov (bulgaro), A. Pitlik (ĉeĥo), prof. d-ro Edmond Privat (sviso) kaj D. Parrish (usonano), precipe ĉi tiu kun 25 landoj vizititaj.

Post 1930 citindaj estas la vojaĝoj de Hugo Steiner, R. Frey, R. Cech (aŭstroj), d-ro J. Lukacs, d-ro S. Puskás, J. Baghy, d-ro F. Szilágyi kaj T. Czitrom (hungaroj), T. Morariu (rumano), L. Sinha (hindo), K. Ajayi (niĝeriano), M. Raden (javano) kaj J. Scherer (usonano), kiuj de 1930 ĝis 1932 vizitis 41 landojn kaj faris 322 prelegojn kaj paroladojn.

Post la 2-a Mondmilito elstara estas la prelegvojaĝo de prof. d-ro Ivo Lapenna, kiu en la periodo de 1949 ĝis 1951 vizitis ĉ. 150 urbojn en Italio, Francio, Belgio, Nederlando, Britio kaj Islando kaj faris pli ol 300 prelegojn. Menciindaj estas ankaŭ tiu de B. Potts (novzelandano) en 1956-1957 tra 11 landoj, tiu de Kaĵino Joŝiko (japanino) en 1959-1960, tiu de Itoo Eizo samjare kun 156 prelegoj en 106 urboj de 18 eŭropaj landoj, kaj tiu de Kĵotaro Deguĉi kaj Joŝimi Umeda en 1963 (54 prelegoj en urboj de 13 landoj).

*
* *

Sed dum ĉi tiu pasinta jarcento la vivo de la Lingvo Internacia manifestiĝis ankoraŭ per praktikaj celoj, rimedoj kaj okazoj.

Unu el la plej malnovaj estas la DELEGITA RETO. Ekde la 2-a Universala Kongreso en Ĝenevo (1906) A. Carles proponis, ke estu en multaj urboj kvazaŭ "konsulato" de la esperantista popolo... Sed nur poste en 1908 kun la fonda de UEA la afero estis realigita sub la nomo de delegitoj: tuj de la 1-a jaro ĉi tiuj estis 200 kaj 80 vicdelegitoj, 100 subdelegitoj. Ĉiu nun scias, kiom da servoj povas doni tiuj delegitoj: unika reto da informistoj tra la tuta mondo!

Grava fonto de informoj en kaj pri Esperanto estas ankaŭ la RADIO: disaŭdigoj komenciĝis en 1922 en Newark XYZ (Usono) kaj en Londono. Sekvis en 1923 Moskvo, Montreal kaj Rio de Janeiro; en 1924 Praha, Ĝenevo, Helsinko kaj Parizo. Jam en 1933 83 radio-stacioj en 14 landoj havis 1774 elsendojn.

Post la 2-a Mondmilito ekde 1945 ok radio-stacioj el sep landoj rekomencis disaŭdigojn (inter ili Sofio, Praha, Ostrava kaj Varsovio); en 1946 jam estis 12 radio-stacioj el 10 landoj. De 1948 ĝis 1950 Radio Parizo havis eĉ ĉiutagajn elsendojn! Sed politikaj celoj ĉesigis tiujn de Ostrava (januaro 1950), Varsovio (junio 1950), Radio Praha (septembro 1950) kaj Sofio (1950).

Tamen ekde 1952 rekomenciĝis regulaj disaŭdigoj en Bern (Svislando), Rabat (Maroko), Hilversum (Nederlando), Lille kaj Parizo (Francio), Vieno kaj Graz (Aŭstrio), Gvatemalo, Romo (Italio), Madrid (Hispanio), Rio de Janeiro (Brazilo). Poste siavice realsendis Sofio, Zagreb, Ljubljana, Beogrado, Varsovio, Praha, Bratislavo, Pekino, Budapeŝto kaj eĉ sporade Soveta Unio. Kaj nuntempe ne malofte estas parolata la Lingvo Internacia per ultrakurtaj ondolongoj aŭ frekvenco-modulado!

Kvankam komuna lingvo estus tre profitiga por KOMERCO kaj INDUSTRIO, ĉi tiuj ag-kampoj de la homaro estas ĉiam

demonŝtremaj kaj malfruj, kiam temas pri novaj eltrovoj, por kies alprenado ne sufiĉas mono.

Tamen en 1914 troviĝis jam 285 delegitoj de UEA, el kiuj 166 komercistoj, 15 agentoj, 47 komercoficistoj, 41 bankoficistoj kaj 16 industriistoj. Ekkreskis la komercaj servoj de 1120 en 1909 al 3713 en 1913, kaj en 1914 funkciis 10 komercaj fakgrupoj en 7 landoj kun 968 komercaj firmaoj en 38 landoj. Interesiĝis pri la afero la Londona Komerca Ĉambro ekde 1905, kaj sekvis 63 komercaj ĉambroj, el kiuj 51 francaj, 3 anglaj, 7 germanaj, 1 hispana kaj 1 usona.

Post la 1-a Mondmilito la Pariza Komerca Ĉambro surbaze de raporto de André Baudet enkondukis la instruadon de Esperanto en siaj lernejoj kaj rekomendis ĝi tiun instruadon al la aliaj Komercaj Ĉambroj kaj al la Ligo de Nacioj. En 1923 laŭ invito de la Itala Svisa Komerca Ĉambro en Ĝenevo havis lokon en Venecio Internacia Konferenco por Komerca Helplingvo sub la patroneco de la Itala Ministro pri Industrio kaj Komercado. Partoprenis 90 komercaj ĉambroj, 8 ministrejoj pri komercado, 21 foiroj, 61 komercaj institutoj, entute 27 landoj de 5 kontinentoj.

Sed la 2-a Mondmilito detruis ĉion, kion ankoraŭ ne detruis la 1-a... Post la lasta Mondmilito la disvastigo rekomenciĝis sed tre disamaniere. Tamen mondkonataj entreprenoj ekuzis la lingvon: flugkompanioj KLM, SAS, BEA, BOAC, SABENA, TWA, LOT, Swissair, Air France, Iberia; filmfabrikoj Gevaert, Kodak; aŭtomobiloj FIAT; - la polona firmao Philips; sed ankaŭ multaj malpli konataj! Same faris ankaŭ foiroj: Paris, London, Padova, Verona, Lyon, Marseille, Bologna, Barcelona, Poznan, Budapeŝto, Brno, Liberec. En 1958 estis fondita centro en Milano (CEKII) kun Adresaro de Firmoj kiuj uzas Esperanton en la internaciaj rilatoj. En 1963 estis kreita INSTITUTO POR ESPERANTO EN KOMERCO KAJ INDUSTRIO (EKI), kiu produktis precipe sub la redaktoreco de F. Munniksma kaj per kunlaboro de 24 personoj el 14 landoj, en 1974, vortaron kun ĉ. 2000 specifaj fakterminoj, la naŭlingvan "KOMERCA-EKONOMIA VORTARO".

Ankaŭ en aŭ okaze de diversaj ekspozicioj uzata estis la Lingvo Internacia: en Parizo (1900) en la rusa parto de la ekspozicio; en Saint Louis (1904) en la franca sekcio; en Bruselo (1910) en la belga sekcio; en San Francisko (1915); en Wembley (1924-25), kie eĉ Esperanta versio de la inaŭgura parolado de la Reĝo George la 5-a estis dissendita per radio; en Philadelphia (1926) kun speciala kunveno; en Parizo (1931); en Ĉikago (1933-34); en Bruselo (1935); en Parizo (1937); en Nov-Jorko

(1939-40) kun aparte dediĉita "Esperanto Day"; en Bruselo (1958) kun libervolaj interpretistoj; en Nov-Jorko (1964-65) kun gvidilo kaj mapo por vizitantoj; en Montrealo (1967); en Oosaka (1970), ktp.

Sed la plej gravajn paŝojn Esperanto faris sur la turisma kampo: tio sendube estas ŝuldata al la forta apogo, kiun la franca organizaĵo **TOURING CLUB** donis al la Lingvo jam de 1900. La lingvo uzado manifestiĝis ĉefe per prospektoj kaj faldfolioj. Entute **CCO** registris ĝis la fino de 1967 ĉ. 1100 tiajn publikaĵojn. Aperis ankaŭ gvidlibroj kun mapoj, ilustraĵoj kaj informoj pri plej diversaj urboj kaj landoj. Ankaŭ periodaĵoj venis post la 2-a Mondmilito: "Esperanto Turismo" en Belgio (1967), "Turista Mondo" en Zŭrich (1969), "Ripozoĵ" en Bulgario (1964). Sed pluraj ekaperas kaj malaperas, ĉar ankoraŭ mankas sufiĉe vasta legantaro por certigi ilian daŭron. Certe la kampo estas pluginda por la Lingvo, ĉar eksterlandaj vojaĝoj ne povas havi plenan efikon el eduka, scienca kaj kultura vidpunktoj sen rimedo de unu komuna lingvo, kiu pro sia simpleco montriĝis supera al la ĝisnune internacie uzata balbuta scipovo de la angla. Tio signifas, ke la pli vasta uzateco dependas de la turistoj kaj evidente de la esperantistaj turistoj, kiuj eksterlande nepre kaj unue provu uzi la komunan lingvon Esperanton prefere ol provi ellurniĝi per iu ajn alia.

Koncerne al la **POŬTO**, **TELEGRAFO**, **TELEFONO** bezonataj estas nek longaj nek multaj frazoj. Jam de 1892 en Ruslando oni sendadis telegramojn en Esperanto sen malhelpo; kaj la 30-an de decembro 1904 la poŝta administracio de Ruslando oficiale akceptis la Lingvon sub kondiĉo de samtempa traduko en nacia lingvo. La 30-an de novembro 1906 Esperanto estis per dekreto akceptita en la brazila poŝto. En 1913 sekvis la poŝta administracio de Nederlando. En 1925 **USSR** eldonis la 1-an poŝtmarkon kun teksto en Esperanto.

Nu, jam la 24-an de septembro 1924 rezolucioj estis proponitaj en la Ligo de Nacioj, kiuj rezolucioj kondukis al unu rekomendo de Esperanto rekornata kiel "klara lingvo". Kaj en 1925 **UNIVERSALA TELEGRAFA UNIO** en sia tutmonda konferenco de Parizo modifis sian regularon por ke Esperanto estu de nun agnoskita kiel klara lingvo laŭ la rekomendo de la Ligo de Nacioj. Sekve de tio ne plu estis levita ia demando pri Esperanto en la poŝtaj rilatoj.

Male multaj administracioj eldonis poŝtmarkojn kun Esperanta teksto: Aŭstrio, Bavario, Brazilo, Bulgario, Ĉeĥoslovakio, Hungario, Jugoslavio, Pollando, Soveta Unio, Triesto; inter 1911

kaj 1969 estis 53 poŝtmarkoj. La 1-a poŝta ŝtampo aperis en Argentino en 1912; de tiam ĝis 1968 havis ŝtampojn 24 landoj kaj ekzistis 447 ŝtampoj.

Ĉe la fino de ĉi tiu panoramo de la praktikaj celoj nepre necesas menciigi la agadon de la fakaj asocioj, kies plej utilaj rezultoj konkretiĝas en specifaj terminaroj. Ne estas seninterese konsideri ilian formiĝon kaj progreson laŭ kronologia ordo.

De antaŭ la 1-a Mondmilito datiĝas sep fakaj asocioj.

La jaro 1906 vidas formiĝi du gravajn asociojn: unuan pri juro kaj duan pri sciencoj. Sub la nomo INTERNACIA SOCIETO DE ESPERANTISTAJ JURISTOJ la advokato Michaux, kiu organizis la 1-an Universalan Kongreson en Bulonjo ĉe maro, iniciatis juran societon en la 2-a Universala Kongreso de Ĝenevo: ĉi tiu societo produktis germanan esperantan vortaron en 1932, kaj malaperis pro la eventoj. En 1957 laŭ iniciato de prof. d-ro Ivo Lapenna estis fondita la INTERNACIA ESPERANTO-ASOCIO DE JURISTOJ, heredinta asocio de la antaŭa, kiu kalkulis 208 membrojn el 31 landoj en 1972, eldonis elstaran revuon, INTERNACIA JURA REVUO, kaj esperantigis gravajn dokumentojn de la internaciaj rilatoj: UNIVERSALA DEKLARACIO DE LA HOMAJ RAJTOJ, ĈARTO DE UNUIĜINTAJ NACIOJ, STATUTO DE LA INTERNACIA KORTUMO.

En la sama 2-a Universala Kongreso generalo Sebert fondis asocion kun la nomo INTERNACIA SCIENCA ASOCIO ESPERANTISTA kaj bulteno INTERNACIA SCIENCA REVUO. Ĉi tiu asocio dufoje malaperis kun la militoj; en 1922 ĝin restarigas M. Rollet de l' Isle; kaj en 1947 ĝin restarigas muzea kuratoro C. Stop-Bowitz. De 1949 ĝis 1961 SCIENCA REVUO estis eldonita de Muusses en Nederlando.

En 1908 formiĝas la asocio TUTMONDA ESPERANTISTA KURACISTA ASOCIO kun INTERNACIA MEDICINA REVUO. La unua tezo originale verkita en Esperanto estis pri medicino en 1922, kaj en 1932 aperis ESPERANTA TEKNIKA MEDICINA VORTARO de M. Briquet. En 1960 la asocio estis reorganizita sub la nomo UNIVERSALA MEDICINA ESPERANTO-ASOCIO, kun 350 membroj en ĉ. 40 landoj.

Dum la Universala Kongreso en Barcelona estas kreita INTERNACIA ASOCIO DE ESPERANTISTAJ FERVOJISTOJ (1909); ĝi estos refondita en 1921 kaj produktos fervojan terminaron de 1300 vortoj; en 1948 ĝi denove estos refondita dum la 21-a SAT kongreso, kalkulos 3050 membrojn el 19 landoj en 1971, kaj ankoraŭ nun prilaboras fervojan terminaron de 11.000 vortoj.

En 1910 formiĝis INTERNACIA KATOLIKA UNUIĜO ESPERANTISTA surbaze de la societo ESPERO KATOLIKA fondita en 1902 de pastro E. Pellier; jam de 1906 estis permesitaj prediko kaj diservo en Esperanto, kaj post la 2-a Vatikana Koncilio la Lingvo estis oficiale agnoskita kiel liturgia lingvo de la Vatikano.

KRISTANA ESPERANTISTA LIGO INTERNACIA kun revuo DIA REGNO estis fondita en 1911 en Antverpeno laŭ instigo de W. Page (Britio) kaj W. Cnossen (Nederlando). Ĝi estis restarigita en 1926 de la fama brilo H. Luyken dum la Universala Kongreso en Edinburgo.

En la sama jaro ekestas INTERNACIA LIGO DE ESPERANTISTAJ POŝTISTOJ, TELEGRAFISTOJ, TELEFONISTOJ, kiu, restarigite en 1966 kiel INTERNACIA POŝTISTA KAJ TELEKOMUNIKISTA ESPERANTO ASOCIO, produktis terminaron.

Inter la du Mondmilitoj estiĝis ok pliaj fakasocioj.

Jam de 1908 la fondinto R. Baden Powell rekomendis al la skoltaj Esperanton. En 1918 estis fondita SKOLTA ESPERANTO-LIGO, kiu en 1964 fine venkis la malhelpojn kaj malpermeson de la Skolta Monda Oficejo por la akcepto de Esperanto kiel tria oficiala lingvo en la famboreoj.

Sekvis en 1921 la fondiĝo de KVAKERA ESPERANTISTA SOCIETO, kaj de INTERNACIO DE MILITREZISTANTOJ; tiu ĉi postvenis la antaŭan rapide malaperintan similan asocion INTERNACIA SOCIETO ESPERANTISTA POR LA PACO de Gaston Moch (1905), kiu ĉion forlasis post tri jaroj. En la sama jaro estis fondita ankaŭ SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA de E. Lanti, kiu asocio eldonis la PLENA n VORTARO-n en oktobro 1930 kaj poste la PLENA-n ILUSTRITA n VORTARO-n de 1970. Ĉi tiuj vortaroj estis du gravaj mejloŝtonoj por la fiksado de la Lingvo.

Kaj jen en 1924 estas kreita TUTMONDA ASOCIO DE GEINSTRUISTOJ ESPERANTISTAJ, kiu en 1949 estos restarigita en INTERNACIA LIGO DE ESPERANTISTAJ INSTRUISTOJ kaj kiu sukcesos eniri en kategorion C ĉe UNESKO kaj kalkulos 34 landajn sekciojn en 1978.

En la sekventa jaro 1925 estiĝas UNIVERSALA HOMAMA ASOCIO pli konata sub la nomo de sia revuo OOMOTO en Japanio; kaj en 1926 BUDHANA LIGO ESPERANTISTA kun la revuo LA BUDHISMO, kiu aperis de 1931 ĝis 1936. En 1954 en Cejlono ekstaris BUDHANA ESPERANTO INSTITUTO. En 1956 Dalai Lama kaj en 1957 Panĉen Lama estos patronoj de la Ligo.

En 1930 estas fondita STUDENTA TUTMONDA ESPERANTISTA LIGO alinome STELO laŭ iniciato de prof. dr. Ivo Lapenna, tiam prezidanto de la Studenta Klubo en Zagreb; tio ĉi postsekvis du antaŭajn sensukcesajn provojn: INTERNACIA STUDENTA ESPERANTO-ASOCIO (de 1924 ĝis 1927) kaj UNIVERSITATA ESPERANTO FEDERACIO (de 1926 ĝis 1930). Post la 2-a Mondmilito danaj studentoj inter 1951 kaj 1953 eldonis revuon "La studento" en kadro de INTERNACIA FEDERACIO DE ESPERANTISTAJ STUDENTOJ KAJ ALTLENEJOJ. Sed en aŭgusto 1958 estis restarigita STELO kiel sekcio de ISAE kaj TEJO.

Fine de 1942 ĝis 1974 estas 22 pliaj fakasocioj, kiuj estis kreitaj kaj ekprosperas.

En la 14-a de aprilo 1942 en plena milito per sekreta kunveno Julia Isbrucker kaj Andreo Cseh fondas novan asocion UNIVERSALA LIGO pri federaciaj problemoj kun Edmond Privat kiel unue prezidanto; ĝi funkcias kun INTERNACIA ESPERANTO-INSTITUTO en Hago kaj la gazeto LA PRAKTIKO (aperanta de 1932 ĝis 1964).

TUTMONDA ESPERANTISTA ĴURNALISTA ASOCIO estis kreita en 1946 laŭ la iniciato de tri skandinaviaj ĉefredaktoroj. Sed post la morto de la svedo E. Adamson en 1953 ĝi estas reorganizita en 1956 kaj la bulgara sekcio en 1957, transprenante la redaktadon de la organo INTERNACIA ĴURNALISTO, igis tiun ĉi komunikilo de Orienta Eŭropo.

En 1949 estiĝas VETERANA ESPERANTISTA KLUBO kaj en 1951 LIGO INTERNACIA DE BLINDAJ ESPERANTISTOJ; la 6-an de septembro 1953 en la aŭstra urbo Sankt Pölten kaj laŭ iniciato de Anton Balague estas kreita MONDPACA ESPERANTISTA MOVADO famiĝinta laŭ sia siglo MEM, kiu agas en kadro de jam ekzistantaj landaj sekcioj de la movado per la revuo PACO kun perantoj en 40 landoj kaj la alia gazeto PACO AKTIVULO el Bulgario; tute politikaj periodaĵoj.

De la jaro 1955 ĝis la jaro 1970 estas kreitaj preskaŭ ĉiujare novaj asocioj pri aparta tereno de la homa aktiveco.

En 1955 temas pri INTERNACIA GEOGRAFIA ASOCIO, kiu produktos Mondmapon en 1968; en 1957 pri INTERNACIA LIGO DE TOTO KINO-MAGNETOFONO AMATOROJ; en 1958 pri ESPERANTA ŜAK-LIGO INTERNACIA; en 1959 pri INTERNACIA SOCIETO DE ARKITEKTOJ KAJ KONSTRUISTOJ ESPERANTISTAJ; en 1961 pri ORNITOLOGIA RONDO ESPERANTLINGVA kun la revuo LA MEVO, kiu produktos en

1971 terminaron KOMUNLINGVA NOMARO DE EŬROPAJ BIRDŬJ (5/9 specioj); en 1963 pri MUZIKA ESPERANTA LIGO, kiu en 1972 eldonos terminaron ESPERANTLINGVA MUZIKA LEKSIKONO; en 1963 dum la 48-a Universala Kongreso en Sofio ankaŭ pri INTERNACIA UNUIĜO DE LA ESPERANTISTOJ -FILOLOGOJ; en 1964 pri INTERNACIA ESPERANTO KLUBO AŬTOBILISTA kun defegita reto "SOS aŭto servo" sur 14 landoj kaj kun seslingva aŭtoterminaro; samjare pri ESPERANTO -LIGO FILATELISTA; en 1965 pri MARTINUS-INSTITUTO, kiu adoptas Esperanton; en 1967 INTERNACIA ASOCIO DE BIBLIISTOJ KAJ ORIENTALISTOJ kun Biblia Revuo; samjare pri INTERNACIA TURISMA ESPERANTO-ASOCIO kun la revuo TURISTA MONDO, sed ĉar ĝi restas senfika, ĉar en oktobro 1968 Internacia Akademio de Turismo akceptis Esperanton por sia Vortaro de Turismo, helpe de la Komitato de UEA estis fondita dum la Viena Kongreso de 1970 nova organizaĵo sub la prezido de F. Carlén MONDA TURISMO, kiu en 1978 havas 245 individuajn membrojn kaj 8200 kolektivajn; en la sama jaro temas pri ESPERMENTO kiel oficiala Esperanto sekcio de la organizaĵo MENSA formita en 1945, kaj la Esperanto-sekcio estis aprobita de la 19-a Internacia Ĝenerala Kunveno de MENSA en Nov-Jorko; temas ankaŭ pri INTERNACIA ESPERANTO LIGO DE POPLUDISTOJ...

Nur por memoro ekzistas ankaŭ UNIVERSALA INVALIDA ESPERANTO-ASOCIO, INTERNACIA LIGO DE ESPERANTISTOJ RADIO-AMATOROJ, INTERNACIA ESPERANTO AMIKARO DE ROTARIANOJ (antaŭe Rotaria Asocio de Esperantistoj), kaj BAHAA ESPERANTO-LIGO.

Nu en 1974 estis fondita ankaŭ INTERNACIA ASOCIO DE ESPERANTISTAJ MATEMATIKISTOJ, kiu celas eldonon de plurlingva matematika terminaro, kaj en 1985 FILOZOFIA ASOCIO kun la sama terminara celo; sed jam estas anoncitaj ankaŭ novaj asocioj: la MONDHISTORIA ASOCIO ESPERANTISTA (fondita en Graz) kaj TUTMONDA ASOCIO DE PLURKULTURAJ ESPERANTISTOJ. Kiel konstateble, la listo ne estas fermita!

* *

Jen do rapide skizita bilanco de cent jaroj en servo de kulturaj interŝanĝoj kaj praktikaj celoj: ĉu komplete? Estus temerare ne dece aserti tion pro pluraj motivoj, el kiuj la ĉefa estas la tro longa tempo, kiun postulus plena raporto pri centjara disvastiĝo de la komuna Lingvo Internacia de D-ro Zamenhof.

Restas tamen la ĝenerala efiko, kiun estigas la uzado de tia lingvo, nome tiu ĉi mistera efiko, kiun d-ro L.L. Zamenhof mem nomis "interna ideo", kaj kiun pli klare oni nomas nuntempe la "humaneca internaciismo" rezultanta el la posedo de unu komuna lingvo kun ideo de "internacia solidareco".

Tiu ĉi plej bone manifestiĝis en la ĉiujaraj Universalaj Kongresoj preskaŭ ĉiam kun ĉeftemoj koncerne al la internaciaj rilatoj: deklaracioj kaj rezolucioj emfazis la solidaran rolon de la Lingvo. Samspirite konstantaj agadoj kaj mondaĵ kampanoj de la Esperanto parolanta komunista ĉiam implicis la aplikon de la HOMAJ RAJTOJ. Kiel skribis prof. d-ro Ivo Lapenna en "ESPERANTO EN PERSPEKTIVO" sur paĝo 373, pri la fama ideo de Zamenhof:


"La esenco de tiu ideo estas koncize esprimita en unu sola simpla frazo, kiun Zamenhof eldiris en sia admirinda parolado en Bulonjo-ĉe-maro tiun historian tagon de 1905, kiam la unuan fojon homoj de multaj diversaj nacioj parole interkompreniĝis per komuna supernacia lingvo:

Ni konsciu bone la tutan gravecon de la hodiaŭa tago, ĉar hodiaŭ inter la gastamaj muroj de Bulonjo sur Maro kunvenis ne Francoj kun Angloj, ne Rusoj kun Poloj, sed homoj kun homoj.

Tia konceptado de la rolo de Esperanto, tute konforma al ĝia internacia karaktero, kondukis al plia kaj lasta ŝtupo, nome al organizitaj agadoj, kies rektaj aŭ nerektaj celoj estas evoluigi amikajn rilatojn inter la popoloj, kontribui al pli bona internacia kompreniĝo kaj, rezulte, al monda paco. Tenuas pri planitaj laŭcelaj agadoj, inter kiuj la universalaj kongresoj de Esperanto, diversaj internaciaj konferencoj kaj aliaj renkontiĝoj, tutmondaj kampanoj por disvastigado de humanecaj ideoj okupas aparte elstaran pozicion."

Tiel estis en la universalaj kongresoj ĝis 1974, tiel estis en la Internaciaj Konferencoj de la pasintaj jaroj, kaj per tia efiko Esperanto estas plenumanta la bondeziron de la latina poeto Terencio, kiu en fama verso ekkriis:

"Mi estas homo: homo al mi nenio fremdas."



CENT JAROJ DE LA SOCIA PENSO EN LIGO KUN ESPERANTO

Celo de la lekcio estas montri, kion kaŭzis la apero de Esperanto en la socia penso.

Per "socia penso" ni komprenas larĝe tiun fakon de la filozofio, kiu okupiĝas pri la socio. Mallarĝe ni komprenas tiujn filozofiajn skolojn en la socia penso, kiuj apogiĝas jam je certaj paradigmoj sociaj (ekz. klasbatalo, neperforteco, neŭtraleco ktp.).

1. Kiam en 1887 aperis Esperanto, la unua socia penso ligita kun ĝi estis esprimita jam de Zamenhof mem. Unue oni rimarkas, ke Zamenhof akceptas la ideon de la internacia lingvo kiel ion normalan, t.e. kiel kvazaŭ "i r u o n" en la evoluo de la homaro, kiun oni devas plenumi. En la UNUA LIBRO Zamenhof ne dediĉas tro da tempo al socia analizo de la fenomeno de la internacia lingvo, sed pli analizas teknikajn, t.e. lingvistikajn aspektojn de sia kreaĵo, ĉar la lingvo internacia ŝajnas al li tiom komprenebla afero en si mem, ke ĝi aperas al li kiel paradigmo. Zamenhof videble ne zorgis propagandi la ideon mem pli, ol la lingvon mem. Nur poste aperadas liaj eseoj kaj studoj pri la sociaj aspektoj de la lingvo internacia.

Ĉar la socia penso de Zamenhof estas sufiĉe bone konata kaj prilumigita de kelkaj sociaj kaj eĉ naciaj vidpunktoj, ni ne plu analizu ĝin.

Estas tamen necese aldoni ĉi tie, ke la komencanta entuziasmo de Zamenhof pri la Internacia Lingvo mem, transiris dum la jaroj al la sociaj ekinteresiĝoj de Zamenhof. En la subteksto de la tuta agado Zamenhofs, en la plej esenca, spirita konvinko Zamenhofs, la Internacia Lingvo estis la socia programo de la asimilado de judoj, sen perdi propran judecon, kaj plu (tio sonas eble paradokse) la Internacia Lingvo — kaj ligita kun ĝi nobule esprimita koncepto de neŭtraleco — estis serĉado de la

kompromiso inter judismo kaj kristanismo kaj poste serĉado de ĉiuj eblaj doktrinaĵ, fine etikaj kompromisoj. Tiel Zamenhof perdiĝis en la socia penso. Nur post la dua mondmilito Lapenna strebas ordigi la etikan penson de Zamenhof prilumante ĝin el diversaj sociaj skoloj kaj vidpunktoj metodologiaj.

2. Dua laŭvice inspirita de Esperanto koncepto socia estas sennaciismo de Lanti. Se ĉe Zamenhof memkomprenebla paradigmo estis la Internacia Lingvo, la neŭtraligo de la moroj, religioj, kiel ondo de la juda "haskala", la penso de Lanti prenas kiel la paradigmojn rekte la fenomenon de Esperanto kaj la klasbatalon cele konstrui ne nur senklasan, sed sennacian mondon. Esperanto ne estas celo, ĝi estas ilo.

3. La socia penso de Lapenna ligo kun la problemo de la Internacia Lingvo estas rekta kontinuo de la penso de Zamenhof. Kelkfoje Lapenna esprimis publike, ke la koncepto de la "humana internaciismo" estas nenio alia, ol esprimita per vortoj pli adekvataj tio, kion pensis kaj aliforme esprimis Zamenhof.

Simile al Zamenhof kaj Lanti, Lapenna opinias Esperanton kiel ĝustan la Internacian Lingvon kaj el lingvistika vidpunkto opinias ĝin matura, senriproĉinda, perfekta. Lapenna opinias lingvon socia fenomeno. Necesas substreki tion ĉi tie, ĉar ĉiuj "korrektistoj" de la problemo de la internacia lingvo volas vidi en la ankoraŭ ne aperinta fina venko de Esperanto la sekvon de ties lingvistikaj mankoj.

Ni ne faros apartan vortaron por traduki nociojn de Zamenhof per la konceptoj esprimitaj de Lapenna. Sed necesas fari ĉi tie kelkajn rimarkojn, kiuj povas proksimigi la penson de Lapenna lige kun Zamenhof. Valoras strebi serĉi tiujn similaĵojn, ĉar ja, se Lapenna preskaŭ identiĝas kun la pensmaniero de Zamenhof, valoras koni tamen diferencojn. Ne eblas ja, ke en tiel du fortaj personecoj ne ekzistus diferencoj. Kie do troviĝas diferencoj kaj identecoj:

-a) Zamenhof deklaris sin personeco religia, Lapenna ne deklaras sin religiulo. Zamenhof en sia "homaranismo" esprimas respekton al nereligiaĵoj, kvankam bedaŭras, ke tiaj ekzistas, sed ne komentarias tion morale. Lapenna absolute estimas religiulojn kaj donas pri tio multajn pruvojn.

Konklude: Ili troviĝas sur ontologiaj antipodoj, sed ligas ilin ambaŭ toleremo en la plej larĝa senco de tiu vorto.

-b) Zamenhof ne celis karieron de sciencisto, li celis esti morala instruisto. Zamenhof strebis esti klerulo kaj sukcesis; Lapenna

celis karieron de la sciencisto (juristo) kaj atingis ĝin. Por ambaŭ Esperanto estis la plej sankta alero de la vivo. La profesia kariero de Zamenhof kiel okulisto nur malhelpadis al li agadon esperantistan. Lapenna sukcesis trovi la oran ekvilibron, kiu nekredeble sukcese komplimentigis, ĉefe por la bono de Esperanto.

Konklude: Ili ambaŭ en sia vivo metis antaŭ ĉio Esperanton.

c) En sia agado kiel klerulo Zamenhof celis trovi la moralajn indikojn de la kondutado por la bono de la homaro; Lapenna profunde komprenis tiujn moralajn instruojn de Zamenhof, kiujn Zamenhof mem nomis la interna ideo, kaj celis trovi por ili formulojn pli adekvatajn. Li trovas ilin sur la nivelo de la internacia juro kaj konceptaro ligita kun la tuta problemaro kun la juro ligita.

Konklude: Tion kion celis ellabori etike kaj socie Zamenhof, Lapenna prilumas pli larĝe, per kategorioj de la lingvo disciplinita per devioj sciencaj.

Oni devas fari ĉi tie konkludon, ke tiom malsamaj personcoj kiel Zamenhof kaj Lapenna celas trovi ankaŭ por si mem la "komunan etikan lingvon", t.e. tian konduton ke la ambaŭ ne perdante siajn personcojn povus en pluralismo iri laŭ la vojo, kiu unuigas la homaron. Tie estas diferencoj kaj identecoj de Zamenhof kaj Lapenna.

Ni notis supre tri ĉefajn sociajn pensojn ligitajn rekte kun la fenomeno de Esperanto kaj inspiritajn de ĝi. Verdire ili estas nur du. Tiu de Zamenhof kaj Lapenna estas preskaŭ la sama etike. La alia estas tiu de Lanti.

REVELACIOJ KAJ LA INTERNACIA LINGVO

Ekzistas du religioj, en kiuj la koncepto de la internacia lingvo estas revelacie transdonita al la kredantoj en ties "dogmaron". La unua OOMOTO, originale japana, sed karakterize universala. La alia estas tiu de BAHAAŬOJ, kiu posedas same ĉiujn universalajn ecojn. En ambaŭ religioj iliaj kreintoj transdonis al la kreantoj "la dogmojn" t.e. pri la komuna lingvo.

En ambaŭ kazoj en la revelacioj mem oni ne diras rekte, ke tia komuna lingvo devas esti Esperanto. Ne estas facile diri, kian orientiĝon pri Esperanto posedis la kreintoj de ĉi tiuj religioj. Sed kio estas tre grava - la ĉefaj posteuloj kaj disĉiploj, kiuj havis povon teologian interpreti la revelaciojn, montris Esperanton kiel la komunan lingvon, sed prudente ne obstinis diri, ke en la revelacioj temis ĝuste pri tiu lingvo. En la sama

senco, en kiu oni povas paroli pri religio kiel socia fenomeno, ankaŭ oni povas paroli pri la socia penso de ĝi rilate al la internacia (komuna) lingvo, malgraŭ la dogmatika origino de ĉi tiuj sociaj faktoj.

DOKTRINOJ ORIGINE NE LIGITAJ KUN LA INTERNACIA LINGVO PROVO ADOPTI AL ILI ESPERANTON

Ni priskribos surbaze de du ekzemploj fenomenon, kiu koncernas strukture inversan procezon ol preparolita ĝis nun. Ĝis nun interesis nin ĉio, kio estis en la sociaj fenomenoj inspirita de Esperanto. Nun inverse interesis nin kiel partizanoj de Esperanto, kiuj jam akceptis antaŭe ceterajn doktrinojn (kredojn), kio provas pliriĉigi ilin per Esperanto.

En niaj ekzemploj temas pri la kristanismo en ties rom-katolika variaĵo kaj pri la marksismo-leninismo en ties sovetiisma variaĵo. En ambaŭ kazoj la metodo adopti Esperanton al tiuj doktrinoj estas simila. Temas pri la maniero per kiu oni pravas, ke certa doktrino estas esence preparita por ensorbi Esperanton. Se tio ne okazis ĝis nun, diras la doktrinistoj -, tio signifas, ke oni ne sufiĉe bone analizis tiun problemaron. La partizanoj de tia metodo uzas sufiĉe interesajn argumentojn kaj - laŭ ni - ili estas koheraj kun la analizitaj doktrinoj. Bedaŭrinde ambaŭ partizanoj de la ensorbo de Esperanto en siajn doktrinojn prisilentas kaj por tio falsigas historiajn faktojn en ceteraj lokoj, por anticipi verdikti pozitivan eblecon kongrui koncernan doktrinon kun la Internacia Lingvo. Pri tio iam malsupre.

1. La plej esenca provo adopti Esperanton al la bezonoj de la rom-katolika eklezio estas tiu de J.G. Korytkowski INTERNACIA LINGVO EN LA EKLEZIO KAJ MONDO.

En la libro ni trovas tutan historion de la problemo larĝe preparolitan, science prilaboritan.

Korytkowski estas sufiĉe preciza. La libro havas laikan karakteron, tio signifas, ke ĝi maksimume zorgas apogiĝi je la racia cerbumado kaj tre rare kaj prudente uzas citaĵojn de aŭtoritatoj.

Bedaŭrinde, Korytkowski (kaj tion mi substreku) konscie prisilentas la judan devenon de Zamenhof. Mi donas nur unu ekzemplon sufiĉe karakterizan. Se opinii prisilentadon ne mensogo, sed manko de vero, ni dirus ke la libro de Korytkowski strebas eviti t.n. "kolerigajn" problemojn por la eklezio mem. Sed Korytkowski ankaŭ mensogas. Sur paĝo 69 de

la pollingva versio de la priparolata verko troviĝas jena frazo: "Kiel dok kvin jaraĝa knabo li (t.e. Zamenhof - WZ) konis jam pli aŭ malpli ses lingvojn: la polan, rusan, germanan, francan, latinan kaj grekan." Kial Korytkowski evitas aldoni al tio la jdan lingvon? En la tuta ĉapitro dediĉita al la deveno de Esperanto kaj ties aŭtoro Korytkowski faris ĉion por nek per unu vorto kaŝi iun ajn suspekton pri la judeco de Zamenhof.

Ĉu pruvo de Korytkowski ensorbi Esperanton al la bezonoj de la eklezio estas sukcesa? Jes, ĝi estas sukcesa, ĉar liaj libroj ricevas "imprimatur" de la ekleziaj aŭtoritatoj. Ĉis nun aperis neniu kritiko kaj neniu doktrina kritiko de la penso de Korytkowski.

Surmarĝeno: estus interese scii pro kio Korytkowski bezonis falsigi nur unu vorton pri la judeco de Zamenhof, en la tuta senriproĉinda verko? Mi publike starigis tiun demandon, kaj mi volus koni la respondon.

2. Alia provo ligi socian doktrinion (ĉi-kaze marksismon-leninismon) kun Esperanto estas tiu de E. Drezen, en la unua antaŭstalinisma etapo de la praktiko de sovetsismo, t.e. en la dudekaj jaroj de nia jarcento. Poste sekvas poststalinisma etapo. La studon de Drezen pri Zamenhof ni opinias la plej honesta ĝis nun verkita el la inspiro de marksismo. Ĉe Drezen ni trovas neniun pruvon prisilenti historiajn faktojn aŭ mensogi pri Zamenhof, la epoko kaj la movado. Kompreneble ni ne povas konsenti kun ceriaj marksismaj konkludoj de Drezen. Sed li klare skribas, pri kio li ne konsentas kun Zamenhof (kaj ja ne konsentas kun plimulto da ideoj) kaj kun kio li konsentas. Kiel marksisto Drezen ne serĉas ĉe Zamenhof "erarigantan marksismon", kvankam li notas, ke Zamenhof havis foje "klasajn" trabrilojn, kiam Zamenhof ekzemple skribis, ke la fremdajn lingvojn scipovas nur superaj sociaj klasoj aŭ, ke facileco lerni Esperanton taŭgas por malsupraj klasoj ktp.

E. Drezen kiel marksisto kaj samtempe kiel homo de la plej profunda humanismo kaj kultura finas sian libron pri Zamenhof per jenaj vortoj: "Dank' al sia persisteco kaj penso profunda, Zamenhof sukcesis enkorpiĝi en sian lingva projekton ĉiujn postulojn-premisojn necesajn por reala ekzisto de la Lingvo Internacia." Drezen, kiel ni rimarkas, ne bezonis blinde apogiĝi je marksisma doktrino por esprimiĝi pozitive pri Zamenhof kaj Esperanto. Plue li ne bezonis ekvilibroarton kaj vortajn ŝanĝojn por esprimi humanisman valoron de la penso de Zamenhof, kun kiu li plej parte ne konsentis.

E. Drezen, martiro de la afero de la Internacia Lingvo, montris

kiel universalaj estas la penso kaj agado cele al la Internacia Lingvo, sendepende de la politikaj kaj doktrinaj dividoj kaj tendencoj.

J. Stalin, opozicie al la fenomeno de la Internacia Lingvo, kiun li kun kun ties partizanoj kondamnis je la morto, strebis krei propran lingvo-socian doktrinon de la Ĝ.n. kunfandiĝo de la lingvoj. Ni notas tiun fakton pro du kaŭzoj. La unua estas tio, ke kondamno je la morto de Esperanto kaj ties partizanoj en Sovetio signifas, ke J. Stalin kaj ties disĉiploj havis iun socian starpunkton inspiritan i n v e r s e por Esperanto. La alia kaŭzo estas, ke Stalin mem (kiel nardiza (irano) ne povis akcepti, ke io okazas ekster lia povo kaj decido. Pro tio li kondamnis Esperanton je la morto kaj mem aperigis sian propran personon ĉi teme. Efektive la ambaŭ kaŭzojn oni povas redukti ĝis unu sola: defruado de la "burĝa" ideologio kaj konstruo de la "progresema penso" kaj agado.

Kvindek jarojn post Drozen kaj ĉirkaŭ tridek jarojn post J. Stalin nova generacio de marksistoj esperantistoj provas ensorbi Esperanton en la doktrinon. Tio ĉi okazas per tute alia metodo ol tiu de Drozen.

Estas du rimarkindaj ĉi ritate aŭtoroj: M. Isajev el Sovetio kaj D. Blanke el GDR.

Isajev pli kiel marksista lingvisto ol ideologo marksisma, strebas montri Esperanton (en la konkreta politika situacio de Sovetio de Breĵnev) ne kiel "regulon de la socia disvolviĝo", (li ne kontraŭstaras al io tia, se io tia estas), sed kiel maldamaĝan ludon, tolereblan sur tiu etapo de Sovetunio por ceteraj lingvistoj kaj hobiuloj. Prof. Isajev elektis la vojon de kompromisulo vivanta en sovetismo, kiu por savi eblecojn esplori Esperanton, popularigi ĝin, bezonis el la tribuno de la Akademio de la Sciencoj de USSR certigi la korton de k-do Breĵnev, ke Esperanto danĝeras neniel al la eternaj interesoj de la progresema parto de la homaro loĝanta en USSR.

Aliajn vojon elektis D. Blanke. Li rekte celas prui, ke Esperanto (aŭ alia planlingvo) estas necesa ĝenero en la evoluo de la homaro.

Blanke, aprezante la valoron de la verko ESPERANTO EN PERSPEKTIVO, skribas en la antaŭparolo al la libro SOCIPOLITIKAJ ASPEKTOJ DE LA ESPERANTO-MOVADO, ke "...la prognozo de la perspektivo de Esperanto devas antaŭiri scienca prognozo pri la evoluo de la internacia politika situacio, de la interŝtataj rilatoj, entute de la tutmonda socia